

Przemysław Grzybowski

Rivail kaj edukado

Pedagogiaj ideoj kaj aktivado
de la kodiginto de spiritismo



Av. Marcos Vinicius Valle, 640
Jardim Santa Helena
Cep.12916-420
Bragança Paulista – SP – Brasil
e-mail: editoracomenius@uol.com.br

Korektis kaj reviziis:

Claudinei Gomes
Ismael Mattos Andrade Ávila
Neusa Priscotin Mendes

Peris kaj organizis: Clóvis A. Portes

Copyright © by Przemysław Grzybowski 2005



Hippolyte Léon Denizard Rivail

Edukado estas la verko de mia vivo, kaj mi plenigas mian tutan tempon meditante pri tiu ĉi afero.

Hippolyte Léon Denizard Rivail

La principo de pliboniĝo kuŝas en naturo de kredoj, ĉar la kredoj instigas al agoj kaj modifas sentojn; ĝi kuŝas ankaŭ en ideoj enradikigitaj infanaĝe kaj identigitaj kun spirito - same kiel en ideoj, kiujn posta disvolvo de inteligento kaj racio povas nur plifortigi kaj ne detrui. Per edukado do, ankoraŭ multe pli ol per instruado, oni transformos la homaron.

Allan Kardec

Enhavo

Antaŭparolo – Rivail, la edukisto 6

Studoj kaj profesia aktivado de H.L.D.Rivail 11

Tradukitaj tekstoj:

Proponita plano por plibonigo de publika edukado 41

Projekto de reformo koncernanta ekzamenojn kaj edukejojn por gejunuloj 85

Propono koncernanta akcepton de klasikaj verkoj fare de la Universitato 99

Pri kiu temas? 102

Glosareto 105

Literaturo 106

Antaŭparolo

Rivail, la edukisto

La libro “Rivail kaj Edukado: pedagogiaj ideoj kaj aktivado de la kodiginto de Spiritismo” de Przemysław Grzybowski prezentas al ni dimension ankoraŭ tre fora de la publiko, konanta **Hippolyte Léon Denizard Rivail (Allan Kardec)** nur pere de liaj verkoj celantaj la sistemigon de la Spiritisma Doktrino.

La verko komence lokas Rivail kuntekste de la eduk-soci-medio liaepoka, ne limigante sin al nura priskribo pri datoj kaj okazintaĵoj; la rigardo de la aŭtoro malkovras al ni la pedagogon Rivail travivanta la diskutadon de lia epoko, elstarigante kiom granda estis lia zorgemo rilate al la tiama socio kaj al la edukiĝo de la tiama homo.

Travidiĝas la iluminisma idearo en multaj el liaj argumentoj, kaj per lia klarvida rigardo oni konstatas la tiuepokajn malkoheraĵojn, pro kiuj Rivail elpensis kaj prezentis tre bone fundamentitajn reformproponojn.

La aŭtoro prezentas al ni Rivail kiel entrepreneman homon, kiu batalas por efektivigo de siaj ideoj, de tio, kion li kredas, eĉ se por tio necesis rezigni pri dungiteco siafame pro ne konsento kun la defalo de la tiama franca eduksistemo.

Malgraŭ la tumultoj de tiu jarcento, Rivail fariĝis digna disĉiplo de la Majstro Pestalozzi, el kiu li ĉerpis profundan komprenon pri la psikologiaj bezonoj de infanoj, malgraŭ la nesufiĉaj tiamaj konoj pri tiu temo. La aŭtoro al ni montras, kiom signifa estas la rolo de Pestalozzi en la vivo de Rivail, kaj klarigas, kiel la ĝermoj de tiu kunvivado en Yverdon disfloriĝis en multaj el liaj pedagogiaj ideoj.

Ideoj, kies konkretiĝo okazos estontece, agorde kun tiuj, kiuj venos al kompreno de infaneco kiel singulara kaj grava momento en la formiĝo de la homa estulo. Kadre de tio, la aŭtoro prezentas al ni homon kiu antaŭas sian tempon, kiam Rivail pritraktas la influon de medio en la formado de la kono de infano; kiam li atentigas al tio, ke la interŝanĝo kun

medio konstruigas al infano mensajn strukturaĵojn kaj akirigas al ĝi manierojn tiujn funkciigi; la elstaran rolon de la familio en la formiĝo de la homa karaktero, elmontrante malsaĝecon de punoj; gravecon de interrilato de instrufakoj; urĝecon de formado de instruistoj konsciaj pri la grandeco de iliaj taskoj, interalie.

La libro enhavas signifajn kontribuojn por ĉiuj, kiuj studas la historion de la pedagogiaj ideoj, kaj elvokas la gravecon de tiu ideoriĉa momento de la homa pensado. La legonto trovos valorajn informojn, ne nur por koni Rivail, sed ankaŭ por iom pli profunde kompreni tiujn lum-jarojn.

* * *

Edukado en la nuntempa mondo, mankohava kaj bezonanta perfektigon pluraspekte, estas nenio pli ol la frukto de la historio kaj de la multuloj kiuj ĝin elpensis laŭlonge de la homara vojiro.

Tiel, kiam ni kliniĝas sur la historion, ni liberiĝas de la naiva rigardmaniero bildiganta al ni heroojn kaj malnoblulojn, kiuj magie superas la normalan paŝadon de sia historia momento kaj redirektas per siaj singularaj agoj la homaran vojiron. Oni scias, ke por kompreni la kialojn kaj motivojn de la agado eduka estas necese rigardi ĝin lokitan en ties socia fono - male, ni rikoltos ŝajnaĵojn el nia naiva konscienco, tio estas el simpliga kaj eksterkunteksta rigardmaniero.

Ĉi-kuntekste estas interese elstarigi kelkajn gravajn punktojn figurantajn la disvolvon de la pedagogia pensado kaj eltrovi la gravajn influojn ĉirkaŭantajn Rivail liaepoke, kiuj incidis sur la tiaman edukan pensadon.

Oni povas preni kiel deirpunkton la penson de Comenius, vivanta inter 1592 kaj 1670, kies verko ne nur sinteze reprezentis liaepokan pedagogian pensadon, superante la antropologian pesimismen de mezepoko, sed influis la pedagogiojn de postaj epokoj, fortigante la konvinkiĝon pri tio, ke eblas al homo lerni kaj edukiĝi.

Comenius proponis novan edukadon kaj - transirante la kampon de pedagogio mem, en sia plej konata verko - la „Didactica Magna”, li eĉ tuŝis proponon de edukado kiel ilo de socia reformo. Lia pensmaniero estis tiel renoviga liaepoke, ke ĝis nuntempo en lernejoj troviĝas aplikado de liaj ideoj. Comenius sugestis interalie, ke por lernantoj oni planu

vojaĝojn kaj ekskursojn cele al ties konatiĝo kun aliaj realaĵoj; ke oni apliku ununuran libron por ĉiu lernobjekto; ke oni havu ununuran instruiston por ĉiu klaso; ke oni planu unusolan laboron por ĉiuj lernantoj cele al faciligo de la instruista tasko; ke sciencoj estu instruataj pere de rekta kontakto kun objektoj.

Tamen, kompreneble al li ne eblus ampleksi komprenon de la tuta vero koncernanta la homan edukadon. Tiel, ni trovas en la verko de Rousseau (1712-1778) aliajn pripensaĵojn, kiuj signife kontribuis al la evoluado de la pedagogia pensado. Rousseau, agorde kun sia historia momento, proklamis la naturajn rajtojn, egalecon kaj la plenan liberecon de homo. Malgraŭ tio, ke la edukado de li pritraktatane ampleksiĝis al pli larĝa socio, kies modelo limigis sin al edukado de riĉa junulo vivtenanta sin per monheredaĵo, nomata Emilo, indas elstarigi la fakton, ke el lia rigardmaniero oni konstatas edukadon bazitan sur konsidero de infano kiel infano mem, ne kiel estonta plenkreskulo.

En sia pedagogio Rousseau elstarigas gravajn aspektojn de la infana edukado, kiel neceson instrui aferojn utilajn por la praktika vivo, gravecon kultivi la guston al kleriĝo, sciencon, remalkovron de la persensa edukado, edukadon per travivado de rekta sperto kaj ne nur pere de memoro, interalie.

Oni same ne povas preteratenti rigardon laŭ socia vidpunkto. La historio de la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj atestis la leviĝon de nova kaj plenpova sociklaso kiu kontraŭstariĝis al la feŭda produkt-maniero. Iom post iom, laboruloj transiris de simpla kunlaborado al produktado de manfaritaĵoj, el kio devenis industrio. La edukaj celoj direktis sin al preparo de homoj por la merkata konkurenco, kiu tiam figuriĝis kiel la ideala celo de burĝaro.

Kaj sekve venas la XVIII-a jarcento, esence politiko-pedagogia. En ĝi la popolamaso postulis la publikan edukadon, kun tiom da firmeco, ke el tio sekvas, ke la Ŝtato fine starigas devon vizitadi lernejon. Estas signifoplena la granda celo de tiu moderna edukado, kiu sin turnas al ĉiuj homoj. Jen la iluministoj, utopiistoj, reformantoj kaj revoluciuloj estas tiuj, kiuj klopodas fari el tiu ideo realaĵon.

La Publika Lernejo, posta al tiu revolucio, rezultanta de la iluminista konceptado de la mondo, verŝajne emas liberigi la pensadon de kiu ajn subpremo, precipe de la monarkoj kaj de la Eklezio; sed laŭŝajne ĝin liberigas de tiuj, por tuj poste subigi ĝin al premado de alispeca potenco, ĉi tiu estas la Ŝtato.

Tamen, sen eksteriĝi de la eduka perspektivo indas, ke oni direktu la rigardon al la agado

de unu el la grandaj edukistoj konataj de la homaro, kun kiu Rivail signife kunvivis; Pestalozzi, naskita en 1746 kaj forpasinta en 1827.

Sen foriĝo de partoprenado en siatempa socio, Pestalozzi perceptis la maljustecon de la sociaj malsamecoj kaj pli ol kiu ajn en sia epoko interesiĝis pri la kamparanoj, eĉ arigante en sia hejmo malriĉajn infanojn kun intenco ilin eduki. Pestalozzi agis konforme al la direkto montrata de Rousseau, konsidere al la natureco de homo, al denaska boneco de la homa estulo; tamen kontraste al la dua, li sukcesis vivigi siajn ideojn en la praktiko.

Fondinto de la internulejo de Yverdon, kies aktiveco subteniĝis dum pli-mapli dudek jaroj, li povis tie apliki siajn pedagogiajn ideojn, kiuj tiel trafaj montriĝis en la tiama soci-eduk-medio, ke lia metodo adoptiĝis de pluraj aliaj edukistoj.

Rivail estis unu el liaj disĉiploj. Kaj estas okulfrape, kiom estis al li grava la temo: edukado. Li okupitiĝis ne nur de tiu de infanaro, sed ankaŭ de la eduka modelo tiam reganta, kiu profunde ĉagrenis lin. Vivante sub influo de la iluminisma pensado, Rivail esprimas firme siajn ideojn, skribas, prezentas kritikojn kaj proponojn, intense agante kaj klopodante kontribui por plibonigo de siaepoka edukstrukturo. Lia rigardo estas klarvida, bazita sur vivsperto, sur observado kaj sur la lernitaĵoj ĉerpitaj el Pestalozzi. Oni kaptas el liaj komentoj kelkajn aspektojn, kiujn estontaj studemuloj profundigis. Li traktas pri la edukaj problemoj vidataj de li siatempe - tamen oni konstatas, ke li tuŝas problemojn ankoraŭ nuntempe trovatajn en lernejoj.

Li pritraktas aferojn, kiuj okazas ankoraŭ nuntempe, ekzemple kiam li mencias mispreparon de instruistoj, oni kompare same konstatas kiom malfacile estas atingi taŭgan formiĝon de la instruistaro niaepoke. Kiam li citas, el inter aliaj elstaraj faktoroj de la infana formiĝo, la influon de la medio kaj la gravecon de la plena zorgo, li antaŭanoncas la kontribuojn al la moderna pedagogio donitajn de la studoj kaj esploroj de Wygotski kaj Piaget.

Kiam zorgeme li pritraktas la malsaĝecon de punoj aŭ la gravecon de la instrufaka interrilato, Rivail prezentiĝas interalie kiel homo sentema, kohera, zorgema pri la edukado de infanoj kaj de siatempaj civitanoj.

Kaj, ĉar edukado estis de li konstante pripensata temo, ĉar la zorgoj tutplene formi infanon laŭ ties potencialoj plenokupis lian animon, jen li estis la taŭga homo por prilabori la delikatan homan spiriton por la plej alta el ties vojiroj, tio estas la konscia spirita evoluo.

Estante vera edukisto en la esenco de la vorto, li estis kapabla ekkompreni la revolucion, kiun alportos al la homaro la informoj transdonitaj de la mediuma interŝanĝo.

Tiel ni venas al konstato, ke ne estas sufiĉe koni Rivail kiel la sistemiginton de Spiritismo, sed indas kompreni iom pli pri lia pensmaniero, kompreni la influon de la ideoriĉa epoko de li travivita, tiu de la franca Iluminismo; kaj ankoraŭ pli profunde, en tiu transiro de la Moderna al la Nuntempa Epoko, esplori faktojn, kiuj povu al ni helpi kompreni la homon en sia tempo.

Des pli pro tio, ke la XIX-a jarcento malkovros al ni ankoraŭ pli vastajn influojn, se oni turnos sin al la kontribuoj de Comte, Mill, Feuerbach, Marx, Haeckel, el inter aliuloj, konstrue al nova maniero rigardi la mondon. Tie elstare intervenas plia faktoro, tiu estas la pensado pri ekzisto de Dio. Rilate al la judo-kristana dio, rigardata kiel kreaĵo de la homo mem, estas klopodo humanigi ĝin, ekkomprenante ĝin kiel projekcion de la interna naturo de homo mem. Kaj eble pro tio, la tasko de Rivail en la sistemigo de Spiritismo proponas kiel unuan demandon en „La Libro de la Spiritoj” ĉi tiun plensignifan: Kio estas Dio?

Nu, grave estas kompreni lin en ties homa dimensio, homo kohera kun sia tempo, kies propono estas eduki ĉiujn homojn sen paternalismoj aŭ facilanimaj helpemoj.

Lia laboro kiel edukisto realiĝis en historia momento traspertanta tre signifajn ŝanĝojn; tiu laboro eĥis en la sekvan jarcenton, estante transcendentinta sian tempon, la lokon kie li naskiĝis kaj eĉ la sekvan jarcenton mem.

D-ro David Bianchini - UNICAMP, Brazilo

Esperantigis Neusa Priscotin Mendes

Studoj kaj aktivado de H.L.D.Rivail

Allan Kardec estas fame konata kiel la kodiginto de spiritisma doktrino. Tamen pli ol duono de lia plenkreska vivo estis ligita kun instruado kaj edukado de junularo, kion influis verŝajne ankaŭ la fakto, ke en lia vivo aperis elstaraj pedagogoj, kies agado kaj ideoj povis esti modelaj kaj tre inspiraj. Siatempe li estis konsiderata kiel sperta fakulo pri lernejoj. Liaj verkoj estis adresataj ĉu al gelernantoj, instruistoj kaj aliaj personoj okupiĝantaj pri instruado, aŭ edukado (ekz. lernolibroj, metodikaj gvidlibroj ktp.) – ĉu al personoj havantaj administran kaj leĝan influon sur francan eduksistemon (projektoj de reformoj, proponoj de sistemaj kaj lokaj ŝanĝoj de klerigaj institucioj). Kia estis A.Kardec – aŭ pli ĝuste Hippolyte Léon Denizard Rivail,¹ ĉar tiam li portis publike sian veran nomon – kiel pedagogo? Kia maniere disvolviĝis liaj ideoj de instruado kaj edukado? Kion li proponis koncerne klerigadon de sia popolo? – Provon de respondoj je tiuj ĉi demandoj oni penas doni en la ĉi-suba skizaĵo.

La vivon de H.L.D.Rivail ĉirkaŭvolvas forgeso – parte celita de li por protekti diversajn personojn, kaj aliflanke provokita kvazaŭ nature de liaj malpli fruaj grandsukcesaj publikigaĵoj kaj agado destinitaj al aferoj, pri kiuj oni ĝenerale ne parolas en lernejoj. Tamen por imagi kompletan silueton de la persono konata al ĉiuj simpatiantoj de spiritismo, necesus pli detale ekkoni la vivperiodon de H.L.D.Rivail antaŭ publikigo de la „Libro de la Spiritoj” – la

¹ En respektiva atesto pri bapto, aperas alia ordo de la antaŭnomoj, ol en oficiala dokumento pri naskiĝo - kio ofte kaŭzas miskomprenojn kaj demandojn pri ĝusteco. Respondo dependas de fonto, el kiu oni ĉerpas. En diversaj fontoj - eĉ sur la kovriloj de aŭtoraj verkoj, varias mallongigitaj formoj de la antaŭnomoj: „Hippolyte Léon Denizard” kaj „Hippolyte-Léon-Denizard” (kun, aŭ sen internaj strekoj). Simila problemo rilatas al la ofte diskutata dubo pri Denizard, Denisart, aŭ Denizard. Por simpligi la legadon, en tiu ĉi verko oni akceptis la formon „Hippolyte Léon Denizard Rivail” kun ĝia mallongigo „H.L.D.Rivail” (kiu ja aperas en liaj pedagogiaj verkoj).

vivperiodon dediĉitan precipe al larĝe komprenata pedagogia laboro – plenumado de instruistaj kaj edukistaj taskoj, verkado de fakaj libroj kaj artikoloj ligitaj kun profunda pripenso de koncernaj problemoj.

La ĉefaj fontoj de la prezentataj ĉi-sube biografiaj informoj pri H.L.D.Rivail estas respektivaj verkoj de Henri Sausse, André Moreil, Zêus Wantuil kaj Francisco Thiesen.¹ La unua el ili ĉerpis el riĉaj memoraĵoj kolektitaj de Pierre-Gaétan Leymarie – la unua ĉefredaktoro de la „Spiritista Revuo”. La biografioj verkitaj de H.Sausse kaj A.Moreil estas la plej popularaj – ĉefe en Eŭropo, kvankam oni opinias ilin nekompletaj kaj kelkloke eraraj. La plej taŭga pro sia precizeco kaj valoro de fontoj – almenaŭ rilate al la unua vivperiodo de la sistemiginto de spiritismo, ŝajnas do la majstra verko de Z.Wantuil kaj F.Thiesen „Allan Kardec – biobibliografia esploro”. Ceteraj informoj estas ĉerpitaj el aliaj – certe konsultindaj por pli vastaj studoj – biografiaj fontoj, diversaj verkoj pri historio de edukado kaj enciklopediaj vortaroj, kies listo aperas fine de la teksto. Por pli bone prezenti ideojn de H.L.D.Rivail, oni aldonis tradukojn de liaj tri pedagogiaj verkaĵoj, respegulantaj liajn opiniojn de la unua kaj de la lasta periodoj de lia instruista kariero.

* * *

Pri la unuaj jaroj de edukado de H.L.D.Rivail ne konserviĝis certaj informoj. Oni nur povas suspekti, ke en la periodo 1810-1814, pro sia aĝo li partoprenis kursojn de elementa lernejo – verŝajne en Parizo. Tre probable, precipe nestabila politika situacio de Francio en la periodo 1814-1815, devigis gesinjorojn Rivail sendi sian filon ekster-

¹ Vidu: H.Sausse: *Biographie de Allan Kardec*. Pygmalion Gérard Watelet, Paris 1993; A.Moreil: *Allan Kardec - Sa vie, son oeuvre*. Éditions Vernet, Paris 1989; Z.Wantuil, F.Thiesen: *Allan Kardec - Meticulosa Pesquisa Biobibliográfica*. FEB, Rio de Janeiro 1979, vol. I. - manuskripto de esperantlingva versio, en la traduko de Affonso Borges Gallego Soares.

landen, kie li povus akiri pli vastan edukitecon en trankvilo. Ili elektis la lernejon direktatan de Johann Heinrich Pestalozzi en Yverdon, en svisa kantono Vaud. Se eblas kredi al H.Sausse, H.L.D.Rivail ekde 1818 komencis helpadi al J.H.Pestalozzi en diversaj taskoj, dum tiu ĉi devis forveturi. Laŭ Z.Wantuil, tiu ĉi informo estas verŝajne senbaza kaj sonas troige. Tiun ĉi hipotezon pruvas detala pristudo de interna situacio de la centro, kies ĉefaj direktantoj anstataŭantaj ĝian kreinton kaj estron, estis avidaj je povo. Plej verŝajne ili ne permesus al iu alia (precipe tiom juna lernanto!) transpreni iliajn taskojn kaj respondecon pri gelerntoj. Z.Wantuil sugestas do, ke eĉ se io simila eblus, ĝi koncernus nur administradon de iu fako. Tamen eblas, ke H.L.D.Rivail helpadis al siaj pli junaj kolegoj en lernado – kion permesus la pestalozzia edukmetodo kaj kutimo en la lernejo.

Kiel praktikanta katoliko, H.L.D.Rivail estis malbone traktata de pluraj personoj en protestantisma medio. Li vidis ankaŭ baraktojn de sia majstro kun diversaj kontraŭuloj, kiuj ĉefe kverelis surbaze de diferencaj dogmoj kaj edukideologioj. Tio ĉi multe influis karakteron de H.L.D.Rivail kaj kreskigis en lia menso profundan konvinkon pri bezono de tolero. Ĝenerale eblas diri, ke la interkultura kaj liberpenseca etoso de Yverdon cizelis la plej gravajn trajtojn de karaktero kaj personeco de la junulo, kiuj estonte ekfloris, rimarkeblaj en verkoj kaj agado.

H.Sausse apogante sin sur deklaro de P.-G.Leymarie konstatas, ke H.L.D.Rivail interesiĝis pri fiziko, kemio, geologio kaj biologio, kaj kiel altajn studojn li decidis elekti medicinon ĉe la Medicina Fakto de Universitato en Lyon, kie li doktoriĝis, brile prezentinte sian tezon kaj akirinte la plej altan noton: „brio du reste”. H.Sausse mencias ankaŭ lian diplomigon pri juro – tiujn ĉi deklarojn konfirmas tamen neniu alia biografo aŭ dokumento. Same malfacile estas diri, kion H.L.D.Rivail faris en la periodo 1818-1822. Neniu citata biografo posedas pri tiu ĉi periodo certajn informojn.

Z.Wantuil supozas, ke li povis resti en Yverdon kaj labori kiel vicinstruisto aŭ instruisto. Tutcerte tamen, plej malfrue en januaro 1823, la junulo forlasis la svisan centron por reveni Francien – al Parizo, kie li ekloĝis ĉe la strato de Harpe kaj ekplenumis sian instruistan oficon, samtempe tradukante angl- kaj germanlingvajn tekstojn.

La unuan de februaro 1823 aperis reklamfolio (prospekto) titolita la „Praktika kaj Teoria kurso de aritmetiko, laŭ la principoj de Pestalozzi, kun modifoj”, kiu antaŭanoncis aperon de la unua pedagogia verko de H.L.D.Rivail. Ĝi estis dekspaga broŝureto, disdonata reklamcele por varbi aĉetontojn. Ĝis la unua de junio daŭris lanĉita subskripcio, por kies partoprenantoj la vendoprezco de la anoncita verko estis 6 francaj frankoj, kaj por la ceteraj – 7 francaj frankoj. La kompleta duvoluma verko (kun iom ŝanĝita titolo) aperis jam en decembro 1823, kvankam sur ĝia kovrilo estas menciita la jaro 1824. Ĝi estis rekomendata al instruistoj kaj patroinoj, kiuj deziras instrui al infanoj bazajn regulojn de aritmetiko. *„Estis deziro de Rivail helpi infanojn en la malfacilaj kaj iafaje tedaj problemoj de aritmetika kalkulado. Kaj en la XXVIII-192 utilaj paĝoj¹ de la unua volumo, ni vidas, kiel dolĉe kaj metode la aŭtoro allogas la lernanton, ekde la scio, ke unu plus unu estas du, ĝis la plej malsimplaj frakcioj, kaj ĉiun lecionon sekvigas per demonstraj ekzercoj. Ĉiuj operacioj estas diskutitaj, eksplikitaj kaj ekzempligitaj per multenombraj demandoj. (...) Tute ne intencante prepari doktoretojn pri aritmetiko, kion li neniam pretendis, la juna institutoro² nur celis enkonduki la infanaron en la scion pri tiu lernobjekto pere de solida kaj plenkomprenbla*

¹ En la verko estas uzataj du sistemoj de numerado de paĝoj.

² Uzadon de la nomo „institutoro” (france: instituteur), Z.Wantuil klarigas analizante ĝian etimologion kaj pozicion en la franca edukstemo, en kiu siatempe ĝi funkciis kiel titolo ligita kun diversaj devoj kaj rajtoj (ekzemple pri rifuzo de militservo, ktp.). Poste, la nomo evoluis kaj hodiaŭ signifas simple la personon, kiu instruas, aŭ okupiĝas pri instruado. En ĉi verkaĵo, ĉefe pro ĝia pli populara ol scienca karaktero, oni uzas kutime la simpligitan formon „instruisto”.

*instruado, krom ankaŭ elstarigi ĝian flankon praktikan kaj utilcelan.”*¹

Pli malpli meze de 1825 H.L.D.Rivail iĝis gvidanto de unuagrada lernejo, fondita de li mem en Parizo. Tiun ĉi fakton li anoncis en okpaĝa reklambroŝureto. Oni ne scias, kiom longe funkciis la lernejo. Tutcerte tamen unu jaron poste, H.L.D.Rivail kunfondis ĉe la strato de Sèvres № 35 „Institucion Rivail”, gvidatan laŭ la metodo de J.H.Pestalozzi, nomatan ankaŭ la „Teknika Instituto”. Tiucele li kreis kompanion kun sia patrinflanka onklo, kiu subvenciis la entreprenon. Necesas rimarki, ke H.L.D.Rivail uzadis tiam la titolon „estro de institucio”. Tiu ĉi titolo signifas ne nur iun specifan profesion staton, sed pruvas lian fakan vojon. Por akiri tiun ĉi titolon necesis sukceso en bakalaŭrigaj ekzamenoj pri Sciencoj kaj Beletro. Sukcesintoj rajtigitaj de la granda estro de la Universitato – la plej supera tiam respektiva administra povo, havis eblecon krei lernejojn, pensionojn kaj instituciojn. Sola bakalaŭro pri Beletro rajtigis gvidi nur pensionojn kaj akiri titolon de „estro de pensio”, kiu rajtis instrui nur ĝis kvara klaso de duagrada lernejoj. Laŭ Z.Wantuil: „*Verŝajne Rivail ne estis submetita al ekzamenoj por ricevi la ateston pri kapableco (brevet de capacité), kiun ekde 1816 la franca leĝaro postulis de la aspirantoj al la profesio de unuagrada institutoro (aŭ institutorino), publika aŭ privata. Sed tiu ĉi regulo havis plurajn esceptojn. La diplomoj de bakalaŭro pri Sciencoj kaj pri Beletro perfekte anstataŭis la «breveton», kaj eĉ pli: ili rajtigis la institutoron instrui al ĉiuj klasoj de la edukejoj kun libera duagrada instruado. Krom tiu «brevet», oni por la instrurajto ankaŭ postulis de la institutoro ateston pri bona konduto, liveritan de la parokestroj kaj «maîtres» de la komunumoj, kie li loĝis dum la lastaj tri jaroj. La atestoj pri kapableco respondis al tri gradoj: unua, dua kaj tria, aŭ malsupera. La unuagrada, aŭ supera, estis liverata nur al*

¹ Z.Wantuil, F.Thiesen: Allan Kardec..., ver.cit., p.55-56.

institutoroj, kiuj «principe ne nur funde scipovus la francan gramatikon kaj aritmetikon, sed ankaŭ kapablus instrui la elementojn de geografio, de termezurado kaj de aliaj objektoj utilaj por la unuagrada instruado». La kandidato estis ekzamenata de la akademia inspektoro aŭ de alia funkciulo de la publika instruado, elektita de la rektoro. Tiu ĉi lasta aljuĝis la ateston. En 1818 estis dekretite, ke la triagradaj institutoroj ne rajtas instrui en Parizo. Pro manko de klarigaj informoj, ni ne scias, ĉu Rivail bezonis, por ie ajn plenumi la funkcion de institutoro, tiun siatempe necesan specialan rajtigon, kiun ekde aprilo 1824, pro dekreto de la granda estro de la Universitato, Denis Frayssinous, episkopo de Hermopoliso, donadis por la liberaj edukejoj ne plu la rektoro, sed la diocesa episkopo, kiu ankaŭ inspektis aŭ inspektigis la lernejojn.»¹

La „Institucio Rivail” funkciis naŭ jarojn. La 14-an de aŭgusto 1834, dum la lasta parolado okaze de solena fermo de lernoĵaro en la lernejo, ĝia estro turnante sin al studentoj kaj premiitoj, diris inter alie: „*Mi dezirus, kiel mi kutimas, utiligi tiun ĉi okazon kaj raporti al vi pri kelkaj administraj aferoj. Strebante ĉiupreze konservi vian fidon, mi penas ripari tion, kio ŝajnas al mi difektita, aldonante tion, kio miaopinie estas ĝusta - unuvorte: utiligi la observojn, kiujn mi faras ĉiutage; ĉar edukado estas la verko de mia vivo, kaj mi plenigas mian tutan tempon meditante pri tiu ĉi afero; mi estas feliĉa trovante iun novan rimedon, aŭ malkovrante iun novan veron. (...) Edukado de infano konsistas ne nur el liverado al ĝi de tiu aŭ alia scio, sed el ĝenerala evoluo de ĝia racio; la racio disvolviĝas danke al akiritaj ideoj, kaj ju pli multe da ili oni posedas, des pli oni kapablas akiri la novajn. La maniero prezenti tiujn ideojn dependas do de majstreco de instruisto, de talento, laŭ kiu li scias ilin disvolvi, klasifiki kaj alĝustigadi al la naturo de racio. Simila al lerta ĝardenisto, li devas koni la terenon, sur kiu semas, ĉar spirito de infano*

¹ Samloke, p.65-66.

estas vera grundo, kies naturon necesas studadi; kaj same kiel talento de ĝardenisto konsistas ne nur el la scio kiel meti teren kreskaĵojn, tiel la talento de instruisto ne limiĝas nur al lernigado de la ekkonindaj de lernanto bazoj."¹ En la parolado H.L.D.Rivail prezentis siajn ideojn rilate al natura edukado, jam pli frue precizitajn en la „Proponita plano por plibonigo de publika edukado”. Li insistis pri natura (do ne mekanika kaj pedanteca) formo de instruado; li substrekis la gravegan rolon de pedagogiaj studoj kaj enradikigon de klerigado en historio de la popolo kaj civilizo de gelernantoj. Poste la estro parolis pri enkonduko de fiziko kaj kemio kiel objektojn devigajn en sian lernejon (krom kutimaj objektoj instruataj ĝenerale en similaj lokoj: la franca literaturo, geografio, historio, gramatiko ktp.); pri planoj rilatantaj al lecionoj de anatomio kaj fiziologio. Li menciis lernadon de geometria desegno kaj flua legado, aludis pri praktika ekzercado de skribo. Intertempe H.L.D.Rivail kritikis la karakteron de historiaj studoj de sia epoko, kiuj – laŭ li – estis limigitaj ĉefe al politika flanko de historio, al enkapigado de sensignifaj datoj kaj okupiĝado pri parenceco de familioj – por kio gelernantoj destinas multe da tempo kaj iel ajn rapide forgesas la aferojn. Li opiniis, ke multe pli valora estus historio de kutimoj kaj eltrovoj, de progreso de arto kaj scienco en sinsekvaj epokoj. H.L.D.Rivail opiniis ankaŭ, ke lecionoj de kantado estas same necesaj, kiel tiuj ĉi de legado. Laŭ li, la arto praktikata de instruisto estas arto de homkreado – arto kun filozofia naturo, kies bazo devus esti du maksimumoj: „Jam nur pugnoforto estis la leĝo – hodiaŭ la samon faras forto de spirito.” kaj „Lernante, vi laboras por via propra feliĉo.” Same kiel J.H.Pestalozzi li aranĝis sian institucion laŭ hejma etoso, samtempe gvidante lecionojn kaj penante transdoni al siaj lernantoj kiel eble plej bonan preparon al socia vivo. La vere familiaj vivo kaj kondiĉoj

¹ Rivail H.L.D.: Discours prononcé á la distribution des prix du 14 août 1834. Institution Rivail, Paris 1834, p.1.

ekfloris en la domo, kiam en 1832 li edziĝis kun Amélie-Gabrielle Boudet – same sperta instruistino, kiu posedante laŭleĝe la samajn instrurajtojn, helpadis lin en lia malfacila tasko. Ili kune fondis en ĉirkaŭaĵo de Parizo malgrandan edukejon por knabinoj, kiun direktis S-ino Rivail.

Ekster kutimaj ĉiutagaj taskoj de instruisto, H.L.D.Rivail vespere okupiĝis pri gramatiko, aritmetiko kaj pedagogiaj studoj, tradukadis diversajn verkojn. Inter aliaj, en 1830 aperis preparita de li kaj provizita de komentarioj, germanlingva versio de fragmentoj de la „Aventuroj de Telemako” – verko de François de Salignac de la Mothe Fénelon, por uzado en edukejoj, inter alie kiel objekto de komparaj studoj pri lingvoj. Z.Wantuil mencias, ke krom la angla kaj la germana, H.L.D.Rivail regis diversgrade la nederlandan, la latinan, la grekan, la gaŭlan kaj kelkajn novlatinajn lingvojn. Li siatempe estis rekonata kiel unu el la plej bonaj gramatikistoj en Francio.

Kiel sciencisto-praktikulo H.L.D.Rivail apartenis al kaj estis diplomita de diversspecaj asocioj kaj institucioj. Tamen necesas rimarki, ke ne eblas esti certa pri lia membreco en ĉiuj el ili menciataj de biografioj, ĉar dokumentoj, kiuj povus pruvi (aŭ kontraŭi) la faktojn, pereis en Parizo, en la Domo de Spiritistoj dum kaj post la dua mondmilito – restis do nur suprajaj informoj. Kiel probablajn aliĝlokojn oni kutime citas inter alie: Akademio de la Agrikultura, Manufaktura kaj Komerca Industrio; Asekura Societo de Estroj de Institucioj kaj de Estroj de Pensiono de Parizo; Franca Societo de Universala Statistiko; Frenologia Societo de Parizo; Gramatika Societo; Instituto de Historio; Instituto de Lingvoj; Reĝa Societo de Stimulado, Agrikulturo, Scienco, Beletro kaj Arto de la departamento de Ain; Societo de Elementa Instruado; Societo de Nacia Edukado; Societo de la Naturaj Sciencoj de Francio; Societo por Progresigo de Tutlanda Industrio kaj Reĝa Akademio de la Sciencoj en Arras. Tiu ĉi lasta, en 1831 atribuis al H.L.D.Rivail la unuan premion en konkurso kaj oran medalon, honorigante la verkon „Memuaro pri jena pro-

blemo: Kia estas la studsistemo, la plej konvena al bezonoj de nuna epoko?”. La informoj pri tiu ĉi verko estas tamen nekompletaj, kaj oni ne povas esti certa, ĉu ne temas pri la aperinta samjare „Memuaro pri publika instruado” – kvankam la premiito mem citante paroladon de sia lernanto, informas pri sia ĝojo pro la premio. Povas ankaŭ esti, ke la sama verko aperis kun du diversaj titoloj, kun eventualaj diferencoj de enhavo. Iel ajn la „Memuaro pri publika instruado” estis dediĉita al membroj de la parlamenta komisiono okupiĝanta pri juraj aferoj, rilatantaj al altaj lernejoj kaj prilaboranta leĝon pri instruado. Samtempe la komisiono laboris pri projekto de statuto de klerigaj institucioj. H.L.D. Rivail, kiel unu el la estroj de tiuspecaj entreprenoj, verkis dekspagaĝan tekston, en kiu li deklaris inter alie: „*Sinjoroj! Mi ne estas frenezulo, kiu aŭdacas atribui al si la rajton samniveligi mian propran scion kun la Via, kaj des pli al konsilado por estonteco. Mi tamen permesas al mi rimarkigi al Vi kelkajn ideojn pri la koncerna temo, ĉar mi opinias, ke ĉiu persono devus aldoni siajn tri groĝojn al diskuto pri publikaj institucioj. Do, kiel en ĉiu solvinda problemo, ankaŭ tie ĉi oni devas kolekti ĉiujn eblajn faktojn, kaj mi opinius min tre feliĉa, se pere de konciza prezento de tio, kion mi ŝuldas al profunda studado de diversaj eduksistemoj kaj dekdujara sperto, mi povus kunhelpi la disvolvon de kelkaj altaj ideoj interesaj al Vi.*”¹ En la broŝureto „(...) la Instruisto Rivail prezentis proprajn observojn kaj ideojn kaj sin montris favora al libereco de instruado kontraŭ la universitata monopolo. Li ankaŭ bedaŭris, ke en la publikaj edukejoj oni ankoraŭ ne donis justan atenton al la morala edukado (...). Rivail malkonsentas kun la Universitato pri tio, ke ĝi monopoligas la instruadon de kelkaj objektoj, ĝin rezervante nur al la publikaj edukejoj. Li deklaras, ke tio metas la lernintojn diplomitajn ĉe la institucioj kaj pensionlernejoj en malsuperan pozicion rilate la diplomitojn ĉe la

¹ A.Moreil: Allan Kardec..., ver.cit., p.86.

ŝtataj edukejoj, tiel kontraŭante al la spirito de libereco, kiu devas regi en la orientado de la instruado. Kaj li tute nature demandas: Kion utilas la rajto malfermi ian edukejon, se ties direktoro ne rajtas lernigi ĉiujn objektojn? Kun admirindaj inteligenteco kaj saĝo, Rivail prezentas, per iom pli ol du-deko da paragrafoj, siajn rimarkojn kaj konsiderojn pri la programo kaj planado de la instruado.”¹

Bedaŭrinde li ne povis realigadi siajn idealojn en propra medio. Lia partnero estis hazardemulo kaj kartludante perdis grandegajn sumojn en Spa kaj Aix-la-Chapelle. Tio ĉi kaŭzis fermon de la instituto en 1834. Post ĝia vendo H.L.D.Rivail tage laboris kiel librotenisto en tri entreprenoj, vespere tradukadis librojn kaj kun sia kolego David Eugène Lévy-Alvares prilaboradis studprogramojn por gelernantoj de lernejoj de la antaŭurbo Saint-Germain. En sia hejmo, dum la periodo 1835-1840 li gvidadis senpagajn, tre popularajn kursojn pri kemio, fiziko, astronomio, kompara anatomio. Laŭ Anna Blackwell² la kursoj okazadis jam de 1830 en vasta salono luita ĉe la strato de Sèvres kaj partoprenis ilin pli ol kvincent personoj, sed aliaj biografioj ne konfirmas tiun ĉi opinionon. „*De 1843 ĝis 1848 – skribas Z.Wantuil – Rivail ankaŭ donis publikajn, dusemajnajn kursojn de matematiko kaj astronomio. Kaj Léopold Dauvil, kiu estis unu el la redaktoroj de la «Revue Spirite», rakontis, ke ne nur la lernantoj, sed ankaŭ la instruistoj, kiuj vizitadis tiujn kursojn, admiris la simplecon de la demonstracioj de la majstro kaj lian esprim-fluecon.*”³

En 1848 H.L.D.Rivail akceptis postenon de instruisto kaj direktoro en Polimatika Liceo,⁴ kie krome li gvidis lecionojn

¹ Z.Wantuil, F.Thiesen: Allan Kardec..., ver.cit., p.77.

² Ŝi tradukis la „Libron de la Spiritoj” de Allan Kardec en la anglan kaj konis lin persone.

³ Z.Wantuil, F.Thiesen: Allan Kardec..., ver.cit., p.86.

⁴ La nomo „Polimatika Liceo” venas el la greka lingvo: poli - multe + máthein - scii, ellerni. Polimatika liceo: liceo, en kiu oni ricevas plurajn sciojn; kiu ofertas vastan programon de studobjektoj.

pri fiziologio, astronomio, kemio kaj fiziko. Du jarojn poste li rezignis pri tiu ĉi ofico, plej verŝajne ne plu tolerante la ŝanĝojn malbonfarajn al la privata instruado, kiuj intertempe okazis en la franca edukistemo.

Inter la verkoj kreitaj de H.L.D.Rivail en diversaj periodoj, estis didaktikaj gvidlibroj, planoj, ekzercaroj, kompilaĵoj pri metodiko por uzo de instruistoj kaj gepatroj, projektoj de reformoj dediĉataj al deputitoj, registaroj kaj pedagogoj. La plej ofte citataj estas:¹

- Cours Pratique et Théorique d'Arithmétique, d'après les principes de Pestalozzi avec des modifications [Praktika kaj Teoria kurso de aritmetiko, laŭ la principoj de Pestalozzi, kun modifoj] (1823);
- Cours Pratique et Théorique d'Arithmétique, d'après la méthode de Pestalozzi avec des modifications [Praktika kaj teoria kurso de aritmetiko, laŭ la metodo de Pestalozzi kun modifoj] (1824);
- École de premier degré [Unuagrada lernejo] (1825);
- Plan proposé pour l'amélioration de l'éducation publique [Proponita plano por plibonigo de publika edukado] (1828);
- Les trois premiers livres de Télémaque [La tri unuaj libroj de Telemako] (1830);
- Grammaire Française Classique sur un nouveau plan [Klasika franca gramatiko surbaze de nova plano] (1831);
- Mémoire sur l'instruction publique [Memuaro pri publika instruado] (1831);
- Mémoire sur cette question: Quel est le système

¹ Kelkaj citataj titoloj signas plilarĝigitajn versiojn aŭ novajn eldonojn de iamaj verkoj, tamen aperas sur la listo, ĉar en librokatalogoj estas traktataj kiel diversaj verkoj de H.L.D.Rivail. Aliaj estas citataj nur en sia la plej grava parto, ĉar tiutempe titoloj estis longegaj pro elnombrado da funkcioj de la verkinto, diversaj dediĉoj, ktp. Kelkajn librojn H.L.D.Rivail verkis kunlabore kun David Eugène Lévi-Alvares.

d'étude le plus en harmonie avec les besoins de l'époque? [Memuaro pri jena problemo: Kia estas la studsistemo, la plej konvena al bezonoj de la epoko?] (1831);¹

- Discours prononcé á la distribution des prix du 14 août 1834. [Parolado prezentita okaze de enmanigo de premioj la 14-an de aŭgusto 1834] (1834);
- Programme des études selon le plan d'instruction de H.-L.-D.Rivail [Programo de studoj laŭ instruplano de H.-L.-D.Rivail] (1838);
- Cours complet théorique et pratique d'arithmétique [Kompleta teoria kaj praktika kurso de aritmetiko] (1845);
- Manuel des examens pour le brevet de capacité [Lernolibro de ekzamenoj por la atesto pri kapableco] (1846);
- Solutions raisonnées des questions et problèmes d'arithmétique et de géométrie [Raciaj solvoj de demandoj kaj problemoj de aritmetiko kaj geometrio] (1846);
- Projet de Réforme concernant les examens et les maisons d'éducation des jeunes personnes [Projekto de reformo koncernanta ekzamenojn kaj edukejojn por gejunuloj] (1847);
- Proposition concernant l'adoption des ouvrages classiques par l'Université [Propono koncernanta akcepton de klasikaj verkoj fare de la Universitato] (1847);
- Traité complet d'arithmétique [Kompleta traktato pri aritmetiko] (1847);
- Solution des exercices et problèmes du „Traité complet d'arithmétique” [Solvo de ekzercoj kaj problemoj de la „Kompleta traktato pri aritmetiko”] (1847);
- Cathechisme grammatical de la langue française

¹ Vidu rimarkon supre.

- [Gramatika katekismo de la franca lingvo] (1848);
- Grammaire normale des examens [Norma gramatiko de ekzamenoj] (1848);
- Dictées normales des examens de l'Hôtel de Ville et de la Sorbonne [Normaj diktaĵoj de ekzamenoj de la Magistrato kaj la Sorbono] (1849);
- Dictées spéciales sur les difficultés orthographiques [Specialaj diktaĵoj pri ortografiaj malfacilaĵoj] (1849);
- Programme des cours usuels de chimie, physique, astronomie, physiologie [Programo de ordinaraj kursoj de kemio, fiziko, astronomio, fiziologio] (1849);
- Dictées du premier et du seconde âge [Diktaĵoj de la unua kaj la dua aĝo] (1850);

Precipe la kvar lastaj verkoj, el la menciataj ĉi-supre, estis alte aprezitaj, aprobitaj de la Universitato de Francio kaj kelkfoje reeldonitaj. Malpli ofte oni citas ankaŭ:

- Cours de calcul de tête [Kurso de mensa kalkulado];
- Manuel pédagogique [Pedagogia lernolibro];
- Mémento arithmétique des examens [Aritmetika memorigilo por ekzamenoj];
- Programme des études d'instruction primaire [Programo de studoj pri baza instruado];
- Traité complet pratique et théorique d'arithmétique, d'après la méthode de Pestalozzi [Kompleta praktika kaj teoria traktato pri aritmetiko, laŭ la metodo de Pestalozzi];
- Traité de pédagogie [Traktato pri pedagogio].¹

Por bone kompreni kie ĝuste lokiĝas la pedagogiaj verkoj de H.L.D.Rivail kaj kompreni liajn ideojn, necesas substreki, ke liaj instruistaj studoj kaj agado okazadis en tre specifa

¹ Verŝajne neniam eldonita.

periodo. La situacio de okcidenteŭropa lerneja sistemo en la XIX-a jarcento evoluis influata de progresaj ŝanĝoj de socio. Rilate al politiko, la tuta okcidenta mondo marŝadis direkte al demokratio – kio ne povis okazi sen ŝanĝoj ĝuste en klerigado. Nur danke al ĝi, civitanoj povis akiri la scion necesan al utiligo kaj uzo de povo. Estonto de demokratio dependis do de sistema enriĉigado de instruprogramoj. Por ke profitu el tio kiel eble plej multnombraj personoj, en diversaj landoj komencis ĝermi la ideoj pri devigecko kaj senpageco de publika instruado – komence rilate al unuagrada lernejoj.

Danke al gravaj eltrovoj, vaste utiligataj en agrikulturo, industrio kaj komerco, la socio ne plu bezonis multflanke instruitajn humanistojn, sed komencis postuli fakulojn posedantajn teknikan scion, kiuj efike produktadus varojn. En duagrada lernejoj, paŝon post paŝo oni do rezignadis pri klasikaj lingvoj, anstataŭigante ilin per la lingvoj vivantaj kaj la ekzaktaj sciencoj. Krom simplaj duagrada lernejoj komencis aperadi alispecaj institucioj, en kiuj oni tute malaperigis la grekan kaj la latinan kiel instruobjektojn. En ili oni emfazis precipe praktikan aplikon de la ekzaktaj sciencoj kaj kunmetadon de ekonomio kun politiko. En tia situacio ne plu eblis, ke lernejoj daŭre dependu de Eklezioj – klerigado devus laikiĝi, kaj la povon super ĝi devus transpreni la Ŝtato.

En la komenco de la XIX-a jarcento la ĉi-supraj tendencoj restadis nur en la sfero de kuraĝaj ideoj. En la ekzistanta lerneja sistemo la plej multnombraj estis tiam etaj lernejoj (garantiantaj vere bazan klerigon) kaj kolegioj. Tiuj ĉi unuaj servadis precipe al popolo. En la lernejoj eblis eklerni legi, skribi kaj kalkuli, samtempe ekkonante fundamentojn de pieco kaj religia praktiko – kio gvidis al kreo de la speco de homo-bona kristano. Efikoj de tiuj ĉi lernejoj estis malkontentigaj, ĉar profitis el ili tro malmultnombraj infanoj. Nur la protestantismaj landoj de Norda Eŭropo kaj la Nova Mondo setlita de elmigrintoj el ili venintaj, notis tiurilate sukcesojn

kaj progreson. Tion ĉi kaŭzis la fakto, ke la religiaj reformantoj de la XVI-a jarcento postulis, ke iliaj samreligianoj instru al siaj infanoj legi la „Biblion”.

La kolegioj estis destinitaj al gelernantoj el superaj soci-tavoloj – tiuj de denaska nobelaro, kaj de diversaj novriĉuloj. En tiuj ĉi institucioj lernadis do la sociaj elitoj kaj estontaj ŝtataj oficistoj. La instruado tie dominanta, kiu estis bazita sur la latina lingvo, disvolvadis sisteman pensmanieron kaj helpis krei tipe kristanan vivsintenon. Fino de la lernado en tiuspeca lernejo ebligadis estonte pritrakti kaj solvi bazajn administrajn kaj ekonomiajn problemojn.

En ambaŭ specoj de lernejoj – kun konsento de la Ŝtato – la ĉefan rolon ludadis Eklezioj, pro kio la instruprogramoj enhavis plurajn religiajn elementojn. Ankaŭ la instruistoj ofte estis ekleziuloj. Lernejo do formadis mensojn obeemajn samtempe al religiaj normoj kaj ŝtataj leĝoj. En tiu epoko nur teologoj, juristoj kaj kuracistoj ricevadis fakan instruon en universitatoj.

Iom post iom komencis malaperadi seksaj diferencigoj inter gelernantoj – unue en la unuagradaj lernejoj, poste ankaŭ en la ceteraj. Ekkreskadis ankaŭ nombro de instruistoj – precipe en Usono kaj en la britaj kolonioj. Komencis pliboniĝadi materia situacio de lernejoj: aperis pli komfortaj salonoj, pli da lernolibroj. Danke al germanaj kaj svisaj pedagogoj, komencis disvolviĝi aktivigaj kaj intuciivaj instrumentoj, kiuj permesadis al gelernantoj partopreni en instruprocedo kaj akompani sian majstron-instruiston en malkovrado de vero.

Ŝanĝoj en la franca eduksistemo okazadis evolucie, kiel en ceteraj okcidenteŭropaj landoj. Tamen akompanadis ilin profundaj krizoj, foje en etoso plena de pasioj, kiujn kaŭzis specifa karaktero de francoj kaj konkretaj enlandaj cirkonstancoj. Francio estis tiam la lando de tradicio, en kiu el ĉiama senco de socia hierarkio kaj aristokratio (samtempe tiu ĉi malnova – denaska, kaj nova – novriĉa), venis ekzisto de noblaj servoj (la ŝtatservo, liberaj profesioj) kaj de ceteraj –

ne tiom estimindaj. Al tiu ĉi duaranga grupo apartenis fizika laboro, do la personoj plenumantaj ĝin estis ne tre estimataj. En sistemo de klerigado, tiu ĉi situacio malfruigis precipe disvolvon de la duagrada lernejoj – oni ja ne deziris disvolvi la parton de eduksistemo, kiu povus servi al „malpli gravaj” homoj.

Favorajn kondiĉojn por pli vasta disvolvo de publika klerigado aperigis tamen la progreso de industriigo de Francio. Instruado iĝis ja pli grava precipe por riĉaj industriuloj, kiuj deziris, ke iuj laboristoj kleriĝu, akirante kaj pligrandigante sian teknikan scion. Aperis ankaŭ bezono garantii prizorgon al la infanoj, kies gepatroj dum la tuta tago laboris en fabrikoj. Estonte, tio ĉi provokis zorgon pri ĝusta loko en la socio de ĉiuj laborantaj personoj kaj iliaj familioj.

La evoluo de publika eduksistemo kaj de sinsekvaj lernoinstitucioj fidele respeguladis socipolitikajn ŝanĝojn de la lando. Francio en la epoko de H.L.D.Rivail estis – malgraŭ ekzisto de religiaj minoritatoj – lando profunde influata de katolikismo. Ĝis mezo de la XIX-a jarcento, rilate al klerigado la plej gravan rolon ludadis tie burĝoj bazantaj sur idealoj de Voltaire, kiuj poste – pro sia konservemo – komencis serĉi rifuĝon en religio, aŭ en diversaj formoj de spiritualismo konsentante, ke iliaj infanoj (kaj eĉ tuta popolo) estu zorgataj de Eklezio. Transformado de lernejoj, ligita kun ties laikigo, estis do forte repuŝata de katolikaj ekleziuloj opiniantaj, ke la tuta evoludirekto de la eduksistemo malbonfaras al la reganta religio kaj privilegias ceterajn kredo-sistemojn. La katolika Eklezio strebis do evoluigadi proprajn klerigejojn – apud la ŝtataj. Ekleziuloj subtenataj de liberala partio, provis ankaŭ rompi la monopolon de la Universitato, aŭ konservi ĝin – sed profite al si mem. La leĝo de la 15-a de marto 1850 plifortigis povon de la Eklezio super lernejoj, permesante al ĝi kreadi kaj disvolvadi proprajn klerigejojn. Kontraŭis tion respublikanoj strebantaj, ke lernejo preparadu laikajn oficistojn por publika servo.

La XIX-a jarcento en la historio de Francio estas la periodo

de konkurado de diferencaj politikaj reĝimoj. Registaroj, ministroj, konceptoj kaj leĝoj rilataj al edukado ŝanĝigadis tiam kiel en kalejdoskopo. Problemoj de klerigado kaj eduksistemo estis unu el la plej ŝatataj temoj de parlamentaj diskutoj – foje longdaŭraj kaj tre akraj. En la disputoj eblis rimarki, ke pluraj kaj laikoj kaj ekleziuloj estis fieraj pri sia scio de la klasikaj lingvoj, malestimante la teknikan edukitecon, kiun defendis malmultnombraj personoj. Rilate al religio, eĉ se kelkaj postulis ĝin por la popolo, kaj aliaj kontraŭis ilian opinion – ĉiuj tamen unuanime substrekadis valoron de la morala edukado kaj instruado de reguloj pri socia ordo, aŭtoritato kaj proprieto al infanoj kaj junularo. Pri tiuj ĉi aferoj oni ĝenerale konsentis. Oni do povas diri, ke malgraŭ la streboj al ideologia regado super eduksistemo, ekzistis konsento rilate al ĝiaj celoj kaj rimedoj.

Francio estis tiam lando de granda literatura kulturo kaj amaso da verkistoj. Tiuj ĉi lastaj regis ankaŭ en la eduksistemo kaj malhelpadis evoluon de „utilaj” studobjektoj (precipe de la ekzaktaj sciencoj) kaj ilia utiligado en industrio. La periodon de la Franca Revolucio ĝis la komenco de la III-a Respubliko karakterizas do vera „diluvo” de pedagogiaj verkaĵoj, ligita kun kreado kaj publikigado de projektoj de reformoj (foje tre aŭdacaj!). La klerigaj institucioj respiculadis kaj reproduktadis malegalon de antagonismaj sociaj klasoj – kion rimarkadis personoj priskribantaj la eduksistemon. Ili mem tamen, senskrupule distingadis du apartajn klasojn: tiun ĉi de posedantoj (aŭ nobeloj) kaj tiun ĉi de laboristoj (aŭ popolo). Al ĉiu el la klasoj oni atribudis specialan instruprogramon: por reganta klaso la klasikan kulturon, aŭ sciencon scion – kaj por malriĉuloj bazan edukadon, ligitan kun sento de moralo kaj oboe. Necesas substreki, ke tiu ĉi opinio, kontraŭstariganta konceptojn de komuna lernejo por nobelaro kaj popolo, ne estigis protestojn kaj regis en la tiama fakliteraturo kiel evidentaĵo.

Se temas pri tiamaj instru- kaj edukmetodoj, la plimulto de geinstruistoj strebis limigi spontaneemon de gelernantoj. Ilia

agado sinbaza sur aŭtoritato, kaj disciplino estis la rimedo kontraŭ ĉiuj elmontoj de protesto aŭ ribelo. Malgraŭ ke libero de penso estis traktata kiel estiminda ĉe plenkreskuloj, oni malpermesadis ĝin ĉe infanoj kaj gejunuloj. Eĉ la plej grandaj defendantoj de libera penso ne akceptadis la ideon, ke lernanto povus diskuti kun instruisto.

En tia etoso naskiĝadis asocioj kaj diversaj organizaĵoj, kies membroj provis iel solvi la problemojn. Instruistoj penis krei modernajn, pli efikajn instru- kaj edukmetodojn, kiujn ili priskribadis en lernolibroj, dediĉataj jen al siaj gekolegoj, jen al gelernantoj. Pluraj personoj mem kreadis diversajn edukejojn, infanvartejojn kaj pensionojn, ofertante eblecojn variajn laŭ grado, valoro kaj laborkondiĉoj. Foje tiuj ĉi personoj estis nepreparitaj al tiuspeca aktivado. Foje ili celis nur profiton, dungante ne kiel eble la plej bonajn instruistojn (ĉar al tiuj ĉi preparitaj dum specialaj, fakaj studoj oni devis pagi pli) – sed ankaŭ amatorojn, kiuj ne povis trovi laboron aliloke.

Fone de la ĉi-supraj informoj, la opinioj de H.L.D.Rivail pri edukado kaj organizado de la franca eduksistemo, permesas vidi lin lokiĝantan en vasta aro de la personoj diskutantaj pri unu el la plej gravaj problemoj de tiama socio. Liaj proponoj de sistemaj ŝanĝoj rimarkeble ne influis la situacion. Pruvas tion la fakto, ke en neniu el disponeblaj verkaĵoj pri historio de la franca eduksistemo oni mencias lin, aŭ liajn konceptojn. Analizo de la metodikaj solvoj de H.L.D.Rivail, permesas rimarki, ke li lokiĝas apud siatempaj progresemaj pedagogoj kaj instruistoj, kiuj serioze konsideris la bonon de gelernantoj.

La „Proponita plano por plibonigo de publika edukado” estis 52-paĝa broŝuro, eldonita en 1828 de la eldonejo Dentu, kies sidejo troviĝis en la Reĝa Palaco. Ĝi estis prezentita al membroj de la franca parlamento. En tiu ĉi verko H.L.D. Rivail prezentis ĉefe pestalozzi-ajn ideojn, parolante pri infano influata de ties ĉirkaŭaĵo, kiu disvolviĝos interalie danke al instruisto, kiu scios bone direktigi ĝiajn interesojn. Laŭ li, en edukado la plej grava estas reala libereco de ins-

truado kaj akademia monopolo. Direktoroj de lernejoj kaj edukejoj devas havi la rajton enkonduki tiujn studobjektojn, kiujn ili opinias taŭgaj. Alimaniere, kiam ĉio dependas de iuj administraciaj decidoj, estas la Ŝtato, kiu havas monopolon. H.L.D.Rivail rimarkis ankaŭ, ke gelernantoj de publikaj lernejoj ne havas la samajn rajtojn, kiel iliaj gekolegoj el studejoj privataj. Kiel unu el la plej grandaj problemoj de liatempaj instruistoj, H.L.D.Rivail opiniis mankon de morala edukado, kiu – laŭ li – ebligis, ke infano iĝu honesta kaj bonvolema civitano. Por precizigi tiun ĉi sintenon, en la jam menciita ĉi-supre „Memuaro”, li prezentis hierarkian sistemon de aristokratioj sinsekvantaj en historio de homaro:

- 1) aristokratio de forto,
- 2) aristokratio de leĝo (nuligita en 1789)
- 3) aristokratio de mono (la burĝa aristokratio)
- 4) aristokratio de racio.

La lasta el la specoj de aristokratio estas kunkreata de intelektulaj elitoj, kies tasko estas prepari instruadon en lernejoj. Por ke ĉiuj eblaj problemoj estu kiel eble plej bone solvitaj, H.L.D.Rivail priskribis en 26 artikoloj siajn observojn kaj proponojn de ŝanĝoj en la sistemo de publika edukado. Liaj tre detalaj rimarkoj rilatis al nombro de studantoj en ĉiu speco de institucio, aĝo de bakalaŭruloj kaj posedantoj de licencoj, alteco de instruistaj salajroj, ktp. En 1831 H.L.D.Rivail publikigis la „Klasikan francan gramatikon surbaze de nova plano”, bazitan jam sur liaj pli frue anoncitaj ideoj (en ĝi, krom skiza historio kaj pritrakto de reguloj de la franca lingvo, li prezentis naturajn leĝojn firmigantajn ĝin, apogante siajn opiniojn sur verkoj de la plej kompetentaj aŭtoroj de la franca klasika literaturo, kiujn li konsilis uzi skribe kaj parole). Kompletigis ĝin en 1847 la „Projekto de reformo...” rilatanta al ekzamenoj kaj edukejoj por junularo, akompanata de la propono, ke universitatoj akceptu klasikajn verkojn kiel bazon de instruado. En eldonita unu jaron poste la „Gramatika katekismo de la franca lingvo” li deklaris, ke klareco kaj simpleco devus esti la ĉefaj ecoj de verkoj destinitaj al

komencantoj. Pro tio necesas eviti en ili abstraktaĵojn kaj ĉion, kio povus konfuzigi junajn mensojn penantajn akiri bazan scion. La libro estis destinita por la unua grado de elementa instruado, kaj kiel la sola el la verkaro de H.L.D. Rivail, verŝajne pro laborista ribelo en la franca ĉefurbo, estis eldonita ekster Parizo – en Sèvres.

Resumante la opiniojn rilate edukadon, necesas mencii jenajn konkludojn de H.L.D.Rivail: „1. *Edukado estas unika scienco.* 2. *Se oni konstatas, ke pluraj personoj instruas ne laŭ ĝusta maniero, tion kaŭzas la fakto, ke mankas fakaj studoj tiurilate.* 3. *Ĉiujn malfruojn rilatantaj al edukado oni devas atribui al la fakto, ke malmultaj personoj ĝuste taksas ĝian veran celon, kaj oni ne rimarkas kio estas edukado; kio ĝi povus esti – kaj sekve de tio, kion necesus fari, por ke la situacio pliboniĝu.* Edukado estas nun – skribis H.L.D.Rivail – en la stato simila, al tiu de kemio antaŭ cent jaroj. Ĝi estas scienco ankoraŭ ne tute konstituita, kaj ĝiajn bazojn oni ankoraŭ ne difinis.”¹

H.L.D.Rivail por realigi sian ideon kaj postulon, proponis kreon de lernejo de teoria kaj praktika pedagogio, surbaze de jam funkciantaj studejoj de juro kaj medicino. Laŭ lia koncepto, la lernado daŭrus tri jarojn: la unua estus dediĉata al teorio; la dua – al teorio kaj praktiko; la tria – nur al praktiko. Eblas rimarki, ke liaj unuaj publikigaĵoj estas karakterizaj pro entuziasmo rilate al instruado kaj edukado. H.L.D.Rivail ripetas en ili la ideojn, kiujn li ĉerpis de sia majstro en Yverdon kaj de siaj pli spertaj gekolegoj. Sinsekve en la verkaĵoj aperas rimarkoj rilatantaj al instruista praktiko kaj bezonoj kun ĝi ligitaj. Laŭ enhavo kaj stilo ili similas al aliaj pedagogiaj verkoj de la epoko kaj tio pruvas, ke la ideoj de ilia aŭtoro estis freŝdataj, kaj ke li bone orientiĝis en problemoj de eduksistemo de sia lando. La lastaj pedagogiaj verkoj de H.L.D.Rivail (unuaj eldonoj), aperis en 1850 – ĉiuj ceteraj estis ligitaj jam kun spiritismo, kvankam ankaŭ ili estas

¹ Laŭ A.Moreil: Allan Kardec..., ver.cit., p.84.

neeviteble ligitaj kun pedagogiaj interesoj de la verkinto.

En la „Libro de la Spiritoj” – kiel la unua spiritisma libro de Allan Kardec, eblas trovi kelkajn fragmentojn, kiuj rilatas al edukado. Ili estas ĉu opinioj de H.L.D.Rivail nun kaŝita sub la pseŭdonomo, korespondantaj kun liaj antaŭaj verkaĵoj – ĉu tiuj ĉi de Spiritoj. Tiuj ĉi lastaj, verŝajne devus esti traktataj kiel fremda fonto, sed por rekoni la rolon de homo (pedagogo) en kompilado de la libro, necesas menciigi almenaŭ la plej trafajn citaĵojn.

Al la unua grupo apartenas do jenaj fragmentoj:

• **Pri esenco de edukado:** „*Ne sufiĉas diri al homo, ke li devas labori; estas ankaŭ necese, ke tiu, kiu esperas sian vivtenadon el laboro, trovu ian okupon, kaj tio ne ĉiam okazas. Kiam la interrompo de laboro ĝeneraliĝas, tiu fakto ricevas amplekson de malfeliĉego, kia estas malsato. La ekonomio serĉas por tio rebonigan rimedon, klopodante por la ekvilibro inter produktado kaj konsumado; sed tiu ekvilibro, eĉ se oni supozas, ke ĝi estas ebla, estas nepre intermita, kaj ankaŭ dum tiuj intertempoj la laboristo bezonas vivi. Estas faktoro, kiu ankoraŭ ne estas metita sur la teleron de l'pesilo kaj sen kiu la ekonomia scienco nenio estas krom teorio: ĝi estas edukado, ne la intelekta, sed la morala edukado; ne, ankaŭ, la morala edukado per libroj, sed tiu, konsistanta en la arto formi karakterojn, tiu, haviganta kutimojn: ĉar edukiteco estas la tutaĵo de akiritaj kutimoj. Se ni pensas pri la multego da individuoj, ĉiutage puŝataj en la torenton de loĝantaro, sen iaj principoj, sen ia brido, donitaj al siaj propraj instinktoj, ĉu ni miru la ruinigajn sekvojn de tiaj cirkonstancoj? Kiam tiu arto estos konata, komprenata kaj praktikata, tiam la homo enkondukos en la socion kutimojn je ordo kaj antaŭzorgo por si mem kaj por siaj samrondanoj, je respekto por la ŝatindaj aferoj; kutimojn, kiuj ebligas al li travivi malpli pene la sufertagojn, kiujn li ne povos eviti. Senordeco kaj neantaŭzorgo estas du kanceraj, kiujn nur bone komprenata edukado povas elsarki; en tia edukado troviĝas la deirpunkto, la reala faktoro de bonfarto, la*

garantio de ĉies sekureco.”¹

• **Pri libera volo:** „*La homo ne estas fatale kondukata en malbonon; la agoj, kiujn li faras, ne estas al li anticipe ordonataj; la krimoj, kiujn li plenumas, ne rezultas el ia dekreto de la destino. Li povas, kiel provon kaj pekelpagon, elekti ekzistadon, en kiu li estas instigita al krimo, ĉu de la medio, kie li troviĝas, ĉu de la fariĝantaj cirkonstancoj; sed li ĉiam decidus mem cedi aŭ ne. Libera volo konsistas do, dum la spirita stato, en la elekto de la ekzistado kaj de la provoj; kaj, dum la enkorpora stato, en la kapablo cedi aŭ kontraŭstari al la enpuŝoj, al kiuj ni memvole nin submetis. Koncernas la edukadon kontraŭbatali tiujn malbonajn inklinojn; ĝi tion profite faros tiam, kiam ĝi sin bazos sur la ĝisfunda studado de la morala naturo de la homo. Per konado de la leĝoj, kiujn tiu morala naturo obeas, oni fine modifos ĉi tiun naturon, same kiel oni modifas intelekton per instruado kaj temperamenton per higieno.*”²

• **Pri malhelpoj en progreso de la homaro:** „*Oni faras sendube laŭdindajn klopodojn por antaŭenigi la homaron; hodiaŭ oni kuraĝigas, stimulas, honoras la bonajn sentojn pli, ol en neniu alia epoko; kaj tamen la mordanta vermo nomata egoismo estas ĉiam ankoraŭ la kancero de la socio. Ĝi estas reala malbono, refalanta sur la tutan mondon kaj kies viktimo ĉiu pli aŭ malpli estas; necese estas do ĝin kontraŭbatali, same kiel oni alfrontas epidemian malsanon. Por tio estas necese procedi kiel la kuracistoj: iri returne al la origino. Oni serĉu en ĉiuj partoj de la socia organismo, ekde familio ĝis la popoloj, ekde kabano ĝis palaco, ĉiajn kaŭzojn, ĉiajn influojn, kaŝitajn aŭ evidentajn, kiuj ekscitas, nutras kaj elvolvas la senton de egoismo: kiam la kaŭzoj estos konataj, la kuracilo sin prezentos mem; tiam oni devos nur ilin kontraŭbatali, se ne ĉiujn samtempe, almenaŭ parte; kaj, iom post iom, la veneno estos eltirita. La resaniĝo estos longe-*

¹ A.Kardec: La libro de la Spiritoj. FEB, Rio de Janeiro 1989, pp.319-320 - en la traduko de L.C.Porto Carreiro Neto.

² Samloke, p.384.

daŭra, ĉar la kaŭzoj estas multenombraj; sed ĝi ne estas neebla. Tiun celon oni trafos cetere nur atakante la malbonon ĉe ties radiko, tio estas, per edukado; ne per tiu edukado, celanta fari instruitajn homojn, sed per tiu, celanta fari homojn virtajn. Edukado, se bone komprenata, estas la ŝlosilo de l'morala progreso; kiam oni konas la arton direkti karakterojn, tiel bone kiel la arton direkti intelektojn, oni povos korekti la karakterojn tute same, kiel oni korektas misformajn arbetojn; sed tiu arto postulas grandan takton, multe da sperto kaj profundan observadon; ĝi estas grava eraro kredi, ke sufiĉas scio, por ĝia praktikado. Kiu sekvas la kreskadon de infano, ido ĉu de riĉulo, ĉu de malriĉulo, de post ĝia naskiĝo, observante ĉiajn malutilajn influojn, kiuj agas sur ĝin pro la malforteco, senzorgeco kaj neklereco de ĝiaj direktantoj, vidante kiel ofte la rimedoj uzataj por ĝia moraligo tute maltrafas, tiu ne povas miri pro tiom da malbonaj flankoj en la socio. Oni faru por moralo tiom, kiom oni faras por intelekto, kaj oni vidos, ke, se ekzistas rezistemaj naturoj, estas ankaŭ aliaj, cetere multe pli, ol kiel oni kredas, kiuj atendas nur bonan kulturadon por produkti belajn fruktojn.”¹

La tuta enhavo de la „Libro de la Spiritoj” havas – krom filozofia – profundan, edukan senco. Kelkaj instruoj, aŭ sentencoj de la Spiritoj povus esti traktataj eĉ kiel temo de vastaj pedagogiaj diskutoj kaj pristudoj, ĉar klare respegulas problemojn de socio en la tempoj de Rivail kaj – paradokse – ankaŭ nun:

• **Pri sociaj leĝoj:** „Malbonhumora socio certe postulas pli severajn leĝojn; bedaŭrinde, tiuj leĝoj celas prefere puni jam faritan malbonon, ol elsekigi ties fonton. Nenio alia ol edukado povas reformi la homojn; tiam, ili ne plu bezonas tiel rigorajn leĝojn.”²

• **Pri morala edukado:** „(...) socio estas ofte la primara kaŭzo de tiaj eraroj;³ krom tio, ĉu ĝi ne devas prizorgi la

¹ Samloke, p.406-407.

² Samloke, p.358.

³ Falo en forlason kaj mizeron pro sia propra kulpo.

moralan edukadon? Ofte nenio alia ol malbona edukiteco falsas la rezonadon de tiuj homoj, anstataŭ sufoki ties pereigajn inklinojn."¹

• **Pri egoismo:** „*Ju pli la homoj sin instruas pri la spiritaj aferoj, des malpli ili ŝatas la materiajn aferojn; estas ankaŭ necese reformi la homajn konvenciojn, kiuj tenadas kaj eks-citas egoismon. Tio dependas de edukado.*”²

Estas interese rimarki paralelojn kaj intimajn ligojn inter la tekstoj verkitaj de la sama persono, kvankam en du vivperiodoj – ŝajne funde diferencaj, sed videble bazantaj sur la samaj, instruaj, aktualaj en ĉiuj cirkonstancoj idealoj. Indas do prikonsideri ideojn kaj agojn de la estonta kodiginto de la spiritisma doktrino, en kunteksto de lia posta aktivado. La doktrino mem enhavas ja amason da edukaj valoroj.

Famaj pedagogoj en la kariero de Rivail

La gepatroj Rivail elektis al sia filo la edukejon de J.H.Pestalozzi, verŝajne ankaŭ (krom la supre menciitaj kialoj) post lego de la libro „Spirito de la edukmetodo de Pestalozzi, sekvata kaj praktikata en la Instituto de Edukado en Yverdon, en Svislando”, Ĝi estis eldonita en 1812 de Marc-Antoine Jullien de Paris, kiu dum ses jaroj studis ĝuste en Yverdon kaj kelkfoje helpadis al J.H.Pestalozzi finance. Siatempe li loĝis en Lyon – la naskiĝurbo de H.L.D.Rivail, do povas esti, ke ili konis unu la alian. Ankaŭ M.-A.Jullien de Paris estas rekonata kiel fama pedagogo. Li naskiĝis en 1775 en Francio. Fininte elementan lernadon li komencis en Anglio studojn pri diplomatio, kaj ekde la 18-a jaraĝo li sekvis militistan karieron, kio estis utila interalie dum la Franca Revolucio. Liaj interesoj estis tre vastaj: ĵurnalismo; verkado; edukistaj aferoj; vojaĝoj tra Egiptio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svislando. En 1794, M.-A.Jullien de Paris

¹ A.Kardec: La libro..., ver.cit., p.365-366.

² Samloke, p.404.

estis elektita kiel membro de la Plenumkomisiono pri Publika Edukado. En 1817 li eldonis anonime la libron „Skizoj kaj antaŭpreparo al la laboro pri kompara edukado” (poste reel-donitan sub lia nomo, kun ŝanĝita titolo), enhavantan la unuan en la mondo programon de esploroj, celantaj kompari diversajn eduksistemojn, kio gvidus al plialtigo de nivelo de la franca edukado per uzo de la plej bonaj modeloj ekzistantaj en aliaj landoj. Pro tio li estas nomata „la patro de kompara pedagogio”. En tiu ĉi verko M.-A.Jullien de Paris proponis, ke oni kolektu ĉiujn eblajn informojn, kiuj permesos difini kaj priskribi regulojn de instruado kaj edukado – kio helpas pritaksi la eduksistemon ekzistantan en certa lando. Liaj konsideroj aperis danke al profunda pripenso de stato de liatempaj eduksistemoj: „*Ĉiu pensanta homo, kiu observas la staton de moralo en diversaj landoj de Eŭropo, ĉagrenita konstatas, ke edukado, kiun nun ofertas familio kaj publika eduksistemo, estas ofte nekompleta, erara, sen reciprokaj ligo kaj konformeco de ĝiaj sinsekvaj gradoj; sen harmonio inter la fizika, morala kaj intelekta sferoj de edukado, formado de kiuj devus esti submetita al iu komuna celo; fine, ĝi ne respondas al realaj bezonoj de infanoj kaj gejunuloj, same rilate al sociaj postuloj, kaj ankaŭ al bezonoj de nacioj kaj registaroj.*”¹ Bedaŭrinde, pro manko de interesatoj kaj materiaj rimedoj, la plano de M.-A.Jullien de Paris ne estis realigita. En 1818 li kreis la „Enciklopedian Revuon”, kaj en 1830 fondis en Parizo kelkajn orfejojn, edukejojn kaj lernejon por plenkreskuloj. Indas menci, ke H.L.D.Rivail mem uzis la duan eldonon de la verko de M.-A.Jullien de Paris pri la metodo de J.H.Pestalozzi. Ĝi aperis en 1842, do ĝuste en la momento, kiam H.L.D.Rivail mem praktikis la edukarton.

La plurfoje menciita supre Pestalozzi estis svisa verkisto kaj pedagogo, kiu elpensis programon de progesa disvolvado de homaj fakultoj, samtempe entuziasme propagandante

¹ M.-A.Jullien de Paris: *Esquisse d'un ouvrage sur l'éducation comparée.* Bureau International d'Éducation, Genève 1962, p.5.

kaj praktikante instruadon al malriĉuloj. Studinte en Zürich teologion, juron kaj agronomion, li kreis en Neuhof institucion ligitan kun farmbieno, destinitan al orfoj kaj forlasitaj infanoj. En 1799 li laboris kiel instruisto de popola lernejo en Burgdorf, kie li finkompilis originalan metodon de edukado de junaj infanoj. Unu jaron poste Pestalozzi kreis tiesian propran edukejon kaj porinstruistan seminarion, kiun oni translokis al Münchenbühse kaj Yverdon. Li opiniis, ke ĝusta edukado de homo eblas nur kiam ĝi okazas en la medio libera de individua kaj socia egoismo. Lia opinio, teoria scio havas sian valoron, nur kiam oni scipovas uzi ĝin praktike. Tiuj ĉi reguloj transformis lernejon en lokon amikan al infanoj. Pestalozzi atribuis gravan rolon al preciza preparo de instruisto (precipe el psikologia vidpunkto), al valoroj de edukado en familio kaj al rolo de virinoj en tiu proceso.

Parolante pri la lernejo en Yverdon, fakte necesus nomi ĝin edukcentro. Ĝia ĉirkaŭaĵo estis belega: pitoreska lago ĉirkaŭata de poplaj aleoj – ĉio instiganta al promenadoj en freŝa aero kaj al naĝekzercoj. En sufiĉe granda kastelo troviĝis mezlernejo por knaboj, instruista seminario kaj instituto por knabinoj. En la seminario disvolvadis siajn kapablojn 188 geinstruistoj el diversaj landoj. Pri graveco de tiu ĉi loko atestas vizitoj interalie de la prusa, la nederlanda kaj la hispana reĝoj kaj de la rusa caro. La centro disvolviĝadis sufiĉe bone, kaj en la periodo 1807-1812 loĝis tie ĉi ĉirkaŭ 200 gelernantoj. Poste la centro komencis faladi: aperis materiaj malfacilaĵoj, inter instruistoj aperis kvereloj. Svisoj (ĉefe katolikaj pastroj) atakadis la direktoron, akuzante lin, ke en mezlernejo li mekanike imitas metodojn de elementaj studoj, kio malaltigas nivelon de edukado. Eksterlandaj gelernantoj ofte havis problemojn kun lernado, ĉar ili ne sufiĉe bone regis la germanan kaj la francan lingvojn, kiuj estis uzataj dum lecionoj. J.H.Pestalozzi ĉagrenita de problemoj kun siaj kunlaborantoj, finfine forveturis en 1824 al sia centro en Neuhof. Unu jaron poste, la lernejo en Yverdon estis fermita. Ĝia kreinto mortis malsana kaj tute forgesita en 1827.

En la enkonduko al la „Praktika kaj teoria kurso...” aperinta jam post la morto de Pestalozzi, Rivail tiel aludis pri sia majstro: „*Li okupiĝis pri infano tuj, kiam ĝi forlasis la brakojn de naturo, por akompani ĝin en ĝia evoluo. Li observadis la manieron, en kiu disvolviĝadis ĝiaj imagoj, studadis ĝiajn bezonojn kaj kapablojn. Sekve, surbaze de pluraj observoj li kreis metodon, kiu strebas precipe al utiligado de ĉiuj kapabloj, kiujn la infano ĉerpis el naturo, kio permesos al ĝi ĝuste taksu realecon kaj akiri kutimon de ordigado de siaj imagoj.*”¹ Li skizis ankaŭ la ĉefajn regulojn de la metodo de Pestalozzi:

„*1. Formi ĉe infanoj naturan observosentumon, direktante ilian atenton sur la objektojn, kiuj ilin ĉirkaŭas.*

2. Formi inteligentecon, akompanante lernanton survoje al memstara malkovrado de reguloj.

3. Ĉiam transiri de konata al nekonata, de afero simpla al komplika.

4. Eviti ĉiun mekanikecon, danke al klarigado al lernanto pri la celo kaj kialo de ĉio, kion li faras.

5. Kontroli, ke li esploru per fingro kaj okulo ĉiujn verojn.(...)

*6. Ne lasi al memoro tion, kion oni ne povas kapti per inteligento.”*²

Rivail proponis tamen ligi la metodon de Pestalozzi kun la klasika metodo de instruado. Krome, li aprobis kaj varme rekomendis uzadon de didaktikaj helpiloj. En la „Praktika kaj teoria kurso...” li skribis: „*Prezentu kvinon al persono, kiu ne scias ciferojn. Ĉu ĝi scias, per si mem, la nombron, kiun oni volas tiel prezenti? Sed prezentu al ĝi kvin fingrojn, kvin ŝtonojn, kaj ĝi tuj priskribos ilian kvanton. (...) Tiel okazas, ĉar aritmetiko devas esti traktata ne nur kiel scienco, sed kiel rimedo por disvolvi racion de infano, rimedo de formado de*

¹ H.L.D.Rivail: Cours Pratique et Théorique d'arithmétique, d'après la méthode de Pestalozzi, avec modifications. Imprimerie de Pillot Aîné, Paris 1824, vol. I, p.77.

² H.L.D.Rivail: Cours Pratique..., ver.cit., p.xij-xiij.

ĝia pritakso kaj de al kutimigo al precizemo.”¹ Siajn spertojn kun la svisa majstro, H.L.D.Rivail mencias – laŭ A.Moreil – ankaŭ en la „Traktato pri pedagogio”.

Unu el la personoj, kiuj grave influis la estontan agadon de H.L.D.Rivail estis ankaŭ Alexandre Boniface – tre lerta instruisto, gramatikisto kaj verkisto, kiu instruis en Yverdon en la periodo 1814-1817, aprezata kiel sperta fakulo pri franca kulturo. En la „Praktika kaj teoria kurso...” lia lernanto tiel priskribas sian majstron: „(...) *Sinjoro Boniface, disĉiplo de Pestalozzi, la instruisto distingiganta ne nur pro sia erudicio, sed ankaŭ pro sia instrualento. Neniu pli bone ol li posedos la arton de amikeco; mi eĉ diros pli – la arton esti adorata de gelernantoj. Li estis unu el miaj unuaj majstroj kaj mi ĉiam memoros la plezuron, kun kiu mi kaj miaj kunlernantoj frekventadis liajn lecionojn. Plena de amo al infanoj, penetrta de vera filantropio, li kreis lernejon ĉe la strato Tournon, en antaŭurbo Saint-Germain, prave meritantan laŭdojn, kiujn esprimis pri ĝi eĉ la plej eminentaj personoj. Li estas la aŭtoro de pluraj verkoj, inter kiuj la plej estiminda estas la «Kurso de linia desegnado».*”²

Boniface fondis en 1822 la menciitan unuagradan lernejon, bazitan sur pestalozziaj principoj (pri kiuj li fervore propagandis en Francio), adaptitaj al kondiĉoj de la franca edukistemo. La lernejo akiris vere bonegan reputacion. Ekde 1826 kunlabore kun Claude-Lucien Marle, A.Boniface publikigis la „Gramatikan kaj Didaktikan Ĵurnalon de la Franca Lingvo”, en kiu aperigadis siajn verkojn membroj de la kunfondita de li Gramatika kaj Literatura Societo de Parizo. Li verkis plurajn grandsukcesajn librojn pri gramatiko, en kiuj li strebis subteni propagandon de uzado de simpligita ideologia analizo. La didaktika verko „Skizo pri la franca gramatiko...” en la periodo 1829-1873 havis dek naŭ reeldonojn! A.Boniface postulis, ke la franca gramatiko estu

¹ Samloke, p.xiv kaj poste.

² Samloke, p.x.

bone komprenebla ne nur al fakuloj, sed ankaŭ al simplaj homoj, kiuj devus klare scii ĝiajn regulojn. Aliajn literaturajn verkojn li kreis laborante interalie kun D.E.Lévi-Alvarès, kun kiu kunlaboris ankaŭ H.L.D.Rivail.

Estas malfacile diri, ĉu H.L.D.Rivail lernis ĉe A.Boniface en Parizo. Tamen certe S-ro Boniface instigis lin verki la „Praktikan kaj teorion kurson de aritmetiko...”, liverante la ideon kaj multajn konsilojn. Ankaŭ li grave kontribuis al la dua volumo de tiu ĉi verko per ideoj por ties ekzercaro.

En la sama teksto Rivail esprimas sian dankon ankaŭ al Sinjoro Ampère – membro de Universitato, kiun li informis pri sia ideo. Temas pri André-Marie Ampère – la fama fizikisto kaj matematikisto, siatempe unu el la plej kleraj instruistoj, kiu devenis ankaŭ el Lyon, kaj kies filo estis preskaŭ samaĝa kiel H.L.D.Rivail. Wantuil aldonas, ke ekde 1808 A.-M.Ampère estis la ĝenerala inspektoro de la Universitato. Tiu ĉi funkcio devigis lin interesiĝi pri ĉio, kio rilatis al konduto kaj progreso de gelernantoj kaj instruistoj en ĉiuj parizaj edukejoj. Ne estas do mirige, ke ĝuste al li, la dekokjaraĝa H.L.D.Rivail dediĉis sian unuan verkon. Krome li apartenis al la Societo de Elementa Instruado kreita ĝuste de A.-M. Ampère, kies celo estis liveri al popolo la intelektan kaj moralan edukitecon konforman al ĝiaj bezonoj.

La biografoj de H.L.D.Rivail mencias ankaŭ lian kolegon nomatan Lévi-Alvarès, kun kiu li kunlaboris preparante diversajn publikigaĵojn. Kvankam tiuperiode aktivadis kelkaj pedagogoj kun tiu ĉi nomo, tucerte temas pri David Eugène Lévi-Alvarès, kiu naskiĝis en Bordeaux en 1794 en juda familio, kaj estis edukata en Choisy-le-Roi. Iom da tempo en 1814 li pasigis en militservo, estante soldato de la 10-a linia regimento en Italio. Reveninte hejmen li dediĉis sin al libera instruado, donante privatajn lecionojn kaj speciale interesiĝante pri instruado de virinoj. Li kreis propran instrumentodon, kiu estas konata sub lia nomo. Ĝi celis plialtigi instrunivelon de junulinoj, variante kaj multobligante objektojn de iliaj studoj. En 1825 D.E.Lévi-Alvarès kreis en Parizo kurson

pri baza instruado, kiu iĝis tre populara. En tiu ĉi agado helpis ankaŭ lia filo. En 1832 kunlaborante kun iu S-ro Tourneau, sub aŭspicioj de la Magistrato li kunfondis kurson por instruistinoj. Verŝajne en iu(j) el tiuj ĉi entreprenoj partoprenis ankaŭ H.L.D.Rivail, kiel amiko kaj kunlaboranto de D.E.Lévi-Alvarès – eble faris tion ankaŭ S-ino Rivail. Pro siaj meritoj, la 10-an de januaro 1837, D.E.Lévi-Alvarès ricevis la Honoran Legion. Kreinte la menciitan instruometodon, li bezonis specialan materialon. Tiucele, li verkis plurajn teoriajn legaĵojn kaj lernolibrojn, el kiuj kelkaj estis aprobitaj de la ĉefepiskopo de Parizo. La plej ofte citataj estas la verkoj: „Klasika Mnemozina” (1826), „Novaj elementoj de ĝenerala historio” (1829), „Skizajoj pri historio” (1830), „Patrino instruistino” (1834-36 – trivoluma), „Progresigaj legaĵoj” (1838-40 – kvarvoluma), „Imagoj pri sciencoj” (1844), „Normalaj diktaĵoj de ekzamenoj” (1849 – kun H.L.D.Rivail), „Lernolibro de historio pri antikvaj popoloj” (1854), „La franca literaturo” (1858). D.E.Lévi-Alvarès mortis en 1870. En lia familio estis pluraj pedagogoj, el kiuj menciataj estas ankaŭ almenaŭ lia filo kaj nevo.

Proponita plano
por plibonigo de
publika edukado

verkita de

H.L.D.Rivail

disĉiplo de Pestalozzi,
estro de institucio de la Akademio de Parizo,
membro de pluraj sciencaj societoj.

*La rimedoj necesaj por eduki
junularon, konstituas tre karakterizan
sciencon, kiun oni devas studi por iĝi
instruisto, same kiel oni studas
medicinon por esti kuracisto.*

Parizo
Dentu, Eldonejo, ce la Rega Palaco
Kaj ce la aŭtoro, Strato Vaugirard, N-ro 65.
1828

Proponita plano por plibonigo de publika edukado

Ĉiuj parolas pri graveco de edukado; sed tiu ĉi vorto posedas al plimulto ekstreme nebulan signifon, ĉar ekzistas malmultaj personoj, kiuj trafe povus priskri bi la ideojn, kiujn ĝi ampleksas. Ĝenerale oni renkontas ĝin parolante pri stud-sistemo, kaj tiu ĉi eraro estas unu el la plej oftaj kaŭzoj, pro kiu la afero tiom malmulte progresis ĝis nun. La alia kialo de tiu ĉi malfruigo, koncernas ofte negativajn antaŭjuĝojn, kiujn oni atribuas al instruista profesio, kio forigas de ĝi amason da personoj, kiuj meritplene povus kontribui al ĝia progreso.

Edukado estas la arto formi homojn; tio estas la arto permesanta disflorigi ĉe ili ĝermojn de virto kaj sufoki tiujn de malico; disvolvi ilian inteligenton kaj doni al ili propran al iliaj bezonoj instruon; fine, formi korpon kaj doni al ĝi forton kaj sanon. Unuvorte, la celo de edukado konsistas el samtempa disvolvado de psikaj, fizikaj kaj intelektaj fakultoj. Jen, kion ĉiu ripetas, sed tute ne realigas. La unuan kaŭzon de tio, necesus serĉi en la nescio rilatanta al rimedoj necesaj por tiu ĉi disvolvado. Ĉu oni faros kuraciston el iu persono, instruante al ĝi, ke ĝi devas kuraci siajn malsanulojn? Same, ĉu oni povus fiere opinii sin kapabla formi homojn, nur sciante, ke oni devas formi ĉe ili koron, menson kaj korpon, sed sen scii kiamaniere eblas tion akiri? Sur tiu ĉi kampo, kiel sur ĉiu alia, ne sufiĉas nur scii la celon, kiun oni deziras atingi; necesas ankoraŭ koni la vojon, kiu al ĝi gvidas. Ĉu la aktuala edukosistemo povas tien konduki? Kiuj estas la aperantaj obstakloj? Kiuj estas la rimedoj por kontraŭstari ilin? Jen estas la tri problemoj, kiujn mi pritraktos unu post la alia, provante montri, ke rilatoj inter tiuj ĉi tri elementoj estas tiom fortaj, ke oni ne povas esperi pri vera progreso tiurilate, ĝis kiam oni finfine ne komprenos la bezonon de agado sur pli vasta tereno. Mi opinias necesa, unue prezenti la regulojn,

kiujn mi mem proponas enkonduki, kaj kiujn mi tuj priskribos.

La fonto de psikaj kvalitoj troviĝas en la impresoj, kiujn infano ricevas ekde sia naskiĝo, eble e ankaŭ pli frue; kaj kiu povas agadi kun pli a malpli da energio surĝian menson, por bono aŭ por malbono. Ĉion, kion ĝi vidas, ĉion kion ĝi aŭdas, ĝi deziras elprovi. Same, kiel la intelektan edukon kunkreas sumo de akiritaj ideoj, tiel la psika edukado estas sekvo de ĉiuj ricevitaj impresoj. Ĉiu objekto, kiun infano vidas, donas al ĝi iun ideon; kaj ĉiu vorto, kiun ĝi aŭdas, aĉiu agado, kies celo ĝi estas aĉeestanto, permesas al ĝi eksperti iun impreson; la sama impresado, subtenata dum pli longa tempo kaj ofte ripetata, naskasĉeĝi kutimon. Kiel oni scias, kutimo estas la dua naturo, deviganta nin malgraŭ nia volo fari ion, en kio plej ofte nia volo ne partoprenas; krome ekzistas tio, kion oni nomas niaj *inklinoj*, kiuj estas nenio pli ol enradikigitaj kutimoj, kiam ne dependantaj de nia temperamento: koleremo, vigleco, trankvileco kaj aliaj tiuspecaj sintenaj inklinoj. Neniu dubas pri la influo de certaj kutimoj sur funkciadon de organismo: tiuj respondecas pri malgraŭvolaj movoj, aŭ neperdeblaj sintenoj. La kutimoj iĝas fine nedetruiblaj, ĉar organismo akiris iun fermitan pozicion, kiun oni permesas al ili surprizi, kaj kiuj estas vere firmaj. Eĉ se ĉiuj kutimoj ne estus la efikoj de ekstera agado, sur ilin agadas ankaŭ iu interna kaŭzo, donanta al individuo tian aŭ alian impulson, same malgraŭvolan, al kiu oni ne povas rezisti, kaj kiu sin manifestas eksteren en paroloj kaj agado.

Ekzistas kutimoj de tri diversaj naturoj: fizikaj, intelektaj, aŭ psikaj. Ĝuste la unuaj influas funkciadon de nia organismo; la duaj konsistigas pli aŭ malpli bonan posedon de iu instruo. Ekzemple iu, kiu estas tre alkutimita al iu lingvo, parolas ĝin sen peno kaj mekanike; iu, kiu perfekte scias matematikon, same faras siajn kalkulojn senpene: eblas nomiti al kutimiĝo al iu scio; intertempe oni povas ankaŭ menciigi, ke tiun ĉi kutimon eblas akiri laŭ ordinaraj metodoj; ĝenerale, oni evitas tro pasemajn teoriojn, kiuj nur tuŝetas re-

zonkapablon. Kaj fine la psikaj kutimoj estas tiuj, kiuj devigas nin malgraŭ nia volo fari ion, bonan aŭ malbonan. La fonto de tiuj ĉi lastaj kutimoj troviĝas, kiel ni diris, en longdaŭre resentataj impresoj, aŭ tiuj ĉi akiritaj en infanaĝo. Oni povas imagi laŭ tio, kiom gravas delikate evitigi al infano ĉion, kio povus doni al ĝi danĝerajn impresojn; tamen mi pensas tie ĉi ne nur pri la malbonaj impresoj, kiel tiuj de deviaĵoj, malbonaj konsiloj, aŭ kvereloj; neniu dubas pri la negativa influo de tiuj ĉi kaj similaj modeloj, kaj oni ne trovas patrinon, kiu ne provas forigi ilin de sia infano. Ekzistas tamen ankaŭ amaso da aliaj faktoroj, unuavide multe pli subtilaj, kiuj okazigas certe pli malbonfaran influon, ol abomenaj ekzemploj de mankoj de karaktero, kiujn foje oni povas eĉ utiligi, por timcele elmontri malbonan agadon. Mi deziras paroli precipe pri la impresoj, kiujn infano ricevas rekte dum siaj rilatoj kun personoj, kiuj ĝin ĉirkaŭas; homoj, kiuj donante al ĝi nek malbonajn ekzemplojn, nek malbonajn konsilojn, foje intertempe provokas tre gravajn sekvojn, kiel ekzemple gepatroj kun sia cedemo, ĉu patrinoj kun nepravigebla troa severeco. Per sia agmaniero oni influas karakteron de infano kiam oni ekzemple: cedas antaŭ ĝiaj trudaj postuloj; toleras erarojn pro iu ajn preteksto; permesas al ĝi konstati, ke oni estas viktimoj de ĝiaj ruzajtoj; ne scias malkovri la kialojn, kiuj igas ĝin agi; malbonajn agojn opinias virto, kio ofte okazas al gepatroj; ne konscias subtilajn cirkonstancojn, kiuj povus modifi tiun aŭ alian agadon de infano – kaj precipe, kiam oni ne distingas diversajn nuancojn de karaktero, permesante al infanoj kolekti eĉ reciproke kontraŭajn impresojn, kio ofte estas ĉe ili la fonto de tre gravaj malbonaĵoj. Rideto, kiam necesas esti serioza; cedemo, kiam necesas agi firme; severo, kiam bezonata estas kvieta ago; nepripensita parolo – fine io ajn, sufiĉas foje por provoki neforigeblan impreson kaj kreskigi deviaĵon de karaktero. Kio do okazas, kiam tiuj ĉi impresoj estas resentataj ekde infanaĝo, kaj foje dum tuta junaĝo? Tiurilate unu el la plej gravaj aferoj por konsideri en edukado, estas punsistemo; ĉar

ofte ĝuste punoj estas la fonto de plimulto de eraroj kaj mankoj. Ofte tro severaj aŭ aljuĝataj partiece, ĉu depende de humoro, ili iritas infanojn, anstataŭ ilin konvinki. Kiajn ruzaĵojn, kiajn rimedojn de kontraŭstaro, kiajn trompojn uzas infanoj por eviti la punojn! Tiel oni semas ĉe ili malbonan volon kaj hipokritecon, kio ofte gvidas nur al ĝuste tia rezulto. Infano koleras, iĝante nepersvadebla kaj obeas nur post uzo de forto; nenio pruvas al ĝi, ke ĝi malbonagis; ĝi scias nur tion, ke ĝi agis ne konforme al volo de ĝia instruisto; kaj tiun ĉi aferon ĝi perceptas ne kiel justecon kaj racian agadon, sed kiel kapricon kaj tiranaĵon; ĝi opinias sin ĉiam submetita al arbitro de iu alia. Kiam oni sentigas al infano pli da fizika ol psika supereco, ĝi senpacience atendas la momenton, kiam ĝi estos sufiĉe potenca por kontraŭstari ĝin: de tie venas la malamika etoso, kiu regas inter instruistoj kaj iliaj gelernantoj. Inter ili ekzistas nek iu ajn reciproka konfido, nek liĝiĝo; kontraŭe, okazas daŭra interŝanĝo de ruzaĵoj; ili konkurencas, kiu estos pli sprita por surprizi la alian; kaj oni bone scias, kiu gajnas pli ofte. Ili estas du partioj, kiuj eĉ ne estante en stato de milito, daŭre minacas unua la alian. Kiel do en simila situacio, eblas okazigi bonan edukadon?

Serĉante kiel eble plej senteblajn punojn, oni ofte renkontas precizemon, eĉ arton – kaj tre ofte, mi povas diri, eĉ iun malicon. Mi ne diros, ke tio ĉi estas eraro, sed la afero estas proksime al absurdo kaj nescio. Ĉar jen, vi, kiuj deziras ŝatigi al aliaj laboron kaj virton, vi montras tion per pinto de batilo! Vi, kiuj devus akiri la konfidon de viaj gelernantoj; kiuj devas esti ilia dua patro – vi aperas pedantece kaj antipatie, armitaj de vergo aŭ vipilo; kiuj diradas al ili: Fidu min, mi amas vin kiel miajn proprajn infanojn, ne hezitu malkovri viajn kulpojn, ĉar mi korektos vin nur por via bono. Vi, kiuj devas inspiri ilin per noblaj sentoj, kaj anstataŭ tio metas sur iliajn fruntojn rezervitajn al krimuloj hontmarkojn! Kaj kial? Pro tio, ke iu malbone pritraktis iun temon, aŭ ĝian nuancon. Jen, tiamaniere oni volas instrui al infanoj bonon kaj mildecon; donante al ili ekzemplon de propraj pasioj, de bru-

taleco kaj malico, oni deziras instrui al ili ami laboron kaj virton! Estas vere, ke tiu ĉi barbara sistemo ĉiutage malpli-fortiĝas; tamen ĝi ekzistas ankoraŭ hontiga al edukado. Ĉu oni ne renkontas ĉiutage la instruistojn, kiuj sin forgesante, propramane torturas siajn gelernantojn, samtempe protestante kontraŭ la sistemo de vippunoj? Mi mem jam opinius tiun ĉi sistemon pli bona, se oni devus elekti; ĉar tiukaze instruisto uzas la solan rimedon, kiun li scias; li uzas ĝin, ĉar lia nescio ne permesas al li ekkoni pli bonajn rimedojn; li uzas ĝin ofte sen kolero; ĉe tiu alia menciita tamen, ĝi rezultas el senpacienco, brutalo, koleremo kaj kelkfoje malmamo.

Aliaj rimedoj, kiujn oni aplikas ĝenerale, same estas malefikaj, kaj kvankam ne tiom perfortaj, ili provokas priplo-rindajn sekvojn. Por puni infanojn, oni uzas ekzemple puntaskojn,¹ tio estas: por ke infano ekamu laboron, oni punas ĝin per ĝi; tute same estus, se oni dezirus amigi vipadon. Ili estas mallaboremaj, *puntaskoj*; ili mensogas, *puntaskoj*; ili tro moviĝas, *puntaskoj*; ili estas tro silentaj; denove *puntaskoj* kaj ĉiam *puntaskoj*. La puntaskoj iĝis universala panaceo kontraŭ ĉiuj psikaj malsanoj. Tiuspeca puno ne nur sekve malŝatigas laboron kaj alkutimigas al malbonaj agoj; sed, kiam infano estas tro ŝarĝita de iu okupo, ordonante kiun oni ofte nek prikalkulas tempon, nek cerbumas pri plenumebleco, ĝi nature estas instigata uzi amason da perfidaj rimedoj, por trompi konfidon de instruisto; kaj tiuj ĉi rimedoj estas plej ofte efikaj. Jen la fonto de mallojaleco, trompoj, hipokritajtoj, al kiuj infano estas puŝata dum preskaŭ ĉiu kurso en siaj klasikaj studoj. Mi neniam finus, dezirante elnombri ĉiujn variaĵojn de punoj kaj priskribi iliajn bedaŭrindajn sekvojn, kiam oni uzas ilin malbone; sed mi citus tie ĉi ankoraŭ unu el ili, kiu estas ofte uzata en hejma aktivado, kaj pravas, kiom malmulte oni pripensas la aplikatajn rimedojn. Tre ofte

¹ Puntaskoj - (latine pensum - tasko, laboro) ĝi estis suplementa laboro trudita al lernantoj kiel puno. (noto de la tradukinto)

oni uzas la punon per malpermeso al infanoj de iuj frandaĵoj, je kio ili estas tre sentemaj; foje ankaŭ bombonoj estas objekto de avido, kvazaŭ instigilo. Ĉu ne estas evidente, ke tia maniere oni donas al ili veran lecionon de frandemo; lecionon, kiun ili uzos eĉ tiugrade, ke estos necese puni ilin pro la mem kaŭzita kialo? Mi elnombris tiujn ĉi ekzemplojn; ekzistas tamen ĉu en la edukado publika, ĉu en la privata, amaso da cirkonstancoj, kiujn oni ne pripensas, kaj kiuj estas la fonto de malbonfaraj impresoj, provokantaj la plejparton de deviaĵoj kaj difektoj; impresoj, kiuj ĉiam rezultas el manieroj kunesti kaj agadi rilate al infanoj.

Kion do devas fari instruisto? Kun la plej granda atento li devas konsideri ĉion, kio povus impresi infanojn; per sia sperto kaj antaŭvidemo, li devas scii enkalkuli eventualajn sekvojn; li devas direkti la cirkonstancojn. Li ne rajtas forgesi eĉ pri siaj etaj vortoj, eta aktivado; pri la tono, kun kiu li parolas ĉe iu aŭ alia okazo; eĉ pri la esprimo, kiun li donas al sia fizionomio; pri maniero aljuĝi punojn kaj rekompencojn; pri naturo de la puno kaj pri ĝin akompanantaj cirkonstancoj; pri scenoj el vivo, kiujn infano ĉeestas; pri firmo aŭ cedemo, kiun oni montras al ĝi. Laŭ mi, li ne rajtas forgesi, ke ĉiuj ĉi cirkonstancoj postlasas foje tre profundajn impresojn.

En certaj kazoj, estus pli bone ne puni; simpla amika rimarko, ekzemplo prezentita trankvile aŭ energie, konforme al situacio, eĉ nura rigardĵeto, foje estas pli efikaj ol puno. Tio dependas de karaktero de infano; de ĝia aĝo; de cirkonstancoj, kiuj povus dependigi la rimedon, uzatan pli aŭ malpli energie; kaj de amaso da nedifineblaj kaŭzoj, kiujn tamen sperta instruisto devas konsideri, enkalkuli kaj antaŭvidi.

Patrino estante la unua instruistino de sia infano, perceptas la unuajn signojn de ĝia inteligenteco aŭdante ĝiajn respondojn je demandoj, kontentigante ĝiajn unuajn bezonojn; de ŝi dependas direktado de unuaj psikaj impresoj. Farante tion malbone, kun ĝena febleco aŭ nescio, ŝi penigas tiujn, kiuj estos ŝarĝitaj ripari ŝiajn erarojn – kiuj foje ne povas tion fari eĉ plenaj de bonvolo, ĉar aŭ oni konvene ne kunlaboras kun

ili, aŭ detruas tion, kion ili faris, aŭ simple pro tio, ke la malbonaj sekvoj estas tro forte enradikiĝintaj.

Sed oni demandos, ĉu eblas atribui ĉiujn damaĝojn al la agado de gepatroj kaj instruistoj? Ĉu ne necesus enkalkuli ankaŭ difektojn de infanoj, kiun ili ŝajne alportas denaske? La karakterojn tiom malbonmorecajn, ke ili ŝajnas denaskaj, kaj ne provokitaj de la socio, en kiu la infano ekkreskis, kaj kiujn oni vane forigas per ĉiuj eblaj rimedoj? Ĉu oni ne renkontadas ĉiutage infanojn edukitajn kun la plej granda atento, kiuj neniam lasadis siajn gepatrojn, kaj kiujn tamen karakterizas la plej malbonaj trajtoj; kaj aliajn, kontraŭe, rezistantajn kontraŭ malbono, kvankam estas de ĝi ĉirkaŭataj? Ĉu ne estas evidente, ke en tiaj kazoj plejparte agas naturo? Aliflanke, ne akceptante la neceson uzi ĉiujn rimedojn por formi moralon de infano, necesas agnoski, ke estas multaj difektoj, kiuj forpasas kun aĝo, kaj ke preskaŭ senfina influo de impresoj, ne ĉiam havas en estonteco tiom gravajn sekvojn, kiom vi opinias. Jen estas la konsideroj, kiujn oni kelkfoje prezentis al mi; mi provos je ili respondi.

Certe ekzistas difektoj, kiuj forpasas kun aĝo; tio tamen ne estas la kialo por toleri ilin; ĉar kvankam ili havas malpli grandajn sekvojn, ili povas konduki al pli gravaj deviaĵoj, pli facile provokante danĝerajn impresojn. Ili havas la saman bazon, kiel ideoj – tiuj, kiuj kontentigas niajn pasiojn aŭ nian memamon, malfacile perdeblaj, fortikiĝas kun aĝo estante malpli rimarkeblaj; tiel okazas, ĉar racio ellernis la arton kaŝi ilin kaj foje kovri per iu ĉarmeca vualo. Se oni funde esplorus ĉiujn aktivaĵojn de homo, eĉ tiujn, kiuj okazas en la mondo de honestaj personoj, oni rimarkus kiom ofte ili helpas sin per falsaĵoj, malhonesto, mensogo, hipokriteco; kiom da fojoj, por kontentigi sian memamon aŭ siajn pasiojn, ili estis trejnataj fari malnoblajn kaj neakcepteblajn aferojn, kaj kiom da fojoj la sama sento damaĝis iliajn interesojn. Estas granda absurdaĵo rigardi la mankojn de infanoj kiel malgravajn, ĉar oni opinias ne gravaj la cirkonstancojn, en kiuj ili disvolviĝas. Infanojn karakterizas iu sfero, el kiu ili ne

povas foriri; estas tiel, ĉar ili ne havas ankoraŭ la rilatojn, kiuj permesas al ili fari seriozajn aferojn; ili do povas ilin disvolvi nur enkadre de tio, kion ni nomas infanaĵoj. Sed, se ni eniros tiun ĉi malgrandan sferon, ni vidos, ke la infanaĵoj estas aferoj al ili konformaj; kaj tiu, kiu nun trejnas sin en trompado por eviti puntaskon, aŭ sukcesis falsi subskribon sur atestilo pri bona konduto, ĝi poste scios apliki tion en pli seriozaj aferoj. La difektaĵoj sekve enradikiĝos pli profunde dum junularaĝo; ĝuste tiam, kiam kun energio akompananta psikan edukadon, disvolviĝas pasioj; kiam oni predikas vanan teorion, kiu kontraŭstaras naturajn inklinojn; la malbono jam estas farita kaj ofte ne eblas ĝin ripari.

Oni diras, ke ekzistas personoj, ĉe kiuj psikaj mankoj ŝajnas denaskaj. Eĉ supozante, ke tiu ĉi opinio estas vera, ne estus racie ilin neglekti, same kiel oni tiel ne agas kun nekuraceblaj malsanuloj. Sendube ekzistas iuj inklinoj, kiuj estas vere denaskaj; ili rilatas al temperamento; tiaj estas: rapidemo, malrapidemo, koleremo, rezonemo, frivoleco aŭ profundeco de ideoj. Tiuj ĉi inklinoj dependas de interna karaktero; oni naskiĝas kun temperamento, kiu igas nin agi rapide aŭ malrapide, racie aŭ malprudente; same kiel oni naskiĝas forta aŭ malforta, bela aŭ malbela. Tiuj ĉi variaĵoj estas ofte provokataj de cirkonstancoj influantaj patrinon antaŭ naskiĝo de ŝia infano, kaj samtempe de fizikaj kaj psikaj inklinoj eĉ de tutaj nacioj. Tiuj diversaj naturoj de temperamentoj, kiujn edukado povas intertempe modifi, igas infanon pli aŭ malpli preta ricevi aŭ konservi tiujn aŭ aliajn eksterajn impresojn. Kiel ĉio ĉirkaŭanta la infanon, ĉiu agado, kies celo aŭ spektanto ĝi estas, provokos impresojn tuj kiam ĝi ekvidos la mondon; estas klare, ke se tiuj ĉi impresoj posedas difektan naturon, la infano akiros same detruajn inklinojn. Tiel eblis false kredigi al oni pri denaskaj inklinoj. Eblas aldoni ankoraŭ unu opinion, nome tiun, ke certaj infanoj, kvankam konstante ĉirkaŭataj de malbonaj ekzemploj, akiras samtempe bonajn ecojn; tio venas de ilia temperamento, danke al kiu ili estas malpli senteblaj ricevante la impresojn de psika

klimato, en kiu ili troviĝas; samtempe ankaŭ ekzistas tiaj, ĉe kiuj la fizika klimato aŭ la atmosferaj impresoj, pli aŭ malpli influas ilian sanstaton.

El la ĉi-supre prezentitaj informoj, mi do konkludas, ke oni naskiĝas nek virtplena, nek malica, sed pli aŭ malpli inkliniĝanta ricevi kaj konservi impresojn permesantajn disvolvi virton aŭ malvirton; same oni ne naskiĝas majstrante iun sciencon aŭ arton, sed posedante internan inklinon akceptadi facile la impresojn, kiuj permesas ilin disvolvi en ni. Sen iel ajn prijuĝi tie ĉi la sistemon de d-ro Gall, ŝajnas al mi, ke li ne rajtas pretendi, ke infano venas sur la mondon kun jam preta virto aŭ malvirto; kaj oni same ne rajtas diri, ke la infano denaske posedas ekzemple konon de muziko – kvankam tutcerte ĝi naskiĝas kun la interna inklinado, kiu igas ĝin pli aŭ malpli kapabla ekakiri ĝin facile.

Oni do vidas, ke de gepatroj dependas bona ĉirkaŭigo de infano post ĝia naskiĝo, kio permesos lasi spacon al pozitivajn por ĝia menso kaj koro influoj, kaj forigi tiujn ĉi detruajn, same kiel oni evitas lasi ĝin sub veteraĉo. Jen la sekreto de vera psika edukado. La talento tiurilate konsistas, kiel mi jam diris, el perfekta scio ĝuste taksi efikojn de ĉiuj influantaj infanon impresoj, kaj el scio tiel organizi cirkonstancojn, ke ili provoku bonajn impresojn. Mia opinio, neniu rajtus nei tiun ĉi punkton, sendepende de ties opinio pri la unua kaŭzo de psikaj kvalitoj. Tiel do, oni ekzameni internon de familioj, por konstati plurecon de malbonaj impresoj, kiujn infanoj ricevas ofte jam de lulilo, ĉu pro malforto de sia patrino, ĉu pro malbonaj ekzemploj kaj detruaj konsiloj de kunvivantaj enhejme personoj, ĉu pro iuj aliaj cirkonstancoj; oni ekzameni ankaŭ organizsistemon de edukejoj kaj la senfinan amason da negativaj impresoj, kiuj rezultas el ĝi, aŭ el nesperto, nescio kaj brutaleco de laborigitaj tie personoj, ŝarĝitaj de edukado; de tiu amaso da duarangaj laborantoj, kiuj

venante el siaj vilaĝoj,¹ scias iom da latina lingvo kaj opinias sin pro tio kapablaj eduki homojn, kaj fari el ili perfektajn civitanojn; al tio necesas aldoni la danĝerojn de partopreno en malbona socio kun deviaj moroj, kiuj ĝenerale rezultas el nescio kaj neantaŭvidemo, provokane la plej vastajn detruojn. Ĉu do oni devas miri, ke la impresoj tiom multnombraj kaj longdaŭraj postlasas tiom profundajn sekvojn? Ĉu oni devas miri, ke kelkaj el ili estas neforigeblaj, se ili naskiĝadis ekde komenco de la homa vivo? El ili nepre rezultos tiom enradikiĝintaj kutimoj, ke ili iĝos partoj de ekzistado, sen kiuj ne plu eblos vivi, ekzemple kiel drinkemulo ne povanta forigi sian inklinon al alkoholo.

El tio, kion ni ĉi-supre rimarkigis, rezultas la konkludo, ke edukado estas speciala arto, bone distingita de ĉiuj aliaj, kiu pro tio postulas specialajn studojn; same ĝi estas ne la plej facila por studi kaj ne la plej simpla por praktiki; ĝi postulas kapablojn kaj tute specialan internan alvokon; ĝi postulas psikajn kvalitojn, donitajn ne al ĉiuj personoj, kiel paciencon kaj raciemon ĉe ĉiu provo, firmecon ligitan kun delikateco, grandan kapablon penetri karakterojn, ekstreman memregadon, volon kaj forton kontraŭstari proprajn pasiojn, kaj fine ĉiujn kvalitojn, kiujn oni deziras transdoni al junularo. Ĝi postulas krome profundan konon de homa koro kaj psika fiziologio; perfektan konon de rimedoj la plej taŭgaj por disvolvi ĉe infano psikajn, fizikajn kaj intelektajn fakultojn; kaj la specialan takton ĝuste utiligi ilin. Tiuj ĉi rimedoj, mi ripetas, devas esti studataj, same kiel oni studas la rimedojn de medicino.

Edukado, konsiderata kiel pedagogia arto, estis ĝis nun objekto de diskurso de nur malmultaj personoj, kiuj okupiĝis pri tio pro ŝato; sed estas rimarkinde, ke la plimulto el tiuj,

¹ Necesas substreki, ke nek en miaj principoj, nek en mia penso troviĝas la emo malvalorigi iun pro ĝia naskiĝo – kia ajn ĝi estus, ĉar neniu socia klaso posedas la ekskluzivan privilegion doni al la socio estimindajn personojn; mia rimarko tute ne koncernas tiun ĉi kondiĉon, sed rilatas al la instruistoj, kiuj okupiĝas pri edukado nur tial, ĉar ili ne sciis trovi iun alian okupon.

kiuj profunde studadis tiun ĉi arton, neniam praktikis ĝin. Ili same ofte limigis sin nur al aferoj pure teoriaj, malrealaj aŭ eĉ malbonfaraj – samtempe kiam la personoj praktikantaj ilin, tute ilin ne pristudis. Inter milo da personoj vokitaj al edukado, oni trovos eble nur unu, kiu legis almenaŭ kvaronon da verkoj pritraktantaj tiun ĉi temon. Tiuj, kiuj dediĉas sin al juro, ne rajtas esti advokatoj ne studinte leĝojn; oni ne konfidus sian sanon al iu, kiu opinius sin kuracisto ne studinte medicinon; kial do oni senprudente konfidas infanojn al la personoj, kiuj ne scias, kio estas edukado? Mi mem opinias (kiel instruisto, kaj ne kiel persono), ke instruisto kiu ne studis sian arton similas al ĉarlatano, kiu disvendas siajn drogojn reklamante, ke ili estas kontrolitaj de la Medicina Akademio. Mi bone scias, ke por instruo oni precize elektas ĝustajn instruistojn; sed ekzistas grandega diferenco inter instruisto kaj edukisto; la unua dediĉas sin al instruado; por bone plenumi sian taskon al li sufiĉas esti instruita kaj scii iun bonan instrumentodon; sed la dua estas ŝarĝita de kompleta disvolvado de homo, kaj al tio oni atribuas malpli grandan valoron. Se la unua estas malbona, li produktos nur nesciantojn, la dua tamen jam personojn kun deviaĵoj. Same ridinde ŝajnas al mi konfidi infanon al persono, kiu neglektas edukarton, kiel permesi esti instruisto al nesciulo. Ĉu oni opinias, ke sufiĉas traduki tekstojn de Vergilius aŭ Horatius, por eduki infanojn? Ne, mi ĉiam ripetados, ke edukado ne limigas sin nur al instruado; krom tio, ĉiuj partoj de la edukado estas tiom forte ligitaj, ke mi pensas, ke neniu iam ajn sukcesis apartigi ilin.

Fone de tio, kion oni prezentis supre, rimarkeblas, ke nia eduksistemo estas malproksima de perfekteco, kaj ke estas nekomplete trakti ĝin laŭ nura senco de tiu ĉi vorto. Inter la kaŭzoj, kiuj kontribuas al tiu ĉi malfruigo, unu estas la plej malfacile detruenda en Francio kaj ĉie alie, kaj ĝi venas, kiel mi diris tion en la komenco, de antaŭjuĝo rilatanta ĝenerale al ĉio, kio ligiĝas kun edukado; mi eĉ dirus, ke kun profesio de instruisto estas ligita iu speco de humiligo; oni neglektas

iun, kiu havas rilatojn kun infanaĝo kaj nomo de lernejo estas io malsupera kaj senvalora en la mondo. Persono, kiu okupiĝas pri grandaj interesoj ruĝiĝus havante ion komunan kun io, kion tiu opinias malkonvena al ties nivelo. Samtempe edukado estas submetita al certaj principoj kaj dependas de sufiĉe altrangaj veraĵoj; ĝi tuŝas publikajn kaj privatajn interesojn sufiĉe proksime por esti digna el ĉies vidpunkto, de meditaĵoj de filozofoj kaj leĝdonantoj; multaj el ni scias rilatajn al tio ĉi ekzemplojn; sed aŭskultu la plimulton de homoj en la mondo, kiuj parolas pri edukado; ili tamen ne trovas sufiĉe efikajn ekzemplojn, por elmontri ĝian gravecon en la socia ordo. Bonvolu rigardi, kiel ili serĉas instruiston por siaj infanoj! Kia spektaklo! Kia fiero en ilia agado! Ili apenaŭ permesas al si montri protektemecan rideton; ili ŝajnigas sin humiligitaj de rigardo al la kandidato. Vi, kiuj dediĉas vin al edukado, sendepende de la kialo, kiu igas vin tion fari, prepariĝu al elportado de ĉiuj tiuj malagrablaj, ĉiu humiligo, ĉiu malfacilaĵo, kaj ofte krom tio ankaŭ neimagebla sendankemo. Ne atendu iun rekompencan pro via eĉ la plej granda penado, krom per tiu ĉi de la kontento mem esti utila al iu alia. Ofte eĉ tiuj, al kiuj vi donis la plej grandan servon, kies infanoj plej ĉerpis el via peno, ili kontentigos vin la plej malmulte. Tre malofta estas ilia rekono de via laboro, kaj ankorau pli malofta justa pritakso de ĝi. Ĉu ekzistas instruisto, kiu ne suferis plurfoje, vidante blindecon de gepatroj rilate al iliaj infanoj? – Ĉu ili progresos? Ne dubu je tio; ili posedas vere mirigan inteligenton. Ĉu ili estas stultaj? Estas via kulpo. Ĉu vi sukcesas, danke al peno kaj pacienco, transformi ilian karakteron? Ne, ĉar ili posedas sian naturan ĉarmon. Ĉu ili estas nekorekteblaj? Vi estas la kaŭzo. Same ve al vi, se vi aŭdacos elmontri antaŭ certaj gepatroj la erarojn de iliaj infanoj. Jen kio akompanas tiun ĉi taskon. Kompreneble mi devas samtempe agnoski, ke ne ĉiuj gepatroj apartenas al tiu ĉi kategorio. Mi trovis plurajn, kiuj donis al mi tutan dezireblan kontentigon, kaj se ĉiuj estus kiel ili, edukado estus plezuro; sed, kaj mi devas tion diri pro publika intereso, ekzistas ge-

patroj, kies ridindaj postuloj, eta rezonado kaj nedankemo, multe pli ol ĉiuj eraroj de infanoj igas instruistan karieron la plej peniga. Ne en tiuj signoj de indulgo, kiuj povas nur kontentigi animojn malestimindajn kaj profitemajn, oni ricevas veran rekonon flanke de gepatroj; oni povas esti indulga rilate al ĉiu, al servisto, ĉu familiano; sed oni havas bonan konsideron nur al la personoj, kiujn oni estimas. Kiam vi ne elmontras al la instruisto de viaj infanoj la singojn de estimo, tio okazas eble pro tio, ke vi ne opinias lin digna. Kiamaniere do okazas, ke al la persono, kiu en viaj okuloj ne estas estiminda, vi konfidas la rajton transdoni noblajn sentojn al viaj gefiloj? Ĉu por vi ekzistas diferenco inter la funkcio de instruisto kaj tiu de ĉambropurigisto? Tutcerte jes, vi diros. Tiu-kaze, konsideru situacion de la personoj, kiuj tiun ĉi funkcion plenumas, ĉar dum edukado en privataj kondiĉoj, instruistoj ĝenerale estas konsiderataj kiel la unuaj servistoj, kaj en publika edukado, oni traktas ilin kiel la sekvantojn de bebprizorgantinoj. Imagu, ke ili anstataŭas vin; ke ili instruas al viaj infanoj ne bazajn kaj malsuperajn funkciojn, sed tiujn, kiujn vi mem devus instrui. Konduto de gepatroj rilate al instruisto, multe influas tiun ĉi de infanoj; ili mezuras la respekton, kiun en iliaj okuloj la gepatroj havas rilate al la instruisto; tre malofte ili permesos al si trakti malbone la personon, kiun aliaj estimas. Patroj kaj patrinoj, kiuj penas legi miajn vortojn, bonvolu pripensi tion, pri kio mi nun parolas; estas grave, ke vi cerbumu pri tio por bono de viaj infanoj. La sukceso de ilia edukado dependas de la grado de influo de la persono ŝarĝita de ilia prizorgado; kaj tre ofte vi batalas kontraŭ ĝi, anstataŭ ĝin subteni. Rilatante kun instruistoj pli ofte ol vi faras tion, estas la plej bona metodo interesigi ilin pri viaj infanoj kaj helpi al ili elporti pli pacience la malfacilaĵojn, kiujn ili renkontas dum ilia edukado. Imagu, ke estas nenio pli penigebla, ol esti ŝarĝita de subtenado de alies infanoj, kaj eĉ se vi estas foje embarasitaj, kial tio ne povas okazi al iu fremdulo? La ĉagrenoj, obstakloj, malŝatoj, kiuj ofte tuŝas instruistojn, forpelas de tiu ĉi kariero vere estimin-

dajn personojn. El tio rezultas, ke edukado, kaj precipe ties unua periodo, estas realigata de mezkapablaj personoj, venintaj tre ofte el la plej malaltaj klasoj, en kiuj ili mem ne povis ricevi socian edukon konvenan al ilia misio. Konsideru, ke estos malfacile trovi iun estimantan sin personon, sciantan sian valoron, kiu devus esti humiligita antaŭ okuloj de siaj gelernantoj per la distanco, kiun vi deziras krei inter tiu kaj vi. La instruisto, vi diras, estas via reprezentanto antaŭ viaj infanoj. Jes, li anstataŭas vin; sed ĝuste pro tio, vi devus konsideri lin kvazaŭ iun *membra de familio*, kiel veran prizorganton respondecantan pri la plej grandaj interesoj. Vi prave postulas, ke li estu forte ligita kun viaj infanoj; fine, tio estas lia devo; li devas ilin trakti kaj ami kvazaŭ ili estus liaj; tiamaniere li do havas iun verdire senfinan influeblecon sur ilin, kaj li vere povas akiri bonegajn rezultojn. Sed, ĉu vi opinias, ke tiun ĉi ligon oni povas ordoni? Ĉu vi opinias, ke viaj infanoj ne ekhavos la agmanierojn kaj kutimojn, kiuj inspiras ilin al malproksimiĝo? Ĉu vi opinias, ke persono de ekstere pli facile elportos la malagrablojn, pri kiuj vi mem plendas? Ĉu vi opinias, ke la instruisto, kies memamon vi vundas per via agado kaj viaj humiligaj rimarkoj, superŝutante lin per senfinaj postuloj, ne reflektos tion ĉe viaj infanoj? Kaj kiu garantios al vi, ke ili pro tio ne suferos? Penu do rekompeni liajn klopodojn, ne tiom, kiel mi jam diris, per iu ofte humiliga troa cedemo, sed per rimarkoj kaj delikataj ĝentilaĵoj, per kiuj eblas kontentigi ĉiun personon kun pli altaj sentoj. Sed, vi diras, mi ja pro tio pagas; ĉu ne sufiĉas? Gepatroj! Vi plendas, ke instruistoj faras el edukado metion; sed se vi konsideras ilin kiel dungeblulojn, ĉu ne estas normale, ke pro via mono ili donas al vi interŝanĝe varon? Tiuj ĉi konsideroj eble aspektos miaflanke troigitaj, kiel tiuj de persono ligita kun iu grupo de interesoj. Mi preferus, ke iuj aliaj estus farintaj ilin antaŭ ol mi, por ke mi povu eviti ilin; tamen, danke al la sperto kiu permesis al mi elmontri verajn bezonojn de edukado, mi opinias mia devo sincere ilin esprimi; kaj mi povas aserti, ke mi parolas tie ĉi nur por

universala intereso, deklarante, ke se temas pri mi mem, mi ne havas kialon por plendi tiurilate. Mi vere dezirus vidi la profesion de instruisto levitan ĝis grado, kiun laŭ mi ĝi devus posedi en socio, ĉar mi opinias, ke tio ĉi estas necesa por la progreso de edukado, kies influo sur vivnivelon de homoj estas senduba; sed mi opinias pruvita de mi, danke al la severeco kun kiu mi priskribas devojn de tiu ĉi profesio, ke instruistoj iel ajn ricevus ne senpage la respekton, kiun mi postulas por ili; mi deziras, ke ili estu estimataj, kaj mi pensas, ke pro tio ili ne laboros malpli forte sur la priskribita kampo.

Eble ne estas sencele serĉi la unuan kaŭzon de la stato de malhonorigo, en kiu troviĝas edukista kariero en la mondo. Tio ĉi helpos trovi la fonton de malbono kaj pli facile antaŭvidi rimedojn por kontraŭstari ĝin. Tiu ĉi malhonorigo estas ligita kun la falsa ideo, kiun oni ĉiam havis pri edukado. Persvadite, ke ĝi limiĝas nur al instruado, oni postulis de instruistoj iun certan kvanton da ĝi, laŭbezone de la aĝo de prizorgataj infanoj; tamen tiel tiu ĉi instruado estis limigita; ĉar, ekzemple de la instruistoj de tria grado oni postulis, ke ili nur sciu legi, skribi kaj fari kvar bazajn kalkulojn. Oni konstatas, ke estas ne malfacile trovi personojn, kiuj scias fari tion, precipe, se oni ne postulas, ke ili regu aŭ ne iun bonan instrumentodon. El tio rezultis, ke amaso da personoj, mem sen eduko, akceptis tiun ĉi karieron nur pro tio, ke ĝi ofertis al ili enspezon kaj iom pli altan pozicion en socio; ili venis ĝenerale el tre ordinara klaso, ne posedante sciojn pri la mondo, kontentaj de la eta merito, kiun ili konsideris kiel eliron el ilia unua sfero, kaj kiu aliflanke donis al ili iun superecon rilate al personoj de ilia pozicio; flatitaj de la povo ordoni kaj obeigi, tiuj ĉi personoj opiniis, ke tio ĉi gravigas ilin, kvankam al socio tio ĉi ŝajnis ridinda. Neniam pricerbuminte nek la objekton de edukado, nek metodojn formi junularon, ili ne trovis pli bonan rimedon ol timigo; tiel naskiĝis swingiloj, vipiloj kaj ĉiuj aliaj instrumentoj de doloro kaj humiligo, kiuj verdire tute ne taŭgas por krei respekton

en la mondo. Tiuj ĉi el la instruistoj, kiuj sukcesis akiri iom pli da instruado, dediĉis sin al supera instruado; sed por ili informi pri klasikaj verkoj estas ankoraŭ unu kialo de fiero, kaj ilia pedantemo ne malpliintensiĝos pro laboro sur tiu ĉi honora kampo. Ne partoprenante en sociaj rondoj, ili povis nek formi sin mem, nek akiri sociajn morojn, kiujn devas posedi ĉiu homo deziranta funkcii tiurange; pro tio ili konservis la tonon kaj la manierojn, kiuj senkvalifikas ilin; pro tiu ĉi fakto pluraj meritplenaj personoj rifuzis partopreni en tiu ĉi medio opiniante, ke ili neniel povos progresi. Samtempe tamen estas pluraj, kiuj ne rigardante la antaŭjuĝojn helpas prezenti veran valoron de tiu ĉi metio al kiu povus pretendi instruisto, kiu scias digne fordoni sin al ĝi. Pestalozzi kaj patro Girard de Fribourg okupiĝis pri la unua periodo de infanaĝo; ili prizorgis tion, kion oni nomas *lernejo*,¹ kaj malgraŭ tio ĉirkaŭis ilin ne nur aprezo de ilia laboro, sed ankaŭ ŝatego kaj vera respekto; eĉ pluraj gravegaj personoj donis al ili la pruvojn de siaj estimsentoj. S-ro de Fellenberg en Hofwyl ne sentis sin senhonorigita, malgraŭ sia pozicio, fariĝante estro de edukejo, danke al kio li akiris vere merititan bonfamon. Ĉu abato Gaultier mem ne okupiĝis pri infanoj, kaj ĉu tio ĉi ne rajtigis lin akiri publikan rekonon? Jen la homoj, por kiuj edukado estis honoro; bedaŭrinde ili estas malofte troveblaj, ĉar ekzistas malmultaj, kiuj posedus sufiĉe fortan menson por ekagadi malgraŭ antaŭjuĝoj. Dependas do de instruistoj – ĉu ili montros sin dignaj rilate al altrango de iliaj taskoj, kaj de socio – ĉu ĝi ne senkuraĝigos ilin. Por ke ĉio bone kunfunkciu, unuflanke necesas venki antaŭjuĝojn, kaj aliflanke necesas bone plenumi devojn.

En publika edukado unu el la plej gravaj aferoj estas organizado de institucioj. Se ĝi estos kaduka, la edukado sendube estos malbona. Ĉio devas esti kunordigita, prikalkulita, en la maniero konforma al difinita celo. Ne sufiĉas, ke ejo estu sa-

¹ La franca termino „lernejo” (école) rilatas al klerigaj institucioj por la unua infanaĝo - ĝi ne koncernas pli altan nivelon, ekz.: liceojn, kolegiojn, universitatojn k.a. (noto de la tradukinto)

lubra, bone aerumita, ke apude estu ĝardeno kaj vastaj dormejoj. Oni devas atenti pri ĉiuj etaj detalaĵoj ebligantaj misuzojn kaj pri tio, ke infanoj ne havu okazon malbonagi. Ĉar, se oni bone pripensus ĉiujn iliajn kulpojn, oni rimarkus, ke pli multon el ili eblis eviti. Ĝi estas la tre grava punkto, kiun mi pritraktos en kompleta verko pri pedagogio. Oni ne rajtas kredi, ke estas facile bone organizi institucion kaj precipe korekte regadi tiun ĉi organizon. Tio ĉi postulas de la estroj sperton, firmon, aktivadon, grandan raciemon kaj tute specialan pristudon de ĉio, kio al tiu ĉi organizo rilatas. Se instruista kariero postulas specialajn kvalitojn, ili devas esti lokitaj en la grado pli alta, ol tiu ĉi bezonata de simpla dommastro, ĉar oni devas majstri kaj prizorgi moralon, inteligentecon kaj la fizikan flankon de foje multnombraj individuoj, kies aktivadon necesas aprezi kaj en kies naturo oni devas enprofundiĝi; rilate ilin ĉiumomente necesas modifi sian agmanieron por adaptiĝi al diversaj nuancoj de karaktero, kaj necesas fari tion kun ekstrema memregado kun ankoraŭ pli granda severeco ol tiu ĉi rilate al aliaj homoj; unuvorte, necesas vere speciala talento, ĉar povas okazi, ke iu funkciante kiel perfekta instruisto, povas esti malbonega estro de institucio. Neniu motivo de memamo aŭ fiero diktis al mi tiujn ĉi konsiderojn, kiuj povus estis favoraj rilate min, aŭ malfavoraj rilate iun ajn alian. Verdire, mi speciale pristudis la edukarton; kaj tiuj ĉi studoj elmontris al mi ĉion necesan por bone plenumi ĝin kaj tio ĉiutage penigas min por akiri ĉion, kio al mi mankas.

Se ĉiuj edukinstitucioj estus organizitaj ĝuste, se ĉiuj iliaj estroj posedus necesajn sciojn, kaj mi ne parolas tie ĉi pri la scio scienca, sed pri tiu ĉi, kiu estas necesa en tiu ĉi speciala aktivado, edukado povus rimarkinde disvolviĝi, konforme al tiuj kondiĉoj. Precipe moroj, kiuj foje estas tiom difektigaj, puriĝadus pli facile; ĉar oni lernus trovi la verajn rimedojn kontraŭstari deviaĵojn, kiuj provokas tiom da damaĝoj ĉe gejunuloj. La malbonaj moroj estas ĉiam sekvo de malbona organizado, kaj rimedoj kontraŭstari ĝin estas unu el la objek-

toj instruataj dum la pedagogiaj studoj, kiujn mi proponas enkonduki. Tiuj ĉi rimedoj konsistas ne nur el prizorgado; ĉar sendepende de ilia subtileco, ekzistas amaso da cirkonstancoj, en kiuj infanoj povas eskapi el ĝi; ili konsistas pli ĝuste el iuj higienaj principoj, postulantaj pli detalan pristudon, kiuj estas bazitaj sur kono de homa naturo. Mi baldaŭ revenos al tiu ĉi temo, kiu meritas pli grandan atenton de ĉiuj personoj vokitaj al instruado, de gepatroj kaj la registaro.

En publika edukado estas unu punkto, kiu ĝis nun estis senesperiga al ĉiuj estroj de edukejoj; temas pri la malfacilo trovi kapablajn laboristojn. Ofte iu instruisto havas la plej bonajn ideojn, sed li estas sufokata de manko de scio, malbona volo, nesperto, unuvorte de malkapableco de la personoj, kiujn li estas devigata dungi; li povas esti feliĉa, kiam li ne renkontas personojn eĉ kun deviaĵoj.

Sendube mi devas tie ĉi konsenti kun zorgo de la registaro, kiu devigas estrojn de edukejoj prezenti ĉiumonate la staton de dungitaro kaj detalan raporton pri la kialoj de maldungo de instruisto; se tiuj ĉi kialoj estas gravaj, li estas senigita je rajtoj instrui; sed ĉu ne estas certe, ke iu instruisto povas formi malvirtajn homojn, kaj sen esti drinkemulo aŭ liberecano ne havi la kvalitojn necesajn al sia pozicio? Ĉu la registaro malpermesos al tiu labori pro tio, ke li ne havas tiom da fervoro, tiom da atento, tiom da bonaj instrumentoj, ke li havas karakterojn pli molan aŭ pli vivecan? Ne, ĝi rajtas apliki tiujn rimedojn nur rilate al vere perversaj personoj. Krom tio, ne ekzistas estro de instituto, kiu – tion necesas agnoski – ofte ne havas pli da problemoj kun siaj instruistoj ol kun gelernantoj. El tio rezultas oftaj ŝanĝoj, kiuj ĉe gelernantoj estas kialo de nenombreblaj malutiloj. Oni bone scias tion, sed nenion eblas fari. Ĝi estas unu el la plej gravaj obstakloj, kiujn mi renkontis de kiam mi estas la ĉefo de unu el edukejoj; miajn ideojn plej katenis la malfacilo trovi personojn sufiĉe plenajn de bonvolo, sufiĉe inteligentajn, sufiĉe fervorajn por fari sindediĉe tion, kion mi ne povus fari mem. Krome, por esti justa rilate ĉiujn, necesas agnoski, ke ĉiuj

estroj de institucioj faras ne ĉion necesan por altiri iliajn instruistojn; ekzistas pluraj, kiuj forpuŝas ilin aŭ per sia severeco, aŭ metante ilin antaŭ gelernantoj en ĝena pozicio, aŭ ne sufiĉe kontentigante ilian memestimon, aŭ fine multfoje humiligante ilin, kion ŝatas neniu homo havanta sian dignon kaj sentojn; sed vere estas tiom malfacile trovi bonajn laboristojn, ke ofte ne eblas toleri ĉion, kion ili faras kaj labori kun persono ne meritanta riproĉon.

Oni do povas konkludi el la ĵus prezentitaj aferoj, ke: 1) edukado estas precize karakteriza scienco; 2) se oni trovas tiom malmultajn personojn, kiuj konscias pri tio, kulpas pri tio la manko de specialaj studoj tiurilate; 3) la malfruo en edukado devas esti atribuata al la fakto, ke malmultaj personoj scias ĝian veran celon, ne konsciante pri tio, kio edukado estas, kio ĝi povas esti – kaj sekve de tio, kion necesas fari por ĝin plibonigi. Edukado estas nuntempe en la stato, en kiu troviĝis kemio antaŭ unu jarcento. Ĝi estas scienco, kiu ankoraŭ ne konstituiĝis kaj kies bazoj restas ankoraŭ nebulaj. Krom tio, rilate la psikan edukadon, oni povas konkludi, ke: 1) la psikaj kutimoj rezultas el la psikaj impresoj, kiuj determinas deviaĵojn aŭ la bonajn kvalitojn, depende de ekzistantaj cirkonstancoj; 2) pro tio, gravas precipe bone direkti la impresojn; 3) ili dependas ĉefe de gepatroj kaj instruistoj; 4) preskaŭ ĉiam la kaŭzo de ĉiuj difektaĵoj, kiujn oni provas tro malfrue elradikigi ĉe junularo, estas la malsperto kaj nescio de gepatroj kaj instruistoj rilate pedagogion; 5) oni ne rajtas esperi akiri bonan eduksistemon, kaj sekve de tio bonan *moralan edukadon, ĝis kiam oni ne havos amason da instruistoj, kiuj vere komprenos la celon de ilia misio, kaj kiuj posedas la kvalitojn necesajn por ĝin plenumi*. Resumante, la psika eduko rezultas el la aro de akiritaj kutimoj; tiuj ĉi kutimoj mem estas la rezulto de ĉiuj impresoj, kiuj ilin provokis, kaj direktado de tiuj ĉi impresoj dependas nur de familianoj kaj instruistoj. La ĉefa afero tiucele estas do havi nur *bonajn instruistojn*. Jen, kie kuŝas la senco de la problemo, kaj kion mi tuj provos klarigi.

Edukado estas kiel ni diris, iu speciala scienco, kiu devas esti studata. Por tion fari necesus do krei *teorian* kaj *praktikan* lernejon de pedagogio, same kiel oni havas la lernejojn de juro kaj medicino. Oni studus tie ĉion, kio rilatas al formado de homoj. Jen kelkaj aferoj, kiuj povus esti la objektoj de tiea studado:

1. Fiziologio de la psika flanko de homo, ekde ĝia naskiĝo;
2. Influo de la fizika flanko sur la psikan, kaj inverse;
3. Ĉiuj karakterspecoj, kiel en medicino oni studas diversajn temperamentojn;
4. Diversaj naturoj de impresoj kaj iliaj efikoj, konforme al psika karaktero aŭ temperamento;
5. Enprofundigita konsidero de ĉiuj psikaj kvalitoj, bonaj aŭ malbonaj, rilate al ĉiuj mankoj, ĉiuj deviaĵoj kaj iliaj eblaj kaŭzoj;
6. Rimedoj permesantaj preventi aŭ kontraŭbatali ĉiun difektaĵon kaj ilia aplikado ĉe diversaj karakteroj;
7. Homa menso, ĝia progresiva disvolvado, la rimedoj permesantaj doni al ĝi ĝustajn ideojn, kaj fine la plej taŭgaj rimedoj ĉe diversaj gradoj de inteligenteco;
8. Studo kaj kritika esploro de diversaj instrumentoj kaj ilia aplikado rilate al diferencaj sciencoj;
9. Higiena parto de edukado kaj konformaj al ĝi manieroj disvolvigi korpon kaj plifortigi sanon sen danĝero;
10. Necesus studi kiel eble plej detale la plej gravajn aktivitaĵojn de edukejo; ĝian internan organizadon; rimedojn eviti damaĝojn kaj okazojn por ilin fari; rimedojn profiti el la avantaĝoj, kiujn oni povas akiri laborante en grupo da individuoj; rimedojn de reciproka konkurenco, kiujn eblas utiligi sen eksciti danĝerajn pasiojn; fine, kvalitojn, kiuj devas karakterizi la estron de institucio;
11. Krom tio necesus legi, studi kaj komentarii ĉiujn verkojn pri edukado, kiuj estis kreitaj, kaj kiuj povus

doni informojn rilate al psikaj fakultoj, pasioj, karakteroj, higieno, same kiel ĉe juro kaj medicino oni komentarias la verkojn kaj doktrinojn de leĝdonantoj kaj kuracistoj.

12. Oni pristudus fine edukadon en ĝiaj rilatoj kun religio, kaj rimedojn kombini tiujn ĉi du aferojn, la plej grandajn por la bono de homo kaj socio; oni pristudus tiamaniere, ke ili reciproke apogitaj unu sur la alia servu al socia progreso.

Post tiu ĉi mallonga prezento, oni vidas kiel vastan kampon ampleksas la studado de pedagogio; kaj se en ĉiu scienco nur teorio ne sufiĉas, tiel estas ĉefe en tiu ĉi.

Rilate inteligenton, nenio estas pli facila ol scio pri principoj de edukado; sed ĝia aplikado jam postulas specialajn kvalitojn, kaj bone scias pri tio precipe tiuj, kiuj estas la plej malbonaj instruistoj; simile estas kun la homoj, kiuj kvankam bonege scias leĝon, ili estas malbonaj advokatoj. Estus do grave aranĝi praktikajn kursojn por la junaj personoj, kiuj volus dediĉi sin al tiu ĉi kariero, same kiel oni faras tion en medicino, kaj kio permesus ĝuste pritaksi iliajn talentojn.

Tiucele oni kreus en la konstruaĵo mem de la pedagogia lernejo, vastan institucion, en kiu la instruistoj-lernantoj senpage aplikadus la lecionojn, kiujn ili ricevis rilate la arton eduki homojn. En tiu ĉi loko, oni ĵuĝus kun certo ne nur ilian kapablecon rilate al tiu ĉi arto, sed ankaŭ oni povus certiĝi pri iliaj moraleco kaj karaktero; kaj la institucion necesus konfidi al personoj reale scipovantaj plenumi ĝian celon. Mi skizis tre detale la planon de tiu ĉi institucio kaj mi opinias, ke eblas apogi ĝin sur bazoj tiom ŝparaj, ke ĝi estos ne tro granda ŝarĝo al la registaro, kiu estus ĝia kreinto; pli detale mi prezentos la planon nur poste.

La avantaĝoj rezultantaj el tiuspeca institucio estas, laŭ mi, jam sufiĉe evidentaj por esti komprenataj de ĉiuj, kaj krome tio povus havigi al Francio grupon da personoj reale spertaj en edukarto kaj kapablaj servi tiurilate al siaj socioj. En kelkaj jaroj edukado progresus pli, ol ĝi faris tion dum tuta jar-

cento. Ĝi estus institucio digna al nia epoko, kaj la klera registaro, kiu famiĝus per gloro fari tion la unua, kreus iun novan sciencon, aŭ almenaŭ povus flati al si, ke ĝi kreis la entreprenon, kiun ĝis nun oni havis en neniuj epoko kaj ĉe neniuj popolo.

La distingo, kiun mi enkondukis inter funkcioj de simpla instruisto kaj tiuj ĉi de edukisto, permesas nature konstati la diferencon kiu ekzistus inter la malnova Normala Lernejo kaj la pedagogia lernejo, kiun mi proponas krei. En la unua oni okupiĝis nur pri formado de instruistoj; la alia tuŝas multe pli vastan kampon, kaj la realigataj tie ĉi studoj estas, kiel oni vidis, senfine pli ampleksaj kaj tute novkvalitaj. La celo de tiu ĉi lernejo estus formi edukistojn, kabablajn ne nur instrui, sed samtempe disvolvigi homon sur ĉiu kampo. Oni esploras tie ĉi la pedagogian arton en ĉiuj detalaĵoj, kaj danke al la deviga tuja aplikado oni estus certa, ke oni fordonas junularon en manojn de personoj kun pruvita kapablo, kio estus grandega avantaĝo, netrovebla en aliaj landoj. Oni vidas tie ĉi, ke mi estas longe for de aprobo al la libereco, kiun oni donas al edukado en certaj regionoj. Rezultoj de edukado estas treege gravaj por trakti ilin supraĵe, kaj mi opinias, ke tiurilate oni neniam estas tro severa; tamen necesas racia severeco, kiu ne povos bremsi la postulatan en tiu ĉi scienco progreson. Se mi dezirus pritrakti tiun ĉi temon pli larĝe, estus facile pruvi, ke tio, kion oni aplikas nun, estas tre malproksima de la difinita celo; ĉar ne nur ne eblas *en iu ajn maniero* garantii, ke oni rajtas postuli ion (kaj tion pravas sperto), sed krome, ke de tio oni havas ligitajn manojn. Post kiam oni jam kontrolis ies individuan karakteron kaj necesan *talenton*, kaj rilate tiun ĉi punkton oni devas esti ekstrema severa; kiam la persono jam estos akceptita en instruistaron, oni devas lasi ĝin agi libere; oni ne plu devas devigi iun sekvi paŝon post paŝo, same kiel oni ne devigas kuracistojn trakti iliajn malsanulojn laŭ tiu aŭ alia metodo. La konkurenco, kiu naskiĝas danke al tio inter lertaj homoj, farus el edukado la arton de ankoraŭ pli alta grado de perfekteco.

Mi opinias, ke mi devas respondi al unu riproĉo, kiun eblus starigi rilate al senpaga funkciado de la lernejo de aplikado. Pluraj personoj diros sendube, ke ĝi kaŭzos la problemon de infanoj submetataj al eksperimentado. Respondo tamen estas simpla: oni permesos praktikadon al la instruistoj-lernantoj, nur post unujara teoria preparo¹ kaj ili estos en tiu ĉi situacio almenaŭ same, aŭ eĉ pli kompetentaj, ol tiu ĉi amaso da personoj, kiujn oni dungas nun, kaj kiuj scias edukarton nur laŭnome. Iel ajn ne eblas, ke infanoj estu gvidataj malpli bone ol en ordinaraĵoj; kontraŭe, la provoj estos por ili profitdonaj, ĉar ili ĉiam estos traktataj laŭ pli perfekta metodo de edukarto ol ĉe ordinaraĵoj. Aliflanke se la pedagogia lernejo estos direktata de la sama persono, kiu respondecos pri la aplikado, tucerte ne aperos iuj ajn malkonvenaĵoj.

Ĉiujn partojn de edukado, same kiel tiujn ĉi ligitajn kun ĉiuj detalaj sciencoj, karakterizas rilatoj tiom intimaj, ke ili ne povas esti izolitaj; se unu el ili apogas sin sur damaĝitaj fundamentoj, la aliaj nature resentas tion. Kaj ĝuste tiun ĉi rilaton de partoj kun tuta sistemo de studoj, kio influas sur la psikan kaj la fizikan flankojn de homa personeco, mi deziras nun prezenti.

Ĉiuj plendas pri ordinaraĵoj; oni opinias, ke ili estas tro longaj, tro malkompletaj, kaj respondas nek al bezonoj de individuoj, nek al tiuj ĉi de socio. Kio do okazas dum la studperiodo? Kion scias juna persono post dek jaroj da studoj? Iom da greka kaj latina lingvoj kaj fari kelkajn paradcelajn vortigojn, jen ĉio. Ofte ĝi ne scias eĉ sian propran lingvon; ĉar estas malofte trovi gejunulojn, kiuj bone pristudis retorikon kaj kiuj sciis korekte verki leteron. Demandu al ili, kio provokas tondron, pluvon, neĝon; kial somere estas varme, kaj malvarme en vintro; kial balono leviĝas; kial malgranda ŝtono falas funden en akvo, dum granda ŝipo naĝas sur ĝi? Fine, starigu al ili la plej simplajn demandojn pri fe-

¹ La pedagogiaj studoj devus daŭri tri jarojn: la unua estus dediĉita nur al teorio, la dua al praktiko ligita kun teorio, kaj la tria nur al praktiko.

nomenoj, kiujn ili ĉeestas ĉiutage, eĉ pri tiuj kiuj ligiĝas al ilia vivo, kaj vi ne trovos du el milo da ili, kiuj kapablos respondi al vi. Instruado ĝenerale estas tiom malproksima de homaj bezonoj, ke ĉiuj devas rekomenci novajn studojn, konformajn al pozicio, kiun ili deziras atingi. Eĉ la plej modesta laboristo aŭ masonisto ofte posedas pli pozitivajn kaj ĝustajn ideojn, ol niaj unuarangaj humanistoj. Sed, oni diros, oni neniam pretendis, ke la klasikaj studoj liberigu iun de studoj specialaj. Ili estas la ĝeneralaj studoj, kiuj gvidas al ĉio. Sendube, tia estas la celo, sed ni vidu, ĉu ili atingas ĝin. Por ke studado de iu scienco povu konduki al ĉio, necesas, ke ĝi havu nepran rilaton kun plimulto el la karieroj, kiujn eblas entrepreni. Ĉu la klasikaj lingvoj estas tiaj? Mi opinias, ke ne. Ili estas nepre necesaj nur en advokata metio kaj medicino. Ili estas – oni diras – la ŝlosilo de ĉiuj sciencoj; lernante la latinan, oni lernas la francan, ĉar tiu ĉi dua lingvo estas bazita sur ĝi. Kiamaniere do okazas, ke naŭ dekonoj da junaj personoj ne scias ĝin post dekjara studado de la latina? Se oni deziras konvinkiĝi pri tio, sufiĉas fari jenajn retorikajn demandojn, kaj oni vidos kiom da personoj kapablaj respondi je ili oni trovos:

Kiu estas la diferenco inter *alléger* kaj *alléger*, *calfater* kaj *calfeuter*, *colorer* kaj *colorier*, *coasser* kaj *croasser*, *emplir* kaj *remplir*, *éveiller* kaj *réveiller*, *plier* kaj *ployer*, *recouvrer* kaj *recourvir*, *âpre* kaj *âcre*, *habileté* kaj *habilité*, *fourniment* kaj *fournissement*, *métal* kaj *métail*, *larmes* kaj *pleurs*, *morale* kaj *moralité*? Ĉu oni devas diri: j'ai trouvé ces écoliers *mangeant* des cerises, aŭ *mangeants*? J'ai lu plus de livres que je ne vous en ai *prété*, aŭ *prétés*? Les chaleurs qu'il a *fait*, aŭ qu'il a *faites*? Ĉu la samon signifas diri: *cracher le sang* kaj *cracher du sang*, *coucher par terre* kaj *coucher sur la terre*, *demander pardon* kaj *demander excuse*? Kiun diferencon vi vidas inter la esprimoj: *être faible*, *avoir la faiblesse*, *avoir de la faiblesse*; *ne faire que parler*, *ne faire que de parler*; *dire un mensonge* kaj *faire un mensonge*; *tomber à terre* kaj *tomber par terre*, ktp. Tiuj ĉi reguloj

estas tamen tre simplaj; en la franca ili havas la saman valoron, kiel la latina la regulo de *Deus sanctus*; kvankam oni ne uzos ilin en bazaj lernolibroj, same kiel lernigus ilin nek Vergilius, nek Salustius; ne ili estas la verkistoj, kiuj instruos al ni pure skribi en la franca, klare kaj elegante, kiuj permesos al ni rekoni belaĵojn de nia literaturo, kiel povus tion fari Racine, Boileau, Fénelon, Massillon, La Harpe kaj ĉiuj niaj grandaj verkistoj. Aliflanke, kvankam la franca venas de la latina, kiuj estas reciprokaj rilatoj inter tiuj ĉi du lingvoj? Nur etimologio; ĉar rilate regulojn, gramatikajn formojn, vortfaradon kaj vortordon, ili tute ne similas unu al la alia. Sed, eĉ se estus inter ili ankoraŭ pli grandaj rilatoj, centfoje pli racie estus komenci lernadon de la lingvo parolata, kiun oni praktikas, en kiu estas io krom nur lernenda teorio, ol anstataŭ fari grandegan kromvojon por fine alveni al punkto la plej proksima de tiu, de kiu oni komencis la vojon.

La latina, oni aldonas, utilas dum lernado de historio kaj geografio, ĉar ĝiaj verkistoj parolas pri tio; sed tio ĉi estas eraro. Klasikaj aŭtoroj prezentas nur fortranĉitajn fragmentojn, kiuj ne povas doni pli kompletan ideon pri la temo. Kontraŭe, la kono de tiuj ĉi du sciencoj estas necesa, por bone kompreni antikvajn verkistojn. Aliflanke, se tiu ĉi koncepto estus vera, kial do oni vidas tiom da gejunuloj, kiuj kvankam milfoje parolis pri Romo aŭ Ateno, ne scias montri ilin sur mapo? Kiuj same ofte parolis pri la plej gravaj momentoj en historio, kaj apenaŭ scias, ĉu ili okazis antaŭ, aŭ post Kristo? Ĉu la latina donas al arkitekto eblecon konstrui pli solidajn domojn? Kaj al matematikisto, mekanikisto, aŭ inĝeniero, ĉu donas pli da ĝusteco al iliaj kalkuloj? Ĉu negocisto pli rapide akiros sian riĉon? Ĉu ĝi faras el medicino sciencon malpli bazitan sur supozoj, kaj ĉu advokato iĝos pli konvinka uzante latinajn citaĵojn? Mi tamen opinias, ke ne necesas nuligi tiujn studojn; sed mi rigardas ekzemple la grekan ne kiel ion bazan, sed nur kiel utilan aldonaĵon, necesan en specifa edukado; ĉu ĉe specialaj studoj; ĉu kiel kontribuo

al formado de gusto, kiun oni povas trovi en la unuaj modeloj de belarta literaturo; ĉu fine pro antaŭjuĝo, je kiu ankoraŭ indas sinoferi. Sed estus bone rimarki, ke tiuj ĉi studoj estas superflujaj al tri kvaronoj da personoj, kiuj entreprenis ilin; ekzistas sufiĉe pluraj gepatroj, kiuj dezirante lernigi la latinan al siaj infanoj, volus samtempe, ke ili ne dediĉu al tio sian tutan tempon. Mi preferus tian planon de studoj, kiu konsiderus interesojn de ĉiuj; kies bazoj estus la sciencoj vere fundamentaj, kaj kiuj ofertus realajn sciojn rilate ĉiujn vivkondiĉojn. La sciencoj, kiuj malfermas vojon al ĉiuj karieroj, estas matematiko kaj ĉiuj de ĝi dependantaj, kiel fiziko, kemio, teknologio, mekaniko; aldoniĝas al tio evidente la vivantaj lingvoj, la gepatra lingvo, kiun oni devas komencituj, kiam oni scias flue legi kaj skribi. Mi pensas tie ĉi ne pri mekanika studado de la franca gramatiko kaj ortografio, sed pri enprofundigado de lingvaj malfacilaĵoj kaj al kutimigo al verkoj de bonaj verkistoj, kio estas la sola metodo formi propran guston kaj stilon. Matematiko kaj fiziko, vere estas de iu tempo partoj de altaj studoj; tio ĉi certe estas progreso, kiun oni devas konstati; sed rimarkinte, ke ili estas la sciencoj, kiuj postulas pli da tempo, oni facile konstatos, ke se tiuj ĉi studoj daŭras du-tri jarojn, nur kiel tre akcesora objekto, ili donas scion sufiĉan apenaŭ por ordinara uzo. Oni povas komenci lerni aritmetikon estante tre juna kaj scii ĝin perfekte kiel dekdujaraĝulo. Dekjaraĝa infano povas ankaŭ koncepti la unuajn elementojn de geometrio, kaj akiri kelkajn regulojn de fiziko, kemio kaj la natura historio; tiamaniere, je dekokjaraĝo la infano estos dediĉinta ĉirkaŭ dek jarojn al tiuj ĉi sciencoj kaj povus ekscii ilin perfekte, sen neglekti aliajn, kio estus laŭ mi senfine multe pli profitdona ol pasigi la saman tempon por supraĵe ekscii la grekan kaj la latinan. Nenio malhelpas enkonduki tiujn ĉi du lingvojn paralele kun aliaj sciencoj; necesus tamen forlasi la malnovan instrumentodon, kiu dediĉigus al ili *ekskluzive* ok ĝis dek jarojn; nuntempe

estas certe, ke eblas facile ellerni ilin dum tri aŭ kvar jaroj, sen fari specialajn studojn.¹ Sed se instruado verdire progresis de iu tempo; se oni vidas, kiel ĉiutage estas enkondukataj novaj metodoj, kies celo estas mallongigi la studadon kaj igi ĝin pli agrabla, ĝi ne estas la kialo, ke profitu el tio nur privata edukado, sed ankaŭ tiu ĉi publika, kiu nuntempe estas neapartigebla de rutino.

Ĉio, kion mi tuj diros rilate al studsistemo, neniel koncernas specialajn lernejojn, en kiuj sendube aperas ĉiuj dezireblaj avantaĝoj, nek al la fontoj de instruo, kiujn ofertas Francio, kaj precipe Parizo. Tutcerte ni estas tiurilate ne malpli bonaj, ol iu alia lando. La Politeknika Lernejo, la Lernejo de Minejoj, publikaj kursoj gvidataj de unuarangaj spertuloj, bibliotekoj, ktp., ofertas al studemaj gejunuloj milojn da eblecoj retrovi perditan tempon. La ajn estus la graveco de tiuj ĉi avantaĝoj, ili tamen ne ebligas rekompenci la gravajn mankojn, kiuj rezultas el nesufiĉeco de la klasikaj studoj; tiel okazas, ĉar nombro de la personoj, kiuj dezirus patropreni ilin estas apenaŭ konsiderinda; kaj ĉar al plimulto de tiuj, kiuj povus tion fari, mankas la unuaj necesaj scioj, kiuj

¹ La metodoj por rapidigi la lernadon de la latina, kiujn oni kreis ĝis nun, enhavas miaopinie plurajn tre gravajn malkonvenaĵojn. La unua sendube estas devojigi gelemantojn de ilia ordinara vojiro, tiel ke kiam necesas forlasi la novan metodon, ili estas vere perturbitaj; la aliaj devigas ilin vagadi tro longe antaŭ ol ataki verajn malfacilaĵojn, kaj dediĉigas tro multe da tempo al tre tedaj elementoj; fine, la plejmulto de la metodoj postulas specialajn materiaĵojn, intence faritajn verkojn, kaj precipe studadon longan kaj ofte malfacilan al instruisto. En mia metodo mi provis eviti tiujn ĉi kaj multajn aliajn malkonvenaĵojn, kiujn estus tro longe priskribi tie ĉi. 1) Aldonante nek novajn klasifikojn, nek novajn difinojn, nek novajn regulojn, lernanto neniam estas konfuzita, kia ajn estus la maniero, laŭ kiu oni pridemandas lin; 2) la metodo ne postulas iun ajn specialan verkaĵon, ĉar ĝi ne apogas sin sur mekanikaj principoj, sed sur natura gradigo de malfacilaĵoj kaj specialaj rimedoj memori ilin; 3) ĝi povas konduki ĝis fino de studado; 4) ĝi postulas nur kvaronon de la uzata antaŭe tempo, kaj la lernanto lernas en maniero multe pli profunda kaj racia; 5) ĝi plaĉas al infanoj; 6) ĝi aplikeblas al ĉiuj lingvoj, krom etaj modifoj karakterizaj al speciala karaktero de ĉiu el ili; 7) fine, ĉiu persono posedanta inteligentecon kaj raciemon povas asimili ĝin facile kaj rapide.

permesus tiri el tiu ĉi lernado profiton. Konsiderante krom ĝeneralaĵo ankaŭ detalojn, kaj precipe la uzatajn metodojn, ni konstato, ke la situacio estas ankoraŭ pli malbona. Doni librojn en manojn de infanoj kaj lernigi ilin parkere sen zorgi, ĉu ili ion komprenas – jen la sekvata metodo; ankaŭ pridemandu al plimulto de la infanoj pri tio, kion ili scias, kaj vi estos ŝokitaj de la nula rezulto de iliaj pensoj, aŭ de la strangega formo, kiun la plej simplaj aferoj prenis en iliaj mensoj. Inteligenteco, same kiel la psika flanko, devas esti disvolvata ĝustatempe, kaj por tion sukcesi oni ne ŝarĝu memoron per vortoj, sed riĉigu imagpovon per ĝustaj ideoj. Sensencaj vortoj estas por menso kvazaŭ sterilaj semoj por tero; sen intima ideo pri la objektoj, kiujn ili reprezentas, postsekvos ilin nenio, ĉar oni forgesas ilin same facile, kiel oni ilin lernis. Se temas nur pri tiu ĉi sterileco, ĝi estus nur duondamaĝo; sed la sekvoj de tia metodo, kiuj adresiĝas nur al memoro, estas sendubaj. Nepre okazas unu el du aferoj: aŭ infano estas indiferenta rilate al tio, kion ĝi lernas, kaj akiras iun leĝeraniman sintenon, kiu igas ĝin supraĵema kaj ofte malkonsekvenco – ĉar same facile ĝi akceptas absurdaĵojn kaj gravajn aferojn; aŭ, kio estas ankoraŭ pli malbona, la infano faras al si falsajn ideojn – ĉar ĉiuj falsaj ideoj venas de malperfekta konceptado.

Mia intenco estas ne pritrakti ĉiujn detalaĵojn, kiuj rilatas al tiu ĉi temo, ĉar tio devigus min iri for de la ĉefa temo de tiu ĉi prezento; sed mi devas ekzameni la malkonvenaĵojn, kiujn la sistemo de ordinaraĵoj alportas al la psika edukado. Infano bezonas esti okupata; tiu ĉi okupo estas al ĝi nepra; necesas, ke ĝia menso kaj pli ofte ĝia korpo estu aktivaj. Tiu ĉi aktivado estas ĝia bezono; dezirante ĝin forpeli, estus perforti naturon. Se oni scius ĉiam liveri elementojn por senĉesa ĝia okupiĝo, oni evitigus al infanoj plimulton de la eraroj, kiujn ili faras, neŭtraligante danĝerajn impresojn kaj ofte detruante tiujn, kiuj estas akiritaj en junaĝo. Scii okupi infanon estas afero de speciala talento; kaj nur pedanto povus pensi, ke doninte al infano iun lecionon li ne plu devas fari ion ajn,

ĉar tiu iam ĝin komprenos. Scii krei okupojn por infanoj estas unu el la plej gravaj punktoj de la psika edukado; sed necesas samtempe, ke tiuj ĉi okupoj estu agrablaj kaj utilaj; necesas, ke ili, se mi tiel povas diri, kvazaŭ mem disvolviĝu. Estas du specoj de okupoj: tiuj de menso kaj tiuj de korpo, aŭ dirante alimaniere: laboro kaj distro. Rilate al la unuaj, se ni esploros la manieron laŭ kiu oni okupas infanojn, ĉe unu flanko ni rimarkos sistemon monotonan kaj tedan, kaj ĉe la alia vane senkuraĝigan; nenio agrabla al menso, nenio kapbla fiksi ĝian atenton. Kio estas la rezulto? Naŭzo; kaj kelkfoje nekontraŭstarebla abomeno de laboro, el kio venas mallaboremo kaj ĉiuj ĝiaj malbonaj sekvoj. Kiom da junaj homoj oni vidas, kiuj kun granda peno treniĝas dum jaroj sur lernejoj benkoj, kaj kiuj similaj al bovoj irantaj nur tien, kien oni pike alirigas ilin, antaŭeniras instigitaj nur de punoj aŭ logiloj, kiujn oni metas antaŭ iliajn okulojn por ilin puŝi! De kiam infano scias legi, tiu ĉi arto kostas al ĝi nur larmojn, kaj ĝiajn momentojn de legado okupas nur tristaj rudimentaĵoj. De mateno ĝis vespero, sinsekve venas temtekstoj kaj tradukoj, aŭ por ŝanĝi - tradukoj kaj temtekstoj, kaj tio ĉi dum dek jaroj. Ĉu estas do strange, ke la infano, kies menso estas senĉese puŝata al aferoj, kiuj al ĝi ne plaĉas, finas per ĝia malŝato, same kiel okazas eĉ kun ludoj, kiam ili estas tro longaj? Ĉu estas strange, ke tiu timas objekton, kiam oni faras el ĝi siaspecan torturon? Fine, ĉu estas strange, ke ĝi serĉas distraĵojn, kiuj ofte kondukas ĝin al eraro? Ĉar necesas rimarki, ke danĝeraj kutimoj de junularo preskaŭ ĉiam originas el manko de *konvenaj* okupoj, same en privata edukado, kiel en la publika. Mi diras konvenaj okupoj, ĉar en institucioj ne mankas laboro, sed la problemo estas ĝia valoro; tiu ĉi aplikata ne kontentigas la imagpovon de junaj personoj; ĝi tute ne ekzercigas ilian fakulton de observado; aperas sensencaj vortoj, kiujn oni perforte metas en iliajn kapojn, sed kiuj tute ne cerbumigas ilin. Ankaŭ la enuo, kiun kaŭzas tia situacio, eskapigas gelernantojn; ili faras ĉion eblan por eviti ĝin, kaj unu horo da laboro, de kiu ili povas fuĝi, estas por ili kiel be-

no. Tamen estas pli facile ne cerbumi, kiel ŝatigi laboron al infanoj; ilia menso avidas ekkonadi; senĉesaj demandoj pruvigas ilian volon kleriĝi; sed fermante orelojn al voĉoj de naturo, kiu ĉiam indikas sukcesplenan vojon, oni forpuŝas ilin, kiam ili demandas; oni rifuzas instrui ilin pri tio, kion ili deziras scii; tiel oni perdas la plej favoran okazon, ĉar tiam ilia menso estas disponebla; aliflanke kiam oni deziras kontraŭe instrui ion *perforte*, krome en seka kaj enuiga maniero, ili ne sentas tiam iun ajn utilon, kaj ankaŭ plej ofte ne komprenas, ĉar oni montras al ili ion el la plej malinteresa flanko kaj ofte ankoraŭ estas surprizita, ke la infanoj ne elmontras iun ajn studemon. Prezentu al ili sciencon agrabla; metu vin sur ilian lokon; eniru ilian sferon kaj ne postulu, ke ili eniru la vian: jen estas la rimedoj katpi atenton. Lerta instruisto scias utiligi cirkonstancojn por fokusi ĝin; li ne evitas eksciti de tempo al tempo gajemon de infanoj, aldonante iun spritaĵon flanke de iu serioza eksplikado; en la tono, kiun li uzas parolante kaj en la maniero de pantomimado, estas tiam io, kio kaptas atenton sen ilia konscio. Jen estas la principoj, surbaze de kiuj, miaopinie, necesas organizi instruadon; ili estas aplikeblaj en la instruado de ĉiu scienco, al homoj de ĉiu aĝo. Se instruisto, kiu malbone instruas, forpuŝas plenkreskulojn, imagu do kiom pli forte funkcias tiu forpuŝo ĉe infanoj! Kiom pli da talento, mi jam ne parolos pri pli da scio, necesas por kapti atenton de tiuj junaj kapoj, ol por instrui plenkreskulojn intencantajn lerni? Sekvante la ĉi-suprajn principojn, oni akiras la tutan deziratan atenton, kaj ilia volo labori estas kelkfoje eĉ tiom granda, kiel tiu ĉi de ludi. Sperto elmontris al mi tion ĉi ne kun kelkaj izolitaj individuoj, kiuj povus esti esceptaj, sed kun kompletaj klasoj; kaj mi ne volas alian pruvon de progreso, krom observado de ĉiutagaj faktoj; temas pri tio, ke kun certaj majstroj infanoj faras absolute nenion, dum kun aliaj ili laboras perfekte; ne ŝanĝiĝis tamen iliaj kvalitoj, sed la maniero laŭ kiu oni traktas ilin. La instruplano, kiun mi proponas estus rimedo kontraŭ tiuj ĉi malkonvenaĵoj, kondiĉe ke oni aplikos iun meto-

don simplan, klaran, facilan, agrablan kaj prikalkulitan *en ĉiuj eblaj detalaĵoj*, konforman al la natura funkciado de menso. Estante pli varia, ĝi ofertas pli da allogaĵoj; la menso pasante de unu afero al alia, ne havas la tempon laciĝi pro unu temo, kaj revenas al ĝi kun pli da plezuro. Se, kiel mi jam diris, oni aplikos tie ĉi bonan metodon; se oni agas sur inteligenton, kaj ne nur sur memoron, la menso al kutimiĝas al pripenso kaj observo; ĝi scias cerbumi, kaj tiun ĉi kutimon ĝi portas ĉien, eĉ dum ludoj, ĉar ĝi trovas tiam la lernitajn aplikojn; ĝi mem profitas el siaj propraj observoj ĉiufoje, kiam ĝi trovas oportunan okazon; tiuj ĉi okazoj aperas ĉiunmomente, kaj lerta instruisto scias profiti el ili kaj ilin provoki.

Vidu la infanojn, al kiuj oni ĝustatempe prezentas la ideojn pri historio, la natura historio, fiziko kaj kemio; pri skulptaĵoj, pentraĵoj, plantoj, bestoj, fenomenoj, kiujn ili ĉeestas, aŭ simplan ŝtonon – ĉio interesas ilin. Ilia atento estas fiksita, kaj per siaj demandoj ili pravas, kiom da profito eblas tiri el ilia inteligento, kiam oni scias konvene utiligi ĝin. Kontraŭe, vidu la infanojn, kiuj stultigitaj ĉe iliaj latinaj libroj, kaj kiuj vidis nur tion – interesas ilin nenio, kio ilin ĉirkaŭas, ĉar ili nenion komprenas; ilia scivolemo estas neniel ekscitita; sed rakontu al ili pri iu natura fenomeno, klarigu iun historian faktan, kaj vi vidos, ke ilia inteligento kvazaŭ vekigis el le-targia dormo; ili aŭskultos vin avide; iliaj rimarkoj kaj demandoj diros al vi: Ni petas, ke vi instruu, sed ne enuigu nin.

La instruplano konceptita tiusence, neniel neas seriozajn studojn, kiel povus opinii kelkaj personoj; kontraŭe, ĝi privilegias ilin, ĉar ĝi al kutimigas infanon cerbumi kaj esplori aferojn ĝisfunde. Mi vidis tre ĝustatempe instruitajn laŭ tiu ĉi plano infanojn, kiuj havante dekdu jarojn posedis tian rezonkapablon, kiun oni ne atribuas al pluraj dekok- aŭ dudekjar- raĝuloj, kaj kapablis kompreni la plej profundajn klarigojn. Mi konkludas do per la instruplano, kiu inter aliaj avantaĝoj, ofertas pli da varieco kaj plezuro; 1) akceli progreson laborigante infanojn kun pli da plezuro; 2) kreskigi ĉe ili forton

de rezonado, instruante ĝustatempe la kutimon cerbumi, samtempe farante ilian menson preta al seriozaj studoj; 3) ke ĝi estu pli harmoniita kun sociaj bezonoj, reale preparante al ĉiuspecaj karieroj; 4) ke danke al ĝi oni povu pli bone prijuĝi talenton de juna persono, observante kiun parton de ĝiaj intelektaj fakultoj verŝajne necesas disvolvi, kion ne eblas fari nur ĉe unu studobjekto; 5) ke ĝi esence kontribuu al sukceso de psika edukado, prezentante al menso elementojn de utilaj kaj agrablaj okupoj. Inter gravaj malkonvenaĵoj de la realigata plano, kiun ĝenerale oni nun sekvas, eblas rimarki la jenajn: plimulto de junaj personoj, enuita post dek jaroj da senfrukta studado, deziras nur – dirante tiel – liberiĝi de la jugo, kiun oni igis por ili la plej peza; jam liberaj, tiucele ili kontentigas siajn pasiojn per frivolaj plezuroj ofertataj de la mondo; ĉar estas vere malmultaj, kiuj ol tio preferus reveni al Virgilius kaj Horatius, kiuj devigis ilin barakti tiom longtempe.

La instrumaniero, kiu celus precipe formi ilian menson, havigus al ilia imagpovo pli da rimedoj, preparante ilin plibone por sekvi siajn instrukciojn; havigus al ili pli da okupeblecoj, evitante multajn malordojn. Tiurilate, mi ĉiam konsilos al gepatroj ke – se eble – ili disvolvigu en siaj gefiloj amuziĝajn talentojn; ĉar, sendepende de avantaĝoj, kiujn tio povus havigi al ili en la socio, tio provizus al ili distriĝon evitantan al ili devojiĝojn.

La falsa ideo, kiun oni posedas pri edukado, kaj la persvado, ke ĝi devas limiĝi al instruado, neglektigis ĉion, kio al tiu ĉi ideo estis fremda. Oni ne rimarkis, ke edukado *konsistas el ĉiuj momentoj de vivo*, kaj infano senĉese povas ricevi impresojn. Post kiam la infano finis sian lecionon, oni lasas ĝin sola, kvazaŭ la restanta tempo estus ne plu utila. Tiu ĉi eraro, kiu havas gravajn sekvojn en la privata edukado, montriĝas ankoraŭ pli grava en la publika, kie pro amasigo infanoj agadas en grupoj, ne havante iun difinitan okupon. Tre grava do estas uzo de la tempo, kiun infanoj pasigas ekster lernado. Se, danke al saĝa kombino, oni sukcesos krei por ili

agrablajn okupojn, kiuj daŭrus de mateno ĝis vespero, ekzercante alterne ilian korpon kaj menson, tio ĉi detruus efikojn de malbonaj impresoj kaj estos malpli facile ilin akiri, kaj oni evitus la malbonon, al kiu gvidas senfaro.

Tutcerte estas senutile insisti rilate la detruajn sekvojn de malbonaj kutimoj, kiuj estas tiom danĝeraj al infanoj; ĉiu bedaŭras pro ili, kaj mi eĉ ne scias kiom da spertuloj kun la seriozeco, kiun postulas tiu ĉi afero, esploris per kiuj rimedoj eblas ilin kontraŭstari. El ĉio, kion oni proponis, laŭ mia scio, nenio forigis la malbonon kontentige. Ili estas nur akcidentaj aŭ eĉ malbonfaraj paliativaĵoj, kiujn oni uzas jam kiam la malbono neŝanĝeble progresis. Por elradikigi ĝin, necesas serĉi la kaŭzojn por ilin nuligi. Tiuj ĉi rimedoj estas, kiel mi jam diris, unu el la objektoj de la pedagogiaj studoj, kaj kvankam mi ne povas prezenti tie ĉi pli larĝan priskribon, mi opinias ĝusta almenaŭ montri, sur kiuj bazoj ili troviĝas.

Kutimojn oni akiras kelkfoje spontane, kondiĉe ke temperamento estos disvolvata ĝustatempe; plej ofte tamen, tio ĉi okazas danke al komunikado, aŭ en privataj loĝejoj kun homoj kunvivantaj tie kaj aliaj personoj, aŭ en pensioj kun ties junaj malvirtigiĝintaj frekventantoj. Ĉiukaze la unua afero, kiun necesas fari, estas sendube forigi suspektindajn personojn kaj enkonduki tre akuratan prizorgadon; tamen ofte okazas, ke malgraŭ ĉiuj eblaj antaŭvidoj, infano povas havi danĝerajn rilatojn, same hejme kaj ekstere, aŭ ili povas okazi pro mankoj en la prizorgado; tiam la sola efika rimedo estas pretigi iun senĉesan okupon, ĉu mensan, ĉu fizikan; ĉar la unua kaŭzo de malbono estas senfaro. Danke al tiu ĉi okupo oni evitas okazojn al danĝera komunikado, eĉ penson oni protektas kontraŭ malbono, do oni ne devas timi eventualajn mankojn de prizorgado. Pretigu do la elementojn de mensa aŭ fizika aktivado, kaj vi detruos la kaŭzon de malbono. Same, ekzamenante la situacion de infanoj aŭ ĉe siaj gepatroj, aŭ en edukejoj, oni vidos, ke ĉio taŭgas por treni ilin al deviaĵoj. Ĉe gepatroj vivo estas ekstreme facila, neniu aktivado, neniu perdo de energio, neniu regulita kaj deviga okupo;

akompanas tion senĉesaj okazoj foreskapi de adekvata prizorgo kaj nutrado. En edukejoj, okupoj estas bone regulataj, sed ili estas plej ofte banalaj, kaj enuaj laboroj estas eble ankoraŭ pli kondukantaj al malvirto ol io alia; dum longa kaj enua studado, al kutimiĝintaj al malvirtoj ĝejnuloj, profitas el ĉiu ebla okazo sindoni al ili. Dum paŭzoj ili estas forlasitaj – tiel dirante – al propra sorto, ne havante aliajn okupojn krom tiuj, kiujn ili kreas pere de senutilaj aŭ enuaj ludoj; la prizorgado ofte ne estas tiam sufiĉe detala, kion foje povas ankoraŭ pli malfaciligi netaŭga ejo; fine, la instrusistemo ne agas konforme sur menson, ne prezentante al ĝi utilajn, pensigajn kaj agrablajn temojn. Krome, se ĝuste en endukejoj infanoj trovas la plej multajn okazojn por perdiĝi, ĝuste tie oni povus pli facile kontraŭstari la malbonon, kompreneble nur se oni volus peni tion fari. Oni trovas tie bazojn de rimedoj – necesas nur uzi ilin; ili estas: perfekte regulitaj okupoj, simpla nutraĵo kaj ĉiuj elementoj de aktiva vivo. Sufiĉas do nur direkti instruadon laŭ la maniero konforma al komforto de infano, provizante ĝian menson per interesaj ideoj; havigi elementojn por memokupado; tiel aranĝi ejojn, ke ili faciligu prizorgadon; organizi fizikajn okupojn tiamaniere, ke ili fortigu korpon kaj antaŭvidi *necesan ripozon*. Necesas ankaŭ prizorgi amason da ne malpli gravaj detalaĵoj, sed mi ne pretendus tie ĉi detale priskribi ilin. Kun ĉio ĉi ne nur eblas antaŭvidi kutimojn de infanoj, sed ankaŭ ofte oni povos forigi ilin, se iuj malbonaj jam ekzistas. Mi diras *ofte*, ĉar se ili estas tre enradikigitaj, ilia forigado okazas kun grandaj malfacilaĵoj, kaj en tiu ĉi kazo nek konsiloj, nek admonoj, nek minacoj, teruraj listoj de devoj – nenio impresas menson, kaj la efiko estas tiom nedaŭra, ke ĝi preskaŭ tuj malaperas.¹

Se estas grave bone direkti edukadon de viroj, ne malpli grava estas tiu ĉi de virinoj. Ilia influo en socio, la unua edu-

¹ La sola uzebla tiam rimedo, kiun mi konsilas uzi, estas la inventita antaŭ nelonge metodo, kiu permesas al infano agadi en ĉiu momento, ne trudi al ĝi penigajn devojn kaj ne ĝeni ĝian moviĝemon. Sperto jam montris la avantaĝojn de tiu ĉi metodo.

kado, per kiu ili estas ŝarĝitaj, meritas tiurilate tutan atenton de la registaro, kiu vere deziras asekuri bonan vivon al sia popolo. Rilate la instruadon, tiu de virinoj estas pli bona, ol tiu ĉi de viroj. Estas tre malofte trovi bone edukitan junulinon de dekdu aŭ dektri jaroj, kiu ne sciis bone sian lingvon kaj foje ankaŭ iun fremdan lingvon, geografion, historion kaj kalkuladon. Dume oni forgesas, ke ili devas esti antaŭ ĉio edzinoj, patrinoj kaj dommastrinoj, kaj oni nur klopodas disvolvigi al tiuj talentojn por brili en la mondo. Krom sciojn, kiuj estas laŭkutime la ĉefa parto de ilia instruo, kial oni neglektas tiujn ĉi, kiuj rekte rilatas al la funkcioj, kiujn naturo destinis al ili? Praktika kaj teoria hejma ekonomio, administrado de domo, perfekta scio de devoj de patrino kaj edzino, la arto prizorgi infanojn – jen estas la plej gravaj objektoj en la edukado de virinoj, kaj ilin oni ĉie neglektas. Ĉiuj virinoj estas denaskaj instruistinoj. Ili solaj estas ŝarĝitaj de la unua edukado; ili solaj direktas la unuajn impresojn de homoj kaj iamaniere decidas pri iliaj destinoj. Kiel ili povus plenumi tiun ĉi gravegan devon, se ili ne havas ĝustan instruon? Tial do mi opinias, ke studado de pedagogio estas same grava por ili, kiel por instruistoj.

Oni prijuĝu la rezultojn, kiujn eblus atingi, se edukado de tuta popolo povus esti direktata konvene, de lulilo ĝis la momento de eniro de maturaj personoj en la mondon. Kiom socio gajnus en mallonga tempo! Kaj kvankam ĝi estas afero malfacile realigebla, mi opinias, ke ĝi estas ne iu kimera ideo, aŭ revo de sistemulo. Se virinoj sciis la arton prizorgi junularon, ili ne nur konvene gvidus la edukadon de junaj infanoj; sed ili eĉ prizorgus postan edukadon; ili estus ne plu tiom ofte viktimoj *de siaj propraj antaŭjuĝoj kaj ĉarlatanismo*. En la planon, kiun mi skizos, mi penis ne meti iun ajn principon, kiu povus fari ĝin malfacile realigebla. Se mi dezirus krei por ĝi la plej konvenajn cirkonstancojn, mi imagus grupon de dek aŭ dekdu samaĝaj infanoj kun la sama nivelo de inteligento, kiujn prizorgus homo tute sindediĉa, kiu fordonus sian ekziston al siaj gelernantoj, ne perdante ilin de

siaj okuloj tage kaj nokte. Mi imagus gepatrojn sufiĉe riĉajn por kovri la vivkostojn de la dek infanoj, kvazaŭ ili kovrus tiujn ĉi de dek ses, kaj sufiĉe klerajn fari la elspezojn racie kaj utile. Mi imagus malgrandan domon, ne en Parizo, sed en iu bela regiono, kie la agrikulturaj vivkondiĉoj estus ligitaj kun seriozaj okupoj. Mi ofertus al la infanoj lecionojn de natura historio promenante surkampe kaj instruus al ili konversacie. Mi konsilus al instruisto fari kun la infanoj ekskursojn, por ke ili mem studu morojn de popoloj kaj vizitu historiajn lokojn. Mi imagus precipe, ke tiu ĉi instruisto estu libera de ĉiu ekstera influo kaj povu agadi ne estante ĝenata de iu ajn. Ĝi estus sendube iu forta, bona plano, sed ĝi utilis nur al unu familio el mil. Necesas do paroli pri amasoj, kaj ne pri individuoj, kiuj vivas en esceptaj kondiĉoj. Tial do mi pritraktas tion, kio pli koncernas publikan edukadon, ol tiun ĉi privatan, kaj mi pensas aldoni neniun solvon, kiu estus nerealigebla; ĉion ĉi montris al mi dekjara sperto kaj studado de rezultoj atingitaj de rimarkindaj personoj, kiuj dediĉis sian vivon al plibonigo de edukado. Mia opinio, la ĉefa kondiĉo, kiun oni neniam ĝis nun pritraktis, estas la studado de pedagogio; ĝi iaspece respondas al ĉiuj bezonoj, ĉar se oni posedos instruistojn trejnitaĵojn en la arto, kiun ili praktikas, ĉesos eraroj, metodoj perfektigis, kaj edukejoj akiros ĉiujn kondiĉojn necesajn por bona edukado.

Mi finos tiujn ĉi konsiderojn, skize prezentante la studplanon, kiun mi proponas, kaj kiu ŝajnas al mi, laŭ la sperto kiun mi akiris, ampleksi dezireblajn avantaĝojn. Mi penis laŭeble harmoniigi ĝin kun ordinara plano, por ke estu pli facile ĝin enkonduki. Mi konservas la dividon je ok klasoj, kiuj koncernas la ĝustdire klasikajn studojn. Antaŭas ilin studoj elementaj, kiuj koncernas legadon, skribadon, elementojn de mensaj kalkuloj, kaj amason da ekzercoj kun nomoj, kvalitoj kaj uzado de objektoj en ĉirkaŭaĵo, kio helpas disvolvi inteligenton de infano, al kutimigante ĝin cerbumi kaj fiksi sian atenton. Sekvas ilin specialaj studoj, konformaj al celata stato; sed tiujn ĉi lastajn mi ne pritraktos.

La klasikaj studoj komenciĝas pli malpli en la oka jaraĝo.

La oka klaso koncernas:

1. Perfektigon de lego kaj skribo.
2. Modernan geografion.
3. Elementojn de kalkulo.
4. La unuajn regulojn de la franca lingvo, kun pritrakto de verkoj de francaj verkistoj.
5. Linian desegnon.

La pritrakto de verkoj de francaj verkistoj rilatas al verkaĵoj elektitaj pro stilo kaj grado konformaj al grado de inteligento; oni klarigas aŭ klarigigas al gelernantoj ĉiujn fremdajn al ili terminojn, ĉiujn alegoriajn esprimojn, ĉiujn inversiojn; surbaze de ili oni disvolvas historiajn, mitologiajn, geografiajn kaj literaturajn komentariojn, kiuj estas necesaj kaj komprenigaj; necesas provi identiĝi kun penso de aŭtoro. La tekstoj de tiuj ĉi verkaĵoj servas ankaŭ por praktikaj ekzercoj de la franca lingvo kaj por ekzercado de memoro. La ĉefaj avantaĝoj de tiu ĉi praktikado estas: 1) alkitimigi infanon pensi pri tio, kion ĝi legas; 2) ordigi en ĝia menso amason da ideoj; 3) alkitimigi la infanon por la tuta daŭro de ĝia edukado, al pura kaj korekta stilo kaj al kleraj pensoj de niaj grandaj verkistoj; 4) utiligi kurson de la franca literaturo kiel praktikan enkondukon. Nenio pli taŭgas al formado de gusto kaj stilo de infano, kaj mi atribuas al tiuj ĉi ekzercoj tiel grandan gravecon, ke mi ne hezitas meti ilin en la unuan rangon. Ili estas al nia lingvo tio, kio estas la studado de verkoj de latinaj aŭtoroj al la lingvo latina. Elekti aŭtorojn por la oka klaso estas malfacile, ĉar modeloj de stiloj estas tro altnivelaj por tiu ĉi aĝo. Necesas do elekti tiujn, kiuj estas la plej instruaj kaj samtempe la plej interesaj, por alkitimigi infanon fiksi sian atenton sur tio, kion ĝi legas. Elektro de vojaĝoj, malkovro de Ameriko, Robinson kaj aliaj similaj, povus estis taŭgaj tie ĉi; sed precipe neniu fabelo, ĉar estas ridinde doni ilin en tiu ĉi aĝo en la manojn de infanoj, kvankam ofte dudekjaraĝuloj apenaŭ komprenas ilin.

La sepa klaso.

1. Sekvo de perfektigo de lego kaj skribo.
2. Sekvo de la moderna geografio. La antikva geografio.
3. La antikva historio.
4. Sekvo de aritmetiko.
5. Sekvo de la franca lingvo. El verkoj: prezento de la historio de romiaj antikvaĵoj; gaŭlaj kutimoj; prezento de la vivo de famaj personoj de Roma.
6. Linia desegno.

La sesa klaso.

1. Subtenata lego.
2. Speciala geografio: antikva, moderna kaj de mezepoko.
3. Sekvo de la antikva historio; la moderna historio.
4. Sekvo de aritmetiko.
5. Elementoj de geometrio.
6. Sekvo de la franca lingvo. El verkoj: Numa, La historio de Henri la Granda, fabeloj de Florian, Rut, Tobit, Abeille du Parnasse.
7. Bazaj informoj pri fiziko, kemio kaj la natura historio.
8. Linia desegno.

La kvina klaso.

1. Subtenata lego.
2. Specialaj historioj: antikvaj, modernaj kaj de mezepoko.
3. Fino de aritmetiko.
4. Sekvo de geometrio.
5. Sekvo de la franca lingvo. El verkoj: elektitaj fragmentoj de Buffon, Telemako, La Henriado, fabeloj de La Fontaine, La epistola lernolibro de Philipon de la Madelaine.

6. Sekvo de la informoj pri fiziko, ktp.
7. La latina kaj la greka lingvoj, aŭ la angla, la germana kaj la hispana.¹

Mi komencas la antikvajn lingvojn nur en tiu ĉi klaso, ĉar unue la gelnantoj devas firmigi ĉiujn preparajn sciojn, kiuj helpas al ili kompreni ideojn de verkistoj; due, ĉar sperto konvinkis min, ke la restanta parto de klasikaj studoj plene sufiĉas por ekkoni la aferojn pli profunde ol ordinare, kaj sen dediĉi al tio ĉi pli da ekskluziva tempo; sed ili devus sekvi iun alian metodon ol la longdaŭra kaj plena de enua rutino. Tiuj, kiuj ne lernos ilin, lernos la vivantajn lingvojn kaj povos sekvi klasikajn studojn tiom longe kiom al ili necesos.

La kvara klaso.

1. Oratora lego.
2. Elementoj de algebro.
3. Sekvo de geometrio.
4. Specialaj studoj de malfacilaĵoj de la franca lingvo. El verkoj: mirindaĵoj de Racine, elektitaj verkoj de J.B.Rousseau, mirindaĵoj de Corneille, Karakteroj de La Bruyère, elektitaj fragmentoj de Massilon.
5. La greka kaj la latina, aŭ la vivantaj lingvoj.
6. Regula kurso de eksperimentaj fiziko kaj kemio.
7. Elementoj de mekaniko.

La tria klaso.

1. Oratora lego.
2. Sekvo de algebro.
3. Fino de geometrio.
4. Sekvo de la greka kaj la latina, aŭ la vivantaj lingvoj.

¹ Tiuj ĉi tri lingvoj estas sendube la plej necesaj, kaj tiuj, kun kiuj enkalkulante la francan eblas ankaŭ vojaĝi ĉirkaŭ la mondo. La hispana lingvo, kies utilon oni ankoraŭ ne tute sentas, en kelkaj jaroj estos same necesa kiel la angla, aŭ pro vasteco de la landoj, en kiuj oni ĝin parolas, aŭ pro ĉiutage pli oftaj kontaktoj kun la Nova Mondo.

5. Franca literaturo kaj daŭrigo en la eksplikado de verkoj de francaj verkistoj, elektitaj verkoj de Boileau, poezia arto, funebraj paroladoj de Bossuet, funebraj paroladoj de Fléchier, Eneido kaj Georgikoj – kompara tradukado kun latina teksto.
6. Sekvo de kurso de fiziko kaj kemio.
7. Sekvo de mekaniko.

La dua klaso.

1. Oratora lego.
2. Sekvo de algebro.
3. Elementoj de trigonometrio, aplikado de algebro en geometrio.
4. Fiziko, kemio kaj mekaniko aplikataj en arto.
5. Sekvo de la greka kaj la latina, aŭ la vivantaj lingvoj.
6. Altnivela franca literaturo kaj komparado de verkoj de antikvaj aŭ modernaj verkistoj kun ĉefaj tradukoj.

La unua klaso.

1. Oratora lego.

Mi daŭrigas la legadon dum ĉiuj klasoj, ne ĉar infano ne scias perfekte legi havante dekdu jarojn, sed ĉar la oratora legado postulas disvolvadon de ideoj kaj sentoj, kaj tion ne eblas akiri kun aĝo.

2. Unua aplikado de matematiko en fiziko, kemio kaj astronomio.
3. Pli profunda kaj pli filozofia trarigardo de la kurso pri historio kaj geografio; legado kaj komparado de ĉefaj verkoj pri historio.
4. Komparado de literaturaj verkaĵoj, francaj, latinaj kaj grekaj, aŭ de modernaj literaturoj eksterlandaj.

La klaso de filozofio.

La unua jaro: Studado kaj kritika komparado de ĉiuj sistemoj de filozofio kaj de ĉefaj verkoj pri tiu temo. La dua jaro: Ĝenerala kaj rapida trarigardo de ĉiuj temoj realigitaj dum tiuj ĉi studoj.

Mi nur supraĵe signalis la studobjektojn en diversaj klasoj, sen detale priskribi kvanton de la materialo, kiun oni realigus en ĉiu el ili. Mi dezirus prezenti nur ĝeneralan ideon de la plano, kiun mi opinias konforma al bezonoj de individuoj kaj socio. Fine, oni komparu la instrugradon de du junaj personoj instruataj unu laŭ tiu ĉi plano, kaj la alia laŭ la plano ordinara, devigataj ili mem krei siajn rimedojn – mi demandas, kiu el ili disponos pri pli multaj utilaĵoj? Kiu pli bone scios utiligi la cirkonstancojn kiuj prezentiĝos? Kiu havos pli da ŝancoj antaŭeniri en profesia laboro? Krom tio mi demandas min, se ili ambaŭ estos devigataj ĉesi la studojn pro iu ofte okazanta kialo, kiu el ili estos malpli embarasita? La respondo estas senduba. Restas nur scii, ĉu eblas ligi ĉiujn tiuspecajn studojn, kaj ĉu estas vere necese dediĉi dek jarojn al la mortintaj lingvoj; sed mi opinias, ke tiu ĉi problemo jam delonge estas solvita.

Mi aldonus ankoraŭ la lastan rimarkon, kiun mi opinias grava, kaj kiun pluraj personoj jam faris antaŭ mi; temas pri tio, ke ĉiuj estroj de edukejoj devas konduki siajn gelerntojn al kolegiaj kursoj. Tiu ĉi devo estas tre malbonfara al progreso de instrumaniĝo, ĉar la instruistoj estas premataj malgraŭ ilia volo sekvi rutinan vojon. Krom tio, ĝi kontraŭas la promeson de tuta libereco kaj egala protekto de ĉiuj specoj de edukado; tiu ĉi promeso iĝas tiamaniere pure iluzia; oni nepre devas tion ĉi prikonsideri. Necesus, ke la sendo en kolezion estu libervola, kio permesus al ĉiu realigi proprajn planojn. Sendube oni diros ke tiu ĉi devigo estas enkondukita por garantii la sukceson de la studoj, konsiderante, ke en kolegioj ili estas pli detalaj – kiaj ili ne povas esti en privataj lernejoj, kaj por provoki pli altnivelan konkurencon.¹

¹ La aŭtoro ĉi tie pritraktas tiaman leĝon, kiu trudis al lernantoj de privataj aŭ religiaj institucioj la partoprenon en lecionoj de determinitaj lernobjektoj ĉe publikaj lernejoj, cele al ilia ekkonatiĝo kun ideologiaj bazoj de la monarkia ŝtato: religio, monarkio k.s. Tiuj estis instruataj en la latina lingvo. (noto de la tradukinto)

Rilate la unuan rimarkon mi respondus, ke la estroj de edukejoj, kiuj dediĉas sin nur al instruado, estus pli interesitaj detaligi ĝin, se ili havus pli grandan respondecon. Aliflanke, la sukceso de studoj de plimulto de junularo, dependas de bona metodo kaj malgranda nombro da partoprenantoj en ĉiu leciono, kiu se ne ekzistas, malebligas al instruistoj individuon prizorgon; kvankam estas bone konstatita kaj rekonita de la instruistoj mem, ke el cent estas entute maksimume dek kiuj sukcesas, kaj tiujn oni zorgas malprofite de la aliaj; la restantaj vegetas, aŭ senkuraĝiĝas. Rilate la duan rimarkon, mi konstatis, ke la konkurenco estas provokita ĝenerale nur ĉe la plej kapablaj individuoj; sed la restantaj naŭ dekonoj da ili estas tute senkuraĝita de malfacilaĵoj, kiujn ili sentas alfrontante homamason antaŭ ili; multaj el ili estas vere inteligentaj, sed posedante malpli rapidan rezonkapablon kaj malpli fortan memoron, ili restadas malantaŭ tiuj, kiuj ofte posedas malpli da bona volo, sed pli da facileco. La konkurencon povus ekscitadi aŭ distribuado de premioj en ĉiu kolegio, kiel oni tion praktikas; aŭ ĝenerala konkurso, kiu okazus en ĉiu akademio, kaj kiun devus trapasi ĉiuj, sendepende ĉu ili finis kolegion, aŭ ne. Por eviti tro da kandidatoj, ekzamenantoj devus ekzameni gelernantojn elektitajn de estroj de institucioj kaj kolegioj, el kiuj ili elektus nur tiujn, kiuj povus esti akceptitaj surbaze de ties instruiteco. Se oni dezirus eviti kostojn de dungo de la ekzamenantoj, oni povus devigi la kandidatojn pagi specialan ekzamenkotizon.

Jen estas la plano, kiun mi proponas, kaj kiu ŝajnas al mi taŭga por plenumi la vakuon, kiu ĝis nun ekzistas en edukado. Miaj propraj spertoj, kaj tiuj de eminentaj personoj, sur kies spuroj mi havas honoron paŝi, servis al mi kiel gvido; tio ĉi permesas plenumi la celon, kiun mi starigis al mi mem; la celon, kiu ĉiam estos la objekto de konstanta penado miaflanke en la kariero, al kiu mi tute dediĉis min pro inklino; ke tiu ĉi modesta laboro atentigu pri mankoj de nia edukistemo kaj provoku esplorojn, kiujn mi ĉiam devigus min akompanadi laŭ miaj ebloj!

Por ĝenerala plibonigo de edukado, ŝajnas do al mi absolute necesaj tri aferoj, sendepende de tio, kiun modelon oni adoptus, kaj kiujn ŝanĝojn oni akceptus surbaze de mia plano: 1) kreo de specialaj studoj pri edukarto, aŭ dirite alimaniere, kreo de pedagogiaj lernejoj; 2) ŝanĝo de plano de klasikaj studoj; 3) rezigno pri la devigo de estroj de institucioj konduki siajn gelernantojn al reĝaj kolegioj. Mi ne dubas, ke danke al forigo de tiuj ĉi tri malfacilaĵoj, edukado faros pli rapidan progreson.

Projekto de reformo
koncernanta ekzamenojn
kaj edukejojn por gejunuloj

sekvata de

propono koncernanta akcepton de klasikaj
verkoj fare de la Universitato, rilate al nova
projekto de leĝo pri instruado.

verkita de

H.L.D.Rivail,

Membro de la Reĝa Akademio de la Sciencoj en Arras,
Instituto de Historio, Societo de Naturaj Sciencoj de
Francio, ktp., ktp.

Parizo,
Eldono de la Aŭtoro, Strato Mauconseil, 18
1847

Projekto de reformo koncernanta ekzamenojn kaj edukejojn por gejunuloj

La ekzamenoj trapasataj de junaj personoj, por akiri ateston pri kapableco kaj diversajn diplomojn, estas karakterizaj ĉefe en la edukista kariero. Krom tio ekzistas gepatroj, kiuj sen plani tiun ĉi profesion por siaj infanoj deziras, ke ili tamen akiru la diplomon, ĉu kiel bonan profetaĵon por estonteco, ĉu kiel honorigan pruvon de komplete finitaj studoj. Iel ajn, tio kion faras kelkaj unuopaj personoj, povas esti ĝeneraligata kiel avantaĝo kaj kiel oficiala maniero de agado. Plurfoje oni demandis sin, kial la finon de studoj de pli junaj personoj ne signi per iu titolo, kiel tio estas ĉe gejunuloj per la grado de bakalaŭro. Se tia ekzistus, ĝi estus sendube kuraĝiga al ties posedanto- aŭ kiel honora titolo, kiam sorto ne devigas tiun labori; aŭ en kontraŭa kazo, kiel helpa rimedo.

Nuntempe, kiam virinoj estas vokitaj plenumi gravajn taskojn en komerco, industrio kaj eĉ en administrado, posedo de diplomo atestanta pri iliaj kapabloj, estus atesto pri konfido kaj garantio por la personoj, kiuj povus ilin dungi. Deziro akiri la diplomon provokus laŭdindan konkuron en familioj kaj inter gelernantoj kaj instruistinoj. Por la familioj ĝi estus samtempe garantio kontraŭ ĉarlatanismo, kiu ruze profitas facilanimecon kaj nescion de gepatroj, promesante al ili iujn rezultojn, kiujn sperto devigas rifuzi. Kiujn do efikajn rimedojn posedas gepatroj, por konstati progreson de siaj infanoj? Neniujn; ĉar ĉiu scias, ke trarigardado de taskokajeroj povas doni nur tre supraĵan imagon pri ilia sukceso, kaj dum periodaj ekzamenoj organizataj en edukejoj, oni atribuas pli grandan intereson al akiroj kaj al kaŝo de malfortaĵoj, ol al serioza kontrolo. Eĉ vizitoj kaj enketado fare de gekontrolistoj apenaŭ permesas konstati nur bonan kondiĉon de hejmo, kaj tian pli aŭ mapli kontentigan laboron, sed pravas nenion pri

la reala individua situacio de ĉiu infano. Kiam do fini la studadon? Neniu indikas tion. La finpunkto restas absolute nebula; ĉiu fiksas ĝin laŭ sia plaĉo; oni haltas, kiam oni opinias, ke la infano jam scias sufiĉon; kaj tre ofte tio okazas tro frue, antaŭ ol oni lasos al ĝi la materie necesan tempon por akiri kompletan instruitecon; tiurilate plej ordinara regulo iĝas kaprico. Same, kia estas ankaŭ, en la nuna stato de la afero, kompleta instruado de knabinoj? Neniu sciis diri ion certan. Alie, klare antaŭvidante alirpunkton, ĉiu scias la atingendan celon, kaj oni strebas al ĝi; persistemo de gelernantoj ne laciĝas ĉe la fino, sed duobliĝas antaŭ la decida momento; klopodo de instruistinoj kaj instruistoj estas serioze ekscitita; fine, ĉarlatanado de falsaj promesoj kaj indulgoplenaj bultenoj falas antaŭ la oficiala kaj serioza ekzameno, en kiu ĝentileco kaj cedemo havas neniun influon. Eĉ se tiu ĉi ekzameno interesas familiojn kaj gelernantojn, ĝi ne malpli interesas ankaŭ la instruistinojn kaj instruistojn, kiuj multe malpli ofte realigadus nur edukadon limigitan pro tempo-manko. Eĉ la registaro trovus tie ĉi garantion rilate al realeco de la instruado plenumita en privataj institucioj.

La plej grava afero, malgraŭ ĝia pura formaleco, estus doni nomon al tiu ĉi titolo. Estus necese, ke tiu ĉi nomo estu sufiĉe karakteriza kaj sufiĉe ĝenerala, por ne rememorigi *en iu ajn maniero* la instruproceson, kaj ke ĝi ne povu esti konfuzata kun la specialaj diplomoj por instruistinoj. Necesus, ke gepatroj povu esti bone konvinkitaj, ke akirigante ĝin al siaj infanoj, ili ne destinas al tiuj estontecon ligitan kun edukado, sed ke ĝi povas esti utila en iu ajn socia pozicio. Oni do povus nomi ĝin – se ne estus pli bonaj sugestoj, *atesto pri studado*; same, kiel oni nomus *diplomo pri instruado* la specialan titolon por instruistinoj.

La scioj necesaj por akiro de la *atesto pri studado*, devus esti diferencaj de tiuj postulataj por diplomigo de instruistinoj, laŭ enhavo kaj kontrolmaniero. Same, la unua ekzameno, kiun oni trapasas nuntempe en la Magistrato, ne konvenas al tiu ĉi celo: al certaj temoj oni atribuas tro grandan

gravecon ĉe kelkaj personoj, samtempe preterlasante aliajn. Tiuj ĉi scioj devus havi la karakteron de ĝenerala utileco, pli praktika ol teoria. Por ĉiutaga vivo, virinoj bezonas scii iom pri ĉio, ĉu por ilia persona uzo, ĉu por transdoni al siaj infanoj ĝustajn spertojn kaj prizorgi ilian edukadon; ekzistas tamen malmultaj sciencoj kies studado postulus iom pli da profundigo, ĉar, kompare kun viroj, virinoj tre malofte estas vokataj ludi tre karakterizajn karierojn, krom la edukista mem, kaj nur koncerne ĉi tiun ili devas daŭre esti speciale ekzamenitaj. Nu, por instrui, oni devas ne nur scii la temon; oni devas posedi teorion en ĉiuj detaloj, por klare ĝin komprenigi; ekster tio, por ĉiutaga ordinara vivo de homo, en plimulto de kazoj la ĝenerala scio sufiĉas. Krom tio mi komprenas, ke postuloj tiurilate devas esti regulataj laŭgrade de la reala utileco de ĉiu scienco, kaj ekzemple la *franca lingvo* aŭ *aritmetiko* estus lokitaj en la unuaj rangoj. Jen kiuj povus esti tiuj ĉi scioj:

1. *La franca lingvo* – Teoria ortografio kaj neriproĉebla praktiko; kompletaj principoj de gramatiko.
2. *Aritmetiko* – Kompleta teoria kaj praktika kono ĝis radikalaj *ekskluzive*. La proponitaj problemoj estus elektitaj laŭ ofteco de kutima uzado, kaj ne en arbitra kombino kun malofte troveblaj malfacilaĵoj.
3. *Geometrio* – Elementaj principoj aplikataj en desegnoj kaj en ordinara uzado.
4. *Geografio* – Kutime utiligata kaj ĝenerala partoj, sen aplikado de detaloj rilatantaj al apenaŭ konataj minoritatoj.
5. *Historio* – Kono de la plej gravaj faktoj de la universala historio kaj de la historio de Francio.
6. *Naturaj sciencoj* – Elementaj informoj de fiziko kaj de la natura historio, surbaze de ilia kutima aplikado, precipe de tiu rilatanta al ĉiutaga vivo. Kelkaj utilaj principoj de higieno kaj hejma ekonomio.

Tia estus pli malpli la enhavo de la ekzameno. Oni vidas, ke nur du sciencoj, la *franca lingvo* kaj *aritmetiko*, estas pri-

traktataj tie ĉi en pli profunda maniero; ĉe la aliaj oni kontentiĝus per pli aŭ malpli larĝaj informoj, respektive al ilia graveco.

Celante fiksi la ideojn kaj de ekzamenantoj kaj de kandidatoj, kaj kompili precize limojn de la studoj, estus grave posedi *tre detalan* programon priskribantan la tutan materion pritraktatan dum la ekzameno. Ĝeneralajn programojn karakterizas la malavantaĝo lasi troon al arbitreco de ekzamenantoj, kiuj ne ĉiam limigas sin al precizaj normoj kaj tiel ili metas gelernantojn en vastan embarason.

Por kovri kostojn de tiuj ekzamenoj, oni povus postuli pagon, kiel oni faras tion ĉe bakalaŭro, en formo de varia enspezo, ekzemple 20 frankoj aŭ pli – sumo, kiu estus ne tiom alta por ke ĝi ne senkuraĝigu malriĉajn familiojn. De tiuj, kiuj malsukcesos unuafoje, oni povus postuli la krompagon de 5 frankoj ĉe ĉiu nova provo. Tiamaniere oni juste rekomencus la penon rezultintan de ilia nekapablo. Tiun pagon, kies justecon neniu povus nei, karakterizas avantaĝoj, kiuj rezultas el la proponita alteco, ne estanta iu ajn ŝarĝo; ĝi malebligas, kiel oni faras tion nuntempe, limigadon de nombro de kandidatiĝoj, ĉar tiamaniere naskiĝas intereso faciligi ilin; tio malaperigos obstaklojn ekzistantajn pasinte en la instruista kariero.

Rigardante la ekzamenojn tiaj, kiaj ili nuntempe estas organizataj, oni estos frapita de nenormalaĵoj kaj pluraj kontraŭdiroj, kiujn ili prezentas – same rilate al rajtoj, kiujn ili donas, kiel al starigataj postuloj. Oni scias, ke diplomoj de la Sorbono kaj aliaj akademioj de la reĝolando, validas en la tuta Francio – sed, ke ili estas specialaj por instruistoj de baza instruado kaj donas nur la rajton direkti eksterulejojn. Diplomoj de la Magistrato donas la titolon de majstrino de pensio aŭ institucio, sed ili estas validaj nur en Parizo. Se temas pri la postuloj starigitaj al ekzamenatoj, inter ambaŭ programoj ekzistas nek korelativeco, nek gradigo; videblas, ke ili estas kreitaj sendepende kaj sen spirito de reciproka korespondeco; tamen rilate la leĝan karakteron, ili reprezentas pli

malpli saman kategorion, ambaŭ estante same malfacilaj – escepte la diplomon de majstrino de institucio, kiu postulas vere superajn sciojn, restante tamen titolo pure honora, sen specialaj privilegioj, kaj pro tio ĝi allogas malmultajn kandidatojn. Ni parolas tie ĉi nur pri la du unuaj diplomoj de la Magistrato, kompare al tiuj ĉi de la Sorbono, la solaj kiuj sufiĉus.

Tiel do ni havas la elekton: aŭ tiuj ĉi diplomoj estos traktataj egale, kaj konsekvence laŭleĝe devus rajtigi same; aŭ unu estos malsupera rilate al la alia, kaj se estas tiel, kial starigi similajn postulojn? Se en ili oni ne konstatos superecon aŭ malsuperecon de scio; se akiro de unu el ili estos same malfacila kiel tiu de la alia, kaj ambaŭ postulos la saman kvanton de simile seriozaj studoj, kial do ne doni la samajn privilegiojn? Se male, la diplomo de majstrino de pensiono, liverita de la Magistrato, estas rigardata hierarkie kiel supera al tiu ĉi de la Sorbono, ĝi ŝajne konstatas superecon de kvalifikoj; en tiu ĉi kazo oni komprenas, ke la rajto posedi pensionon estus rifuzita al persono, kiu ne havas tiun titolon; estas tamen nekompreneble, ke la permeson de funkciigo de eksterulejo oni rifuzas al persono, kiu posedas nur la diplomon de la Magistrato, ĉar la diplomo donas la titolon de majstrino de pensiono, kaj ne tiun ĉi de instruistino de baza lernejo. El tio efikus tia trudita kaj absurda konsekvenco, ke titolitino kun la diplomo de majstrino de pensiono, kiu pro sia plaĉo aŭ iu alia motivo ne dezirus havi en sia edukejo dormantajn surloke gelernantojn, kiu volus limigi sin nur al elementa instruado, kaj kiu dezirus tiamaniere sciigi publike, ke ŝi deziras nur dumtage eksterulojn – ŝi ja estus devigita nomi sian edukejon *pensiono* kaj meti en siajn reklamfoliojn informon, ke ŝia edukejo estas tia pensiono, en kiu oni akceptas nur dumtage ĉeestantajn gelernantojn; unuvorte, ŝi devus posedi pensionon sen pensionuloj. Oni diros sendube, ke tiukaze ŝi devus akiri la diplomon de baza instruado; sed – mi insistas pri la temo – se la diplomo de majstrino de pensiono atestas pri intelekta supereco, kial oni ne opinias ŝin

kapabla gvidi simplan lernejon por malgrandaj infanoj? Ĉu ne estus simile, se oni opinius kuraciston nekapabla deĵori kiel oficiro respondeca pri sano, aŭ farmaciiston esti apotekisto? Kial limigi ties rajton al nur unu departemento? Same, ĉu la instruado ricevita kaj kontrolita en Parizo, ne donas sufiĉan garantion en provinco? Ĉu ne estas do absurde, ke la instruistino diplomita de la plej malproksima akademio, povas funkciadi ie ajn, eĉ en Parizo – kaj samtempe iu posedanta tri diplomojn el Magistrato de Parizo, estas juĝata kiel netaŭga por gvidi mizeran edukejon en la plej malgranda vilaĝo?

Kial do, fine, la diplomo pri baza instruado ne estas la necesa ŝtupo por iri al pli superaj gradoj, same kiel oni praktikas ĉe ĉiuj aliaj fakoj, kie oni povas esti nek licenciito sen trapasi bakalaŭron, nek doktoro sen esti licenciito? Ĉu oni diras, ke tiel okazas, ĉar la diplomojn enmanigas diversaj aŭtoritatoj? Sed, se tiuj aŭtoritatoj deziras dividi siajn farojn laŭ kompetentoj, ĉu tio ĉi ne permesas, ke ekzistu iu unueco, gradigo kaj hierarkio en organizado? Ĉu ne estas absurde, ke kiam du aŭtoritatoj ne akordiĝas pri similaj aferoj, ĉiu el ili povas krei propran programon, proprajn regulojn kaj proprajn kondiĉojn, senkonsidere al la postuloj de la alia? Tiamaniere, laŭ nuntempe aplikata sistemo, la posedanta centralan povon Universitato, kiu okupiĝas pri publika instruado pro sia karaktero, ne povas respondi pri pensionoj por junaj personoj kaj havas neniun rajton kontroli tiuspecajn edukejojn; de tio ĉi sekvas, ke la sama edukejo, en kiu neniel ŝanĝiĝas laborkondiĉoj kaj materia situacio, dum funkcias en Parizo amaso da *eksterulejoj-pensionoj* sen pensionuloj, povas – kaj tio ofte okazas, pro ŝanĝo de posedanto diplomita aliloke, leĝe aparteni alterne jen al unu, jen al alia respondeca aŭtoritato. Oni devas agnoski, ke tia ĉi stato de aferoj estas ne tre logika. Sed jen alia strangaĵo, tute natura konsekvenco de manko de unueco. La grado akirita ĉe unu el la du aŭtoritatoj, havas neniun valoron kompare kun la alia; tiel persono posedanta superan titolon de la Sorbono, kies akiro postulis de tiu vere seriozajn sciojn – se la persono dezirus

krom tio akiri diplomon de la Magistrato, por povi ricevi la permeson gvidi pensionon, tiu devas plenumi ĉiujn provojn, kvazaŭ tiu prezentiĝus por la unua fojo kaj trapasi la kurson por submajstrinoj. Simile estus kun la persono, kiu posedus la triagradan diplomon de la Magistrato kaj ne povante praktiki en Parizo, dezirus akiri diplomon de la Sorbono. Sed ankoraŭ la plej eksterordinara fakto estas, ke oni vidis kelkfoje personojn posedantajn nur titolon de la Sorbono, ne ricevi la rajton instrui kiel submajstrinoj en pensionoj. Mi diras *kelkfoje*, ĉar ĝi ne estas neŝanĝebla regulo; sed tio ĉi pruvas almenaŭ, ke en tiu ĉi administra branĉo ekzistas nek iu regula plano, nek unueco de opinioj, nek klare difinita hierarkio; ke regas konfuzo, vera anarkio de diversaj titoloj donitaj de aŭtoritatoj, kiuj ne tute akordiĝas reciproke, kaj kiuj – male – iamaniere konkurencas inter si, kontraŭstaras unu la alian; unuvorte, oni devas havi iun klare kaj pure cizelitan regulon. Alia ne malpli ŝoka kontraŭdiro estas la postulata aĝo; dum la Sorbono por la kurso de baza instruado, eĉ tiu ĉi de elementa instruado, akceptas nur kandidatojn pli ol dudekjaraĝajn – la Magistrato permesas fari la samon al deksekjaraĝuloj. Se la titolo de la Sorbono estas malpli supera en hierarkio rilate al la urba, kiamaniere okazas, ke eblas ĝin ricevi nur kvar jarojn post la supera grado? Vere, eĉ se la Sorbono kaj la Magistrato apartenus al du diversaj landoj, ne eblus pli kompliki ilian leĝaron.

Por malaperigi tiom ŝokajn kaj bedaŭrindajn kontraŭdirojn, oni devus aperigi inter la du titoloj iun intiman korelativeton, iun realan gradigon en trapasendaj provoj, iun klaran hierarkion difinitan leĝe; unuvorte, estus necesa unueco de kriterioj, kiu neniam okazos, se pri organizado ne respondecos centrala aŭtoritato. Jen la principoj, kiuj povus servi kiel bazo de tiu ĉi regula kaj uniforma organizo:

1. Adopti sistemon de *atestoj pri studado*, kiujn ni menciis. Kiel ni diris, la celo de tiuj ĉi atestoj estus konstati plenumon de kompletaj studoj kun difinita

- kvanto de scio, sen akcepto de profesio. Oni povus doni ilin sen problemoj al dekseksjaraĝuloj;
2. Permesi trapasi la specialajn ekzamenojn pri instruado nur al personoj posedantaj la ateston pri studado;
 3. Limigi ĝis *tri*, la nombron de instruistaj gradoj;
 4. Anstataŭigi diversajn relativajn titolojn rilatajn al instruado, per *unuforma kaj karakteriza* DIPLOMO DE INSTRUISTINO, al kiu oni aldonus rimarkojn, por precizigi specialajn gradojn: *pri baza instruado, pri dua-grada instruado, aŭ pri supera instruado*. La unua korespondus pli malpli kun la valoro de la aktuala diplomo de la Sorbono; la dua kun tiu ĉi de la majstrino de pensiono, kaj la tria kun la diplomo de la majstrino de institucio, krom la ŝanĝoj necesaj por enkonduki en la programon nuntempe postulatajn konojn;
 5. Doni la rajton instrui kiel submajstrinoj, al ĉiu persono posedanta la *ateston pri studado*;
 6. Doni la rajton gvidi propran edukejon, nur al personoj posedantaj la *diplomon de instruistino*;
 7. Difini karakteron de edukejo, kiun oni rajtus gvidi posedante diplomojn de certaj gradoj;
 8. Krei inter diversaj diplomoj gradigon, kiu devigus kandidaton al supera titolo, posedi diplomon de la malpli supera nivelo;
 9. Liveri la diplomojn pri instruado al ĉiuĝuloj, kiuj akiris la *ateston pri studado*, escepte de kiam oni determinas aĝon por gvidi propranome edukejon;
 10. Disetendi sur tutan Francion la rajtojn ligitajn kun diplomoj pri instruado, kia ajn estus ilia grado;
 11. Difini per tre detala programo, *unuforma por tuta Francio*, precizan kvanton de scio postulata por ĉiu ekzameno;
 12. Se oni dezirus konservi du ekzamencentrojn, necesus atribui al unu el ili nur la atestojn pri studado, kaj al la alia – la diplomojn pri instruado. Tiukaze estus pli

bone, se la unuaj dependus de municipaj instancoj, kaj la duaj de la Sorbono.

Tiamaniere, kiel oni vidas, la rajtoj kaj devoj estas klare difinitaj; ne plu estas konfuzo, nek kontraŭdiroj; se la titoloj estas liverataj de du aŭtoritatoj, ili tamen estas bazitaj sur iu komuna penso; unuvorte, en la organizo estas unueco.

Akcepto de detala programo por ĉiu speco de ekzameno estas la normo necesa kaj urĝa, ĉu por krei inter ekzamenoj gradigon kaj unuigon de respektivaj planoj; ĉu por helpi fiksi ideojn de kandidatoj kaj ekzamenantoj, ĉar tiuj ĉi lastaj ofte havis tendencon al troigo kaj postulado de tro larĝa materialo; el tio rezultos la fakto, ke akcepto aŭ malakcepto de iu afero okazos pure arbitre, dependanta kontraŭe nur de ekzamenanto, ĉio restadas nebula; alie, perfekte sciante la devigan programon, oni povos esti certa pri sukceso. La programoj devas lasi al arbitro de ekzamenantoj nur konstaton de pli aŭ malpli profunda scio de kandidato; se limoj estas difinitaj, oni ne rajtas permesi iri trans ilin, ĉar alimaniere programo estus ne necesa. La veran severecon akompanantan tiujn ĉi ekzamenojn, oni pravigas per nombro de kandidatoj, kiuj malsukcesas en la instruista kariero; tamen tiu nekonvenajo ne plu eblus post enkonduko de la *atesto pri studado*, kiun ni proponis krei; kontraŭe, oni dezirus ke la nombro de sukcesintoj kresku. Rilate la diplomojn de instruistinoj, ili tutcerte bezonas pli detalan pritrakton, precipe kiam temas pri amplekso de scioj de kandidatinoj; samtempe ni rimarkigas, ke la aplikata tiurilate severeco tre ofte koncernas detalaĵojn kun diskutenda utileco; estas simile, kiam demandante pri la bibliaj rakontoj, oni starigas problemojn embarasiĝantajn spertajn teologojn, kies solvojn ne eblas trovi en ordinaraj, klasikaj verkoj. Por esti justa, oni devas agnoski, ke de iu tempo oni sin limigas, precipe rilate al aritmetiko, al problemoj multe pli raciaj. La proponataj problemoj estas elektitaj laŭ skemo multe pli utila kaj praktika; kaj oni tute prave evitas prezenti ne aplikatajn komplikajojn, kreitajn nur

pro plezuro amasigi malfacilaĵojn, kaj kiujn oni neniam renkontas. Estus vere dezirinde, ke tiu ĉi plibonigo disetendiĝu sur aliajn branĉojn de instruado. Estus same dezirinde, ke ĝesinjoroj ekzamenantoj, okupiĝantaj pri iuj specialaj teorioj, ne pritraktu nur tiujn ĉi teoriojn, rigardatajn kiel favoraj kondiĉoj. Necesas postuli precipe la perfektan scion de ĝeneralaj reguloj; posedo de informoj pri iuj specialaj teorioj devus esti rigardata kiel kroma merito; krome, estus tutcerte maljuste, ne akcepti kandidatinon nur pro tio, ke ŝiaj respondoj ne konsentas kun la vidpunkto de ekzamenantoj.

Ĉu la aktuala klasifiko de edukejoj, dividanta ilin je eksterulejojn kaj pensionojn, montras ilian relativan reciprokan superecon? Evidente ne. Ĉiu scias, ke ekzistas simplaj eksterulejoj multe pli gravaj, ol certaj pensionoj kaj eĉ institucioj. La problemo de pensiono kaj eksterulejo estas simpla problemo de materia organizo kaj lokalaj eblecoj; nia opinio, ne ekzistas iu ajn kialo doni pli da instruoj al ĝelernantoj, kiuj havas eblecon dormi kaj manĝi surloke, kaj ne doni ĝin al tiuj ĉi, kiuj similan eblecon ne povas havi. Ni diros eĉ pli, ke tiu ĉi sistemo kontraŭas libervolon de familioj. Konsekvence de tio, se iu eksterulejo estas limigita rilate instruon, kiun ĝi povas doni; se iu supera instruado rajtas okazi nur en pensiono; kion faros la gepatroj, vere multnombraj, kiuj pro deziro aŭ bezono, ne volas apartiĝi de siaj infanoj? Ĉu jam devigitaj sendi ilin al eksterulejoj, ili same devas provizigi al siaj infanoj nur elementan instruon? Ĉu senigi ilin je avantaĝo de monŝparoj, kiujn ili trovas en tiuspecaj edukejoj? Oni respondos, ke eblas havi eksterulejojn nomataj pensionoj kaj pensionojn, kiuj akceptas eksterulojn; sed ĉikaze temas nur pri vortludo; ĝi estas deturnado de nomoj for de ilia funkcio; unuvorte, la problemo koncernas nomadon de aferoj propranome. Mi eĉ diros, ke tio ĉi erarigas publikon. Estas absurde, kiam oni aperas en edukejo por enskribi infanon en pensionon, ĉar tiu ĉi estas la nomo de la loko, kaj oni aŭdas la respondon: ni havas pensionon, sed ni tute ne akceptas pensionulojn. Multe pli grave estas, ke pluraj familioj vidante re-

klamon de pensio aŭ eĉ de institucio, esperas trovi en tiu ĉi edukejo instruon konforman al la indikita grado, kvankam ofte oni ricevos tie apenaŭ elementajn sciojn. Ni do ripetas, ke la ekzistanta inter edukejoj hierarkio de eksterulejoj aŭ pensioj, nek al familioj, nek al la registaro donas indikon pri grado de ilia valoro rilate instruadon, kaj tiu ĉi sistemo povas kaŭzi nur erarojn kaj malestimon.

Por esti pli logika, oni devus nature alĝustigi nomojn kun funkcioj; rezervi la nomojn *eksterulejo* kaj *pensio* por distingi nur materiajn kondiĉojn de edukejo, sen atribui valoron al grado de tiea instruado, kaj specifiki naturon de tiu ĉi edukejo per konkreta difino de tiu ĉi grado. Tiamaniere: ĉiuj edukejoj, kiuj akceptadus nur eksterulojn, estus devigitaj porti la klaran nomon *eksterulejo por junulinoj*; tiuj ĉi akceptantaj nur pensionulojn – tiun ĉi de *pensio*; kaj fine la edukejoj kun miksitaj funkcioj, estus kvalifikitaj duoble, kiel *pensio* kaj *eksterulejo*. La nomo komunuma senpaga lernejo estus rezervita nur al municipaj edukejoj. La rajton uzi la nomon pensio, oni donus nur post ekzamenado de la loko fare de kompetenta aŭtoritatulo, kiu kontrolus, ĉu la domo estas ĝuste ekipita kaj respondas al necesaj postuloj pri higieno. Grado de la instruo donata en tiu ĉi loko, estus priskribata per rimarko pri *baza, duagrada* aŭ *supera instruado*. Danke al tio ĉi, la nomo eksterulejo ne plu implikis ideon pri malsupereco – male, oni povus havi eĉ *eksterulejojn* kun supera grado de instruado; same la nomo *pensio* ne plu implikis ideon pri supereco, ĉar oni povus havi pensiojn kun baza instruado, kaj ankaŭ tiujn ĉi kun la supera. Danke al tio, ĉiu konfuzo malaperus, ĉiu domo estus klasita laŭ sia naturo kaj graveco, kaj nek publiko, nek la registaro plu povus erari. Ni rajtas alvoki tiurilate la ekzemplon de reĝaj kolegioj, el kiuj kelkaj, ne estante pro tio malsuperaj, akceptas nur eksterulojn, kaj iliaj direktoroj ne estas liberigitaj de realigo de iu ajn kondiĉo, kiun realigas iliaj kolegoj el kolegioj kun internulejo.

Oni eble respondos, ke devoj kaj respondeco de majstrino de pensio estas multe pli grandaj ol tiuj ĉi de direktorino

de eksterulejo; ke ĝuste pro tio estas racie starigi por ili pli severan provon. Pensiono, oni diros, estas kvazaŭ hejmo, do devas okazadi tie ĉi edukado perfekte kompleta el la vidpunktoj intelekta, fizika, psika kaj religia; lernantinoj devas akiri tie ĉi sciojn necesajn al dommastrinoj kaj patrinoj. En eksterulejo, kontraŭe, la perioda kaj limigita ĉeesto de infanoj permesas okupiĝi nur pri instruado.

Tiu ĉi riproĉo estas vera nur en unu punkto, ĉar oni ne povas diri, ke la sola misio de eksterulejoj estas instruado; la morala kaj religia edukado – male, ludas tie ĉi rolon des pli gravan, ĉar okazas ĉe malfacilaĵoj kaŭzitaj de eksteraj kontaktoj, kaj tio postulas multe pli da atento de instruistino; krome, oni ekzameni ĝeneralajn sintenojn kaj psikajn kvalifikojn de pensionuloj kaj eksteruloj, kaj oni konstatos ĉe ĉiuj bonon kaj malbonon, do supereco de iu ajn edukejo tute ne signifas apartigon de unuj for de aliaj. Same menciante, ke majstrino de pensiono bezonas pli da sperto, oni tute ne pensas, ke la sperton donos al ŝi iu supera instruisto; iom pli da historio, geografio, ĉu literaturo neniel helpas al ŝi kompreni siajn devojn de kvazaŭ dua patrino, se ŝi mem ne estos pri tio konscia; neniuj sciencoj donos al ŝi la sperton, kiu al ŝi mankas. Afero la plej necesa al majstrino de pensiono, estas la talento de administrado, estas la spirito de ordo kaj ŝparo; sen ili, eĉ se ŝi havus kompetentecon de doktoro, ŝi lasos la domon fali kun damaĝo al siaj propraj interesoj kaj al eduko de siaj gelnantoj; ĉar eĉ se en la domo simila al akademio protektata de sciencoj, regos spirito de malordo, malŝparo, manko de disciplino – instruado kaj edukado suferos egale. Direktorino de edukejo, ne gravas – ĉu de pensiono, ĉu de eksterulejo, bezonas posedi takton, scipovemon, praktikajn kutimojn kaj konon de amaso da aferoj, kiujn oni neniam ellernos helpe de iu ajn libro; ĝi estas, unuvorte, se mi rajtas esprimi min tiamaniere, iuspeca scio de metio – scio, kiun ne eblas konstati per ne gravas kiom da severaj ekzamenoj.

Ĉi supraj rimarkoj nature gvidas nin al ekzamenado de garantioj en la instruista kariero. Ekzistas tri naturaj garantioj:

kapableco, moraleco kaj sperto aŭ *scipovemo*. *Kapablecon* oni povas konstati nur dum ekzamenoj. Rilate *moralecon*, oni bone konas la valoron de atestiloj liverataj de atestantoj. Pri *sperto* tamen oni tute ne okupiĝas, ĉar ni posedas neniu rimedon por konstati ĝin. Ekzistas tamen unu, la sola, kiu povas doni seriozan garantion pri moralo kaj sperto; la rimedo estas tiu ĉi, kiun mi proponis en 1831, en presita memuaro, adresita al la Universitato, koncernanta edukejojn por junaj personoj. Ĝi konsistas el deviga kaj rigore kontrolata staĝo, okazanta dum kelkaj jaroj en iu edukejo. Mi opinias, ke ĝi estus la plej bona kaj la plej certa garantio pri moralo kaj sperto, ĉar neniu direktorino konservus dum *sufiĉe longa* tempo submajstrinon, se tiu ĉi ne kontentigus ŝin laŭ la du menciitaj aspektoj. Tiamaniere, kandidatino akiras samtempe, sen respondeco, la sperton, kiu al ŝi mankas kaj la scion pri amaso da detalaĵoj, kiujn nur praktiko povas alporti, kaj sen kiuj ŝi povus fari al infanoj en lernejo iujn damaĝojn. Ankaŭ danke al tio, la instruista kariero iĝos pli serioza, kaj oni ne plu renkontos tiom da personoj, kiuj entreprenas ĝin kiel la lastan savrimedon, ne sciante fari ion alian kaj opinias sin kapablaj gvidi edukejon, ĉar ili havas iom da scio kaj mono, kvankam ne sciante la unuajn kondiĉojn de sukceso; danke al tio ĉi, fine, la profesio de majstrino de studoj estus pli-valorigita kaj akirus certan gravecon, por poste fariĝi necesajo.

Daŭro de tiu ĉi staĝo povus esti fiksita por tri jaroj en ununura, aŭ du edukejoj, el tio almenaŭ unu en institucio kun la karaktero de laboro planita por estonto; en ĝi oni devus restadi almenaŭ unu jaron kiel la unua, aŭ la dua submajstrino. Tiu ĉi devo ofertus ankoraŭ unu, ne malpli gravan avantaĝon: ĝi permesus ĉesi la nedifinitan variecon de tiuj ĉi efemeraj institucioj, sen firmo, kaj krome malbonfaraj al junularo, ĉar pro ilia nestabila ekzistado, ili ne povas ampleksi elementojn de bona edukado. La registaro volas akiri tiun ĉi celon ĉiam malfaciligante ekzamenojn; tiu ĉi rimedo estas tamen ne efika, ĉar ĉiam oni trovos sufiĉan nombron da kleraj

personoj, por kontentigi postulojn, kaj tio ĉi ne malaperigos specialan nekompetentecon, preskaŭ neapartigeble akompanantan fieron, ĉar tion ĉi povus fari nur la rimedoj proponitaj de ni ĉi-supre.

Propono koncernanta akcepton de klasikaj verkoj fare de la Universitato, rilate al nova projekto de leĝo pri instruado.

La artikolo 15-a de la nova projekto de leĝo pri Instruado, priskribas ekskluzivan uzadon de verkoj aprobitaj de la Universitato, en ĉiuj institucioj de publika klerigo. Ĉiujn frapis la gravaj konsekvencoj de tiu ĉi regulo, pri kiu ni opinias necesa prezenti kelkajn rimarkojn.

La klara celo de la Universitato proponanta tiun ĉi regulon, estas krei baron kontraŭ enkonduko de malbonfaraj verkoj. Tiurilate ni estas for de kontesto de ĝia rajto tion fari, ni eĉ opinias, ke tio estas ĝia devo, kaj ke ĝi estus kulpa tolerante uzadon de libroj, kiuj pro sia naturo kontraŭus moralon kaj publikan ordon. Sed se iuj verkoj povus estis danĝeraj, tute certe tiaj ne estas tiuj, kiuj temas pri lingvoj, matematiko, geografio kaj aliaj pozitivaj sciencoj. La projekto de la leĝo tamen, faras neniun distingon; ĝi miksas kadre de la sama malŝato, senkulpan gramatikon kun traktaĵoj pri moralo kaj filozofio, kiuj ne ricevis ĝustan aprobon. Kun tiu ĉi regulo, oni devas forstreki la ideon pri libereco de Instruado; ĉar tiu ĉi libereco devas konsisti precipe el libervola elekto de tiu aŭ alia instrumentado, multe pli ol tio – el nelimigita kaj senĝena ebleco krei edukinstituciojn. La regulo absolute bremsus tutan progreson, ĉar fakte ĝi malpermesus uzadon kaj eksperimentadon de ĉiu nova metodo, kaj ne permesus al geinstruistoj kaj estroj de edukejoj uzi iliajn proprajn verkojn. Sur kio apogis sin ĝis nun la Universitato, kaj apogos sin en estonteco, donante aŭ rifuzante aprobon al iu verko? Verdire,

estus malfacile diri tion; ĉar ĝi ĉiam rifuzis, kaj verŝajne daŭre rifuzados prezenti iun oficialan regularon rilate verkojn enhavantajn difinitajn metodojn, timante engaĝi sian respondecon kaj famon de sia nomo, en kreadon de novaj sistemoj. Sed, eĉ sen trakti pri specialaj kaj karakterizaj metodoj, oni vidas en certaj kazoj ĝian intervenon kun neklarigebla severeco – eĉ sur verkojn ne pretendantajn enkonduki novaĵojn, kvankam rilate aliajn montriĝas vere eksterordinara, same malfacile klarigebla ĝia tolero; neniu scius difini la motivojn de aprobo aŭ malaprobo de verko. Se tiu ĉi aprobo havus nur pure honoran karakteron, ĝiaj konsekvencoj estus malpli gravaj; ĝi tamen iĝas parto de giganta monopolo, profitdona al *Kelkaj Personoj* kaj ruiniga al pluraj. Tiu ĉi monopolo estas grandega, ĉar sekve de tio, la merkato de klasikaj verkoj, kiuj estas unu el la plej gravaj, iĝas ekskluziva havaĵo de *Kelkaj Privilegiuloj*; ĉar kiu eldonejo, ĉe tiuspeca leĝo, dezirus kovri eldonkostojn de verko timante, ke oni malaprobos ĝin, kiel tio ofte okazas sen montrado de motivoj, kio ĝis nun aspektas kiel nebula problemo de arbitra volo? Tiu ĉi leĝa regulo enhavas do mortigan frapon al du gravaj aferoj: al vera libereco de instruado, kiu povas senminace disvolviĝi, kaj sen kiu ne ekzistos progreso; kaj al tiu ĉi de merkato. Ni esperas, ke la Sinjoroj leĝodonantoj komprenos, kiom danĝere estas tiom senkondiĉe sankcii tian leĝon.

Jen nun, kiu estus nia opinio la solvo de la problemo de garantio de libereco, kun samtempa respekto al leĝaj postuloj.

Ĝis nun, ĉiu publikigita verko devis esti deponita en direkto de eldonejo. En la nova leĝo oni povus precizi, ke unu aŭ du ekzempleroj de ĉiu verko destinita al instruado, de iu ajn grado ĝi estus, aŭ kiu estus *donacita kiel premio*, oni deponos en la Universitato. La fakton de la depono oni povas konfirmi per enskribo en la verko de jena formulo: *Deponita ĉe la ministerio pri publika klerigado*. Pri ekzamenado de tiuj ĉi verkoj estus ŝarĝita konstanta komisiono; kaj je ĝia propono, la Universitato kreadus indikson de libroj, kiuj ne respondas al principoj de moralo kaj publika ordo, en kiuj

historiaj faktoj prezentiĝas konforme al partecaj reguloj – unuvorte de tiuj, kies disvastigado estus danĝera el la *moralavidpunkto*; uzado de tiuj ĉi verkoj estus tute malpermesita; la ebleco de vetoo limiĝus tamen al tiaj ĉi verkoj. Dume, la ceteraj verkoj, por ke estu respektata libereco de iliaj aŭtoroj rilate sciencajn principojn kaj metodojn, ne devus ricevi ian ajn ĉu *aprobon* ĉu *malaprobon*, kio estus iu silenta permeso de la Universitato, ĉe kiu neniel ĝi engaĝas sian respondecon rilate al valoro de la verkoj. Enkondukante tiun ĉi devon de depono, oni havus la certecon, ke neniuj libro estos uzata kaŝite de la aŭtoritatoj, kio tamen lasus al ĉiu ĝia uzanto plenan liberecon de elekto koncerne metodon. Se dum la periodo de ses monatoj de la tago ekde la depono, la verko ne estus kondamnita, ĝi akiradus definitive la silentan permeson de la registaro.

Pri kiu temas? (la plej konataj personoj menciitaj en la teksto)

Abeille du Parnasse (1648-1718): abato Gaspard Abeille; franca dramverkisto; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: tragedioj *Solyman*, *Herkulo* – prezentitaj sub la nomo *La Tuillerie*.

Ampère André-Marie (1775-1836): franca fizikisto kaj matematikisto; profesoro de Politeknika Lernejo kaj Normala Lernejo en Parizo; la sistemiginto de reguloj de elektrodinamiko.

Boileau-Despréaux Nicolas (1636-1711): franca poeto kaj kritikisto de literaturo; historiografiisto de la reĝo Louis la XIV-a; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: *Satiroj*, la poemo *Arto de rimfardado* – rekonata kiel la kodo de klasicismo.

Boniface Alexandre (inter 1785-1790 - 1841): franca instruisto, gramatikisto kaj verkisto; membro de la Franca Akademio; li kontribuis al plibonigo de franca elementa instruado; ĉefaj verkoj: *Lernolibro de amatoroj de la franca lingvo*, *Skizo pri la franca gramatiko*.

Bossuet Jacques Bénigne (1627-1704): franca verkisto, teologo kaj historiisto, episkopo; membro de la Franca Akademio; li opiniis, ke daŭrado de la Eklezio pruvas ĝian fideindecon; kontraŭulo de kvietismo; ĉefaj verkoj: predikajoj, *Rimarkoj pri la universala historio*.

Boudet Amélie-Gabrielle (1795-1883): franca instruistino, la edzino de Rivail; ĉefaj verkoj: *Printempaj Rakontoj* (1825); *Elementoj de desegnado* (1826); *Pri tio esenca en Belarto* (1828).

Buffon Georges Leclerc de (1707-1788): franca natursciencisto kaj filozofo; membro de la Franca Akademio de Sciencoj; kunaŭtoro de la plurvoluma verko *Natura historio*, en kiu oni penis prezenti kompletan bildon de la tuta naturo; kreinto de la kosmogonia hipotezo; li supozadis limigitan ŝanĝemon de specioj.

Comenius (1592-1670): Jan Ámos Komenský; ĉeĥa pedagogo kaj sociaktivulo; la kreinto de novepoka pedagogio; ĉefa verko: *Granda didaktiko*.

Comte Auguste (1789-1857): franca filozofo, sociologo kaj politika verkisto; la kreinto de scienca sociologio; ĉefa verko: *Kurso de pozitiva filozofio*.

Corneille Pierre (1606-1684): franca dramaŭtoro; kreinto de la klasicisma tragedio; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: tragikomedioj prikribantaj la konflikton inter devo kaj inti-ma sento (ekz. *Cyd*) kaj tragedioj (ekz. *Horaciuloj*, *Cynna*).

Fellenberg Philipp Emanuel von (1771-1844): svisa pedagogo kaj agronomo; en 1779 li kreis en Hofwyl ĉe Bern, modelan agrikulturan bienon kaj poste kelkajn lernejojn – inter alie unu el la unuaj en Eŭropo mez- kaj poste altlernejon (en 1807) por agrikulturistoj.

Fénelon François de Salignac de la Mothe (1651-1715): franca verkisto, pedagogo kaj predikisto, ĉefepiskopo; membro de la Franca Akademio; adepto

de kvietismo; ĉefaj verkoj: *Aventuroj de Telemako*, *Dialogoj kun mortintoj*, *Fabeloj*, *Maksimoj de sank-tulo*, *Traktato pri ekzisto de Dio*.

Feuerbach Ludwig (1804-1872): germana filozofo; li kreis la teorion de ateismo kaj grave influis opiniojn de postaj materiismaj sciencistoj; ĉefa verko: *Esenco de kristanismo*.

Fléchier Esprit (1632-1710): franca episkopo, oratoro kaj predikisto; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: *Pastoralaj leteroj*, *Vivo de Teodozo la Granda*, *Historio de kardinalo Ximenès*.

Florian Jean Pierre Claris de (1755-1794): franca verkisto; ĉefaj verkoj: sentimentalaj komedioj, pastoralaj rakontoj, fabeloj, romano *Numa*.

Gall Franz Joseph (1758-1828): aŭstra neŭrologo, kuracisto en Vieno kaj Parizo; kreinto de frenologio (teorio kiu atribuas al ĉiu parto de cerbo la originon de agoj kaj karakteroj de la homo; ankaŭ arto konkludi el formo de la kranio pri intelektaj kapabloj de la paciento), kiu kiel teorio montriĝis falsa, sed de ĝi komenciĝis la esploroj de cerbo.

Gautier Aloisius Edouard Camille (1746-1818): franca abato, pedagogo, direktoro de lernejoj en Parizo kaj Anglio; specialisto pri instrumentadoj; li opiniis, ke instruado povas esti pli alloga danke al la didaktikaj ludoj; kun-kreanto de la Societo de Elementa Instruado.

Girard Jean Baptiste (1765-1850): Patro Grégoire Girard; svisa pedagogo, direktanto de bazaj lernejoj; amiko de Pestalozzi; specialisto pri metodiko de instruado, kies influo rimarkeblis ankaŭ ekster Svislando; ĉefa verko: *Eduk-kurso de gepatra lingvo al la uzado de lernejoj kaj familioj* – franclingva.

Haeckel Ernst (1834-1919): germana biologo, filozofo; li propagandis pri la evolucia teorio kaj kreis regulojn de biogenetiko; ĉefa verko: *Mistero de Universo fine de la XIX-a jarcento*.

Horatius (65-8 a.K.): romia poeto, unu el la plej elstaraj lirikistoj; liaj odoj estis la modelo por la eŭropa liriko; ĉefaj verkoj: satiroj, epodoj, kantoj (odoj), la letero *Poetika arto* – rilatanta ĉefe al dram Poezio, kiu iĝis la bazo de la eŭropa poetiko (ĝis komenco de la XIX-a jarcento).

Jullien de Paris Marc-Antoine (1775-1848): lernanto de Pestalozzi, nomata „la patro de la kompara pedagogio”; li kreis en Parizo edukejojn kaj lernejon por plenkreskuloj; ĉefaj verkoj: *Prezento de la edukmetodo de Pestalozzi*, *Ski-zaĵoj kaj antaŭ-preparo al la laboro pri kompara edukado*.

La Bruyère Jean de (1645-1696): franca verkisto – moralisto, unu el reprezentantoj de la klasicisma prozo; membro de la Franca Akademio; ĉefa verko: *Karakteroj* – enhavanta la kritikan priskribon de liatempa socio.

La Fontaine Jean de (1621-1695): franca poeto; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: fabeloj bazantaj sur la antikvaj modeloj de Fedrus kaj Ezop.

La Harpe Frédéric Edouard (1754-1838): svisa politikisto; partizano de la franca revolucio; kunkreinto kaj membro de registaro de la Helvetia Respubliko.

Lévi-Alvarès David Eugène (1794-1870): franca profesoro pri pedagogio, verkisto; li okupiĝis pri instruado de knabinoj; en Parizo li gvidis kursojn pri baza edukado kaj tiujn por instruistinoj; aŭtoro de pluraj lernolibroj; ĉefaj

verkoj: *Novaj elementoj de ĝe-nerala historio, Patrino instruistino.*

Leymarie Pierre-Gaétan (1827-1901): politikisto, verkisto, la unua ĉefredaktoro de *Spiritista Revuo*; la organizanto de la Scienca Asocio de Psikologiaj Studoj, kies aktivuloj kontinuadis laborojn de Allan Kardec kaj preparadis tradukojn de liaj verkoj.

Marle Claude-Lucien (1795-1863): franca gramatikisto; membro de Ateneo kaj de la Akademia Gramatika Societo; kunlabore kun A. Boniface en 1826 li fondis la *Gramatikan kaj Didaktikan Ĵurnalon de la Franca Lingvo.*

Marx Karl Heinrich (1818-1883): germana filozofo, sociaktivulo; li kreis la sciencan socialismon kaj bazojn de la historia materiismo; ĉefaj verkoj: *Kapitalo, Germana ideologio, Kontribuo al kritiko de la politika ekonomio.*

Massillon Jean Baptiste (1663-1742): franca prelato kaj oratoro, profesoro pri beletro; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: serio da funebraj paroladoj *Predikoj* (inter alie *Malgranda prediko pri granda fasto*).

Mill John Stuart (1806-1873): angla filozofo kaj ekonomiisto; li kreis propran teorion kaj metodologion de indukcio; ĉefaj verkoj: *Sistemo de logiko, Reguloj de la politika ekonomio.*

Pestalozzi Johann Heinrich (1746-1827): svisa verkisto kaj pedagogo; kreinto de la modernaj sistemo kaj metodoj de baza ins-truado; nomata „la patro de la popola lernejo”; kreinto de orfejoj, edukejoj kaj instruista seminario; ĉefaj verkoj: *Leonard kaj Gertruda, Kiel Gertruda instruas siajn infanojn, Pedagogiaj skri-baĵoj.*

Philipon de la Madelaine Louis (1734-1818): naskita en Lyon franca kantisto kaj vodevilisto; ĉefaj verkoj: komedioj (ekz. *Juvelisto el Nevers, Trobadoroj*), *Vortaroj*, verkaĵoj pri edukado.

Piaget Jean (1896-1980): svisa psikologo, filozofo kaj pedagogo; li kreis la genetikajn epistemologion; ĉefaj verkoj: *Naskiĝo de inteligento ĉe infano, Psikologio kaj epistemologio.*

Racine Jean Baptiste (1639-1699): franca dramverkisto, unu el la ĉefaj reprezentantoj de klasicismo; membro de la Franca Akademio; ĉefaj verkoj: la tragedioj *Berenika* kaj *Fedra* – plenaj de la profunda pesimismo, enhavas la precizan analizon de la homaj pasioj.

Rousseau Jean Baptiste (1671-1741): franca poeto; verkoj: odoj, kantatoj, komedioj, tekstoj de operoj.

Rousseau Jean Jacques (1712-1778): svisa filozofo; li interesiĝis pri edukado kaj propagandis idealojn de la Granda Franca Revolucio; ĉefaj verkoj: *Socia interkonsento, Emilo, Nova Heloiza.*

Salustius (86-35? a.K.): romia historiisto; ĉefaj verkoj: *Komploto de Katilino, Milito kun Jugurto* – en ili li penis pruvi, ke la senmoraleco de romiaj nobeloj gvidos al falo de la lando.

Verligius (70-19 a.K.): Publius Vergilius Maro; la plej eminenta romia epopea poeto, poste rekonata kiel magiisto, saĝulo kaj „matematikisto”; ĉefaj verkoj: *Bukolikoj, Georgikoj, Eneida.*

Voltaire (1694-1778): François Marie Arouet; franca verkisto, filozofo kaj historiisto; membro de la Franca Akademio; aŭtoro de verkoj plenaj de spirito de tolero kaj estimo al homo; kontraŭbatalis religian fanatikecon, dogmojn kaj

perforton; ĉefaj verkoj: *Traktato pri tolero*, *Kandido* (filozofia rakonto), *Zaira* (tragedio).

Wygotski Lew (1896-1934): rusa psikologo; li okupiĝis ĉefe pri parolo kaj pensado; li kreis propran teorion pri disvolvado de psikaj fakultoj; ĉefaj verkoj: *Pensado kaj parolo*, *Ilo kaj signo en evoluado de infano*.

Glosareto

(vortoj kaj esprimoj, kies proponita traduko povus esti diskutinda)

atesto pri kapableco – brevet de capacité

atesto pri studado – brevet d'études

baza instruado – enseignement primaire

bebprizorgantino – nourrice

bibliaj rakontoj – histoire sainte

diplomo pri baza instruado – diplôme d'enseignement primaire

diplomo pri instruado – diplôme d'enseignement

eksterulejo – externat

eksterulo – externe

elementa instruado – enseignement élémentaire

estro de institucio – chef d'institution

institucio – institution

instituto – institut

instruistino de baza lernejo – institutrice primaire

Magistrato – la Ville (ev. Hôtel de Ville)

majstrino de institucio – maîtresse d'institution

majstrino de pensio – maîtresse de pension

majstrino de studoj – maîtresse d'étude

majstro – maître

pensio – pension

Polimatika Liceo – Lycée Polymathique

puntaskoj – pensum

submajstrino – sous-maîtresse

superpensio – pensionat

svingilo – férule

unuagrada lernejo – école de premier degré

vipilo – martinet

Literaturo

- Aubrée M., Laplantine F.: La table, le livre et les Esprits – Naissance, évolution et actualité du mouvement social spiritiste entre France et Brésil. Éditions Lattès – Société Nouvelle Firmin-Didot, Paris 1990.
- Berne P: Pestalozzi ou la naissance de l'éducateur – étude sur l'évolution de la pensée et de l'action du pédagogue suisse (1746-1827). P.Lang, s.l.¹ 1981.
- Bibliographie de la France, ou Journal Général de l'Imprimerie et de la Librairie et des cartes géographiques, gravures, lithographies, oeuvres de musique. Pillate-Ainé, Paris 1819-1854.
- Blackwell A.: Translator's preface. [en:] Kardec A.: The spirit's book. FEB, Rio de Janeiro 1986.
- Boniface A.: Abrégé de la Grammaire Française, Méthodique et Raisonnée, adoptée par le Conseil Royal de l'Université pour les Collèges et les Écoles normales. Delalain - Levrault - chez l'Auteur, Paris 1829.
- Boniface A.: Cours élémentaire et pratique de dessin linéaire... . Imprimerie de Gratiot, Paris 1823.
- Boniface A.: Grammaire française méthodique et raisonnée, d'après un nouveau plan, fondée sur un grand nombre de faits, et sur l'autorité des grammairiens les plus connus. Chez l'auteur, Paris s.j.²
- Bourquelot F.: La Littérature Française Contemporaine, s.e.,³ Paris 1857.
- Buisson F. (red.): Dictionnaire de Pédagogie et d'Instruction Primaire. Librairie Hachette et Cie. Paris 1882.
- Buisson F. (red.): Nouveau Dictionnaire de Pédagogie et d'Instruction Primaire. Librairie Hachette et Cie. Paris 1911.
- Cacères B.: Histoire de l'éducation populaire. Editions du Seuil, Paris 1964.
- Catalogue Général des Livres Imprimés de la Bibliothèque Nationale (Auteurs). Imprimerie Nationale, Paris MDCCCC, vol. II.
- Chavannes D.A.: Exposé de la méthode élémentaire de H.Pestalozzi, suivi d'une notice sur les travaux de cet homme célèbre, son institut et ses principaux collaborateurs. s.e., Vevey 1805.
- Cochin A.: Pestalozzi, sa vie, ses oeuvres, ses méthodes d'instruction et d'éducation. Librairie Académique, Paris 1880.
- Compayré G.: Histoire critique des doctrines de l'éducation en France depuis le XVI-e siècle. Hachette, Paris 1885, vol. II.
- Compayré G.: Pestalozzi y la Educación Elemental. Ediciones de la Lectura. Madrid 1922.
- Conan Doyle A. (sir): The history of spiritualism. Psychic Press Ltd, London 1989, vol.II.
- Cornaz-Besson J.: Qui êtes-vous, monsieur Pestalozzi? Éditions de la Thièle, Yverdon 1977.

¹ s.l. - sen indiktita eldonloko.

² s.j. - sen indikita eldonjaro.

³ s.e. - sen indikita eldonejo.

- Costa S.: Pestalozzo - la lernejestro. Akademio de Sciencoj en Lisbono, Lisbono s.j.
- Dictionnaire encyclopédique Quillet. Librairie Aristide Quillet, Paris 1978.
- Durkheim E.: L'Évolution pédagogique en France. De la Renaissance à nos jours. Alcan, Paris 1938, vol. II.
- Encyklopedia popularna PWN. Wydawnictwo Naukowe PWN, Warszawa 1995.
- Fourrier C.: L'Enseignement français de 1789 à 1945, précis d'histoire des institutions scolaires. I.N.P., Paris 1965.
- Furet F., Ozouf J.: Lire et écrire. L'alphabétisation en France, de Calvin à J.Ferry. Editions de Minuit, Paris 1977, vol. II.
- Gautherin J.: Marc-Antoine Jullien de Paris (1775-1848). [en:] Perspectives: revue trimestrielle d'éducation comparée. vol. XXIII, n-ro 3-4/1993, p.783-798.
- Gąsiorowski A. (red.): Historia wychowania – słownik biograficzny. Wyższa Szkoła Pedagogiczna, Olsztyn 1994.
- Goetz H., Pancera C.: La diffusione del pensiero educativo di Pestalozzi in Italia (l'opera di Marc-Antoine Jullien). Facoltà di Magistero dell'Università di Ferrara, Ferrara 1977.
- Goetz H.: Marc-Antoine Jullien de Paris (1775-1848). I.N.P., Paris 1962.
- Grand Larousse encyclopédique. Librairie Larousse, Paris 1962.
- Grzybowski P.: Opowieści spirytystyczne. Dom Wydawniczo-Księgarski KOS, Katowice 1999.
- Guimps R. de: Histoire de Pestalozzi, de sa pensée et de son oeuvre. Georges Bridel Éditeur, Lausanne 1874.
- Hubert R.: Traité de Pédagogie Générale. Presses Universitaires de France, Paris 1959.
- Irsay S. (d'): Histoire des universités françaises et étrangères (du XVIe siècle à 1860). Éditions Auguste Picard, s.e., Paris 1935.
- Israel A.: Pestalozzi-Bibliographie. [en:] Monumenta Germaniae paedagogica, n-roj 25, 29, 31/1904.
- Jullien de Paris M.-A.: Esprit de la méthode d'éducation de Pestalozzi, suivie et pratiquée dans l'Institut d'Éducation d'Yverdon, en Suisse. s.e., Paris 1812.
- Jullien de Paris M.-A.: Esquisse d'un ouvrage sur l'éducation comparée. Bureau International d'Éducation, Genève 1962.
- Jullien M.-A.: Analyse succincte d'un plan général d'éducation... s.e., s.l., 1806.
- Jullien M.-A.: Esprit de l'institut d'éducation d'Yverdon, en Suisse, organisé et dirigé par M.Pestalozzi. Imprimerie royale, Milan 1812.
- Jullien M.-A.: Esprit de la méthode d'éducation de M.Pestalozzi, suivie et pratiquée dans l'Institut d'Yverdon en Suisse. Imprimerie royale, Milan 1812, vol. I-II.
- Jullien M.-A.: Esquisse et vues préliminaires d'un ouvrage sur l'éducation comparée... L.Colas, Paris 1817.

- Jullien M.-A.: Essai général d'éducation physique, morale et intellectuelle... F.Didot, Paris 1808.
- Jullien M.-A.: Essai sur une méthode... F.Didot, Paris 1808.
- Jullien M.-A.: Lettres de M.-A.Jullien sur la Méthode d'éducation de M.Pestalozzi. [en:] Journal d'éducation. L.Colas, Paris - juin 1816.
- Jullien M.-A.: Précis sur les Instituts d'éducation de M. de Fallenberg, établis à Hofwil, auprès de Berne. L.Colas, Paris 1817.
- Jullien M.-A.: Appel aux véritables amis de la patrie, de la liberté et de la paix, ou Tableau des principaux résultats de l'Administration des Consuls et des ressources actuelles de la République française. Léger, Paris 1801.
- Kardec A.: La libro de la Spiritoj. FEB, Rio de Janeiro 1989 – en la traduko de L.C. Porto Carreiro Neto.
- Kardec A.: O Livro dos Espíritos. FEB, Rio de Janeiro 1994.
- Kardec A.: Oeuvres posthumes. Éditions de la B.P.S., Paris 1924.
- Kuhlemann G.: Pestalozzi–Bibliographie 1966-1977. [en:] Pädagogische Rundschau, n-ro 2-3/1980, p.189-202.
- Léon A.: Histoire de l'enseignement en France. Presses Universitaires de France, Paris 1972.
- Léon A.: De la Révolution française aux débuts de la III-e République. [en:] M.Debesse, G.Mialaret (red.): Traité des sciences pédagogiques. Presses Universitaires de France, Paris 1971, vol. II - Histoire de la pédagogie.
- Lorenz O. (red.): Catalogue Général de la Librairie Française, pendant 25 ans (1840-1865). s.e., Paris, vol. III – 1869, vol. IV – 1871.
- Mialaret G., Vial J.: Histoire mondiale de l'éducation (de 1815 à 1945), Presses Universitaires de France, Paris 1968, vol. III.
- Milerski B., Śliwerski B.: Pedagogika. Wydawnictwo Naukowe PWN, Warszawa 2000.
- Moreil A.: Allan Kardec – Sa vie, son oeuvre. Éditions Vermet, Paris 1989.
- Pompée P.P.: Études sur la vie et les travaux pédagogiques de J.-H.Pestalozzi. Librairie Charles Delagrassé, Paris 1878.
- Ponteil F.: Histoire de l'enseignement en France (1789-1965). Sirey, Paris 1966.
- Prevost M., Amat R. d' (red.): Dictionnaire de Biographie Française. Librairie Letouzey et Aîné, Paris 1953.
- Prost A.: Histoire de l'enseignement en France 1800-1967. Librairie Armand Colin, Paris 1968.
- Quérard J.M.: La France Littéraire, ou Dictionnaire Bibliographique des savants, historiens et gens de lettres de la France. s.e., Paris, vol. VIII – 1836, vol. XII – 1859-64.
- Rivail H.L.D.: Cours Pratique et Théorique d'arithmétique, d'après la méthode de Pestalozzi, avec modifications. Imprimerie de Pillot Aîné, Paris 1824, vol. I – II.
- Rivail H.L.D.: Discours prononcé à la distribution des prix du 14 août 1834. Institution Rivail, Paris 1834
- Rivail H.L.D.: Plan proposé pour l'amélioration de l'éducation publique. Dentu, Paris 1828.

- Rivail H.L.D.: *Projet de réforme concernant les examens et les maisons d'éducation des jeunes personnes, suivi d'une proposition touchant l'adoption des ouvrages classiques par l'Université, au sujet du nouveau projet de loi sur l'enseignement.* Chez l'Auteur, Paris 1847.
- Rosselo P.: *M.-A.Jullien de Paris. Père de la pédagogie comparée et précurseur de BE.* Port-Noir, Genève 1943.
- Saint-Gérand J.-P.: *Le Journal grammatical et didactique de la langue française (1826-1840): rémanences et subreptices subversions.* Université Blaise Pascal Clermont-Ferrand II, Clermont-Ferrand, s.j.
- Sausse H.: *Biographie de Allan Kardec.* Pygmalion Gérard Watelet, Paris 1993.
- Snyders G.: *La pédagogie en France aux XVII-e et XVIII-e siècles.* Presses Universitaires de France, Paris 1965.
- Soëtarđ M.: *Johann Heinrich Pestalozzi (1746-1827).* [en:] *Perspectives: revue trimestrielle d'éducation comparée.* vol. XXIV, n-řo 1-2/1994, p.307-320.
- Soëtarđ M.: *Pestalozzi ou la naissance de l'éducateur.* P.Lang, Berne 1981.
- USFF (l'): *Le spiritisme, qu'en savons-nous?* Union Spirite Française et Francophone, Tours s.j.
- Vapereau G.: *Dictionnaire universel des contemporains.* Librairie de L.Hachette et Cie, Paris 1861.
- Vaughan M., Scotford Archer M.: *Social conflict and educational change in England and France 1789-1848.* Cambridge University Press, Cambridge 1971.
- Wantuil Z., Thiesen F.: *Allan Kardec – Meticulosa Pesquisa Biobibliográfica.* FEB, Rio de Janeiro 1979, vol. I – manuskripto de esperantlingva versio, en la traduko de Affonso Borges Gallego Soares.
- Wantuil Z., Thiesen F.: *Allan Kardec – Meticulosa Pesquisa Biobibliográfica.* FEB, Rio de Janeiro 1924, vol. I.
- Weil G.: *Histoire de l'enseignement secondaire en France (1802-1920).* Payot, s.l. 1921.
- Wiloch T.: *Wprowadzenie do pedagogiki porównawczej.* Państwowe Wydawnictwo Naukowe, Warszawa 1970.
- Wolter: *Traktat o tolerancji.* Państwowy Instytut Wydawniczy, Warszawa 1956.
- Wroczyńska R., Wroczyński R.: *Wstęp.* [en:] *J.H.Pestalozzi: Łabędzi śpiew.* Wydawnictwo PAN, Wrocław - Warszawa - Kraków - Gdańsk 1973.
- Wroczyński R.: *Jan Henryk Pestalozzi* [en:] *J.H.Pestalozzi: Pisma pedagogiczne.* Wydawnictwo PAN, Wrocław - Warszawa - Kraków - Gdańsk 1972.